


HECTOR
HODLER

LIA VIVO KAJ LIA VERKO

UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO
1908—1928



Vertical text on the right edge of the page, likely bleed-through from the reverse side. The text is faint and difficult to read, but appears to be arranged in lines. Some legible fragments include "L. B. ...", "1876", and "No. 1".

Donaco de N. G. A. Genève.

Universala Esperanto-Asocio 1908—1928

Hector Hodler

Lia vivo kaj lia verko

Genève 1928

Universala Esperanto-Asocio (Eldona Servo)

12 Boulevard du Théâtre

700650-A

Støj: 5401

Hector Hodler

kunfondinto de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

kaj de la gazeto

ESPERANTO



Lia vivo kaj lia verko

1887—1920



Hector Hodler

kondaminto de

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

kaj de la gazeto

ESPERANTO

*

La vivo kaj la verko

1887-1920


*

◆

Biografio verkita de Ed. Stettler.
El kongresa raporto de UEA, Hago 1920
— Senŝanĝa represo —

◆

RECTOR FOLIER





HECTOR HODLER



HECTOR HODGES

Lu Jakob.


Ĉu vi vidis la aldonitan
alvokon kaj interrilatis kun
ties subskribito?

Mi plezure legis la informon
pri fondiĝo de Suda Komitato
por helpado al Vienaj Espri-
istoj. Bonevolu premi el
mia konto la sumon da
50 Fr., kiun vi transdonu
al la kasto kiel donacon.
(Mi ne retrovas la poŝtekan
formulon, kiun li sendis
al mi). — Mi ne povas
doni pli multe, ĉar mi
jam donaciis pli altan
sumon por ^{mon} kolektado favore
de Vienaj infanoj.

H. Hodler

25.3.2.

Autografo letero de H. Hodler



Antaŭparolo

Fondita en 1908, UEA festis en 1928 sian dudekjarecon, sed ĝi ploris, meze de la vojo, sian fondinton Hector Hodler, mortintan en 1920. Por signi tiun datrevenon, nenio pli taŭgis ol eldono de libro, kiu konigu al la nova generacio de esperantistoj lian vivon kaj lian penson.

El ambaŭ nia movado tiom elĉerpis, ke estus malfacile ĝin kompreni sen ia scio pri Hodler. Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva, li aldonis la necesan bazon sur la kampo socia.

Al la esperantistaro ĉefe okupita proponi la lingvon aŭ ĝin diskuti, li diris: „Uzu ĝin! Tiam ĝi disvastiĝos kaj riĉiĝos per la vivo mem.“ Ne nur diris, sed ebligis per fondo de UEA kaj de ĝia servaro. Prave unu karikaturisto lin reprezentis tenante en mano reton de fadenoj telegrafaj ĉirkaŭ la tuta mondo. Al la deksex-regula gramatiko kaj vortara ŝlosilo li aldonis la jarlibron kun adresoj de la delegitoj, liaj fidelaj sekvantoj kaj helpantoj.

Same kiel ĉe lia Majstro D-ro Zamenhof, lia realigemo devenis de profunda idealismo. La junan filozofon dektri-jaran mi vidis ĉiutage sur benkoj de lernejo kiel kamarado kaj amiko samaĝa. Jam

en tiu tempo lia forta pensemo, malgaja, sed saĝa, impresis min. Antaŭ kelkaj tagoj mi trovis en malnova kesto finjaran liston de lernejoj atestoj: Hodler, Privat, Bouvier. En tiu jaro 1903 ni lernis la lingvon kune kaj ne antaŭvidis, ke ĝi restus trans vivo kaj morto tiel forta ligilo de amikeco.

Iom skeptike aŭ pesimiste li rigardis la fondon de nia klubo de junaj esperantistoj, sed kelkajn jarojn poste li jam gvidis mem plej gravan esperantan gazeton kaj fondis UEA. Tiam li renkontis saĝajn amikojn kiel Th. Rousseau kaj Ed. Stettler, kiuj sindone helpis lin sur la nova kampo.

Dank' al afabla subteno de lia amata edzino S-ino Hodler UEA povas nun prezenti tiun jubilean memoraĵon pri lia penso kaj agado.

Estas agrabla devo ankaŭ danki plej sincere al S-ro Stettler pro lia bonega biografio de Hodler kaj al S-ro Hans Jakob pro la elekto de la verkaĵoj kaj artikoloj. El ili bildiĝos antaŭ viaj okuloj la digna figuro de Hodler, granda idealisto por si mem kaj saĝa realisto por la ceteraj. Restu vivanta lia memoro, fidela nia dankemo kaj frukto-dona lia verko.

Genève, 30 Marto 1928 *Edmond Privat*

Lokita malproksime de la batalejoj, klopodante krei per amikaj interrilatoj bonvolon internacian, kiu pace disdonos la trezorojn de la tero al gentoj kaj homoj, unu respektante la alian: tiel nia asocio povis esperi, ke la furio de la mondmilito ne invados ĝian modestan dometon. Sed male; kvazaŭ tiu spirito malbona volis venĝi sian potencon minacotan per nia forĝejo de la bono, li postulis gravegajn oferojn. Centoj de niaj membroj, fidelaj al sia ŝtata devo falis, la armilojn en la mano, aliaj suferegis en hospitaloj, multajn forprenis malsano kaj zorgo. Estis samideanoj, plejparte junaj kaj rajtigataj je vivo pli longa, dum kiu ili esperis agi per vorto kaj plumo kontraŭ la kutimaj interŝtataj procedoj malamaj, sekve malspritaj. Kaj el la centro de nia laborejo foriris la mastroj: Bollingbroke-Mudie, grandanima, la estro de du asocioj; poste Th. Rousseau, nia klare vidanta Vicprezidanto; mortis je rompita koro la kara Majstro; sekvis lia eminenta disĉiplo, rektoro Boirac. Farigis Prezidanto Hector Hodler, foriris ankaŭ li. De longe liaj pulmoj lin suferigis, sed kiam oni plej multe bezonis tiun spertan gvidiston, li ekfartis pli

bone, nin esperigante, ke nun finis la terura vico. Ne! Nur mensoge la senkompata malsano kolorigis liajn vangojn, ruligis pli ruĝan sangon tra liaj vejnoj, por ke despli certe li estu frapata.

Vi ĉiuj, mastroj kaj laboristoj de nia sankta afero, estu respektplene salutataj. Daŭra restu via memoro, firma nia danko. El viaj fidelaj manoj ni prenas la verdstelan standardon, solenigitan per via morto, kaj alten ĝin tenos por montri la vojon de repaciĝo al la suferanta homaro.

Ferdinand Hodler

La familio Hodler devenas de vilaĝeto proksime de Bern, en kiu urbo vivis la avo de Hector kiel lignaĵisto, kaj naskiĝis lia patro, Ferdinand. Tro interesa estas la sorto de la fama pentristo, por ke ni ne skizu ĝin rapide.

Ferdinand Hodler, naskiĝinta 1853 kaj baldaŭ perdinta siajn gepatrojn, lernis okaze iom pentri kaj laboris deksep-jara por la fremdula industrio. Li devis fabriki pogranda la konatajn pejzaĝetojn kun la Thuna lago kaj la montoj, kiujn por kelkaj frankoj la turistoj aĉetas kiel „arta“ memoraĵo. Tedata je tiu metio, aŭdinte, ke estas grandaj, bonkoraj artistoj en Genevo, li iris piede tien, sen iu centimo en la poŝo. Li pentris afiŝojn aŭ kion oni bonvolis konfidi al la deknaŭjara junulo, ĝis li trovis helpantojn, kiuj ebligis al li la viziton de la

belarta akademio. Tie Hodler laboris kun la seriozeco kaj nelacigebla peno, kiuj dumvive distingis lin kiel la filon. Jam 1874 li ricevis unuan premion por bildo, sed la saman rifuzis du jarojn poste alia ekspozicio. Lia arto estis tiel malsimila al la kutima, irante novan, propran vojon, ke ĝi ekscitis ĉie akrajn kritikojn. Post unujara restado en Hispanio la pentristo daŭre loĝis en Genevo. Tiu urbo fariĝis lia dua patrujo, kiun, escepte kelkaj restadoj en Bern kaj mallongaj vojaĝoj eksterlanden, li ne plu forlasis. Malgraŭ ke de 1887, unua honora mencio en Parizo, ne mankis rekonoj de kompetentuloj, estis necesa la tuta energio de Hodler por batali la mizerojn de la vivo kiel la multajn atakojn de la publiko. La venko lin kronis je 1900, kiam la svisa registaro mendis murpentraĵon por la nacia muzeo en Zürich kaj protektis la malkomprenitan artiston kontraŭ la muzea komisiono kaj volumoj da gazetartikoloj, mallaŭdantaj lian tiel nomitan fuŝprojekton. Finpentrita sur la muro (reiro de la svisaj batalintoj el Marignano 1515), ĝi glorie rivelis la genian kapablon de Hodler reprezenti homojn realajn, en la tuta forto de ilia doloro kaj nevenkita kuraĝo. Per tiu kaj kelkaj samspecaj pentraĵoj Hodler malfermis novan stilon de prehistoria pentrarto; de nun la senresta esprimo de la spirita graveco de okazintaĵo estis pli atentata ol kiel antaŭe la plaĉanta grupiĝo, detaletoj de l'

kostumo kaj belaj herooj kun frizitaj haroj. Baldaŭ Hodler fariĝis internacie konata, tiel pro la aluditaj pentraĵoj, kiel pro tiuj kun filozofia enhavo, multaj portretoj kaj pejzaĝoj. Alvenis la mendoj, honoroj, titoloj. De frumatene li laboris senĉese, okaze rapide, plej ofte kun nekutima kritika atento, kiel pruvas pluraj centoj da skizoj postlasitaj. Lia morto, la 19-an de Majo 1918, signifis por Svisio la perdon de la plej rimarkinda pentristo kiun ni havis de jarcentoj, kaj kune funebris la artaj societoj en ĉiuj aliaj landoj. — Priparolado de lia verko en „Esperanto“ bedaŭrinde ne estis ebla: redaktis la ĵurnalon lia filo, tro modesta je ĉiu honorigo.

Hector Hodler

En 1887, kiam la pentristo Hodler staris meze en la malfacilaĵoj de la vivo, baraktante pri arto kaj ekzisteblecoj, naskiĝis la 1-an de Oktobro lia filo, *Hector*, Ferdinand. La patrino, nask. Augustine Dupin, estis Genevanino. La malgranda familio loĝis ie ajn en modesta kvartalo, pliposte okazis malinterkonsentoj inter la gepatroj. Pli multe mi ne scias; la silenta Hodler, kaj tio estas forta trajto de lia karaktero, neniam parolis pri siaj intimaj aferoj nek esploris tiujn de la aliaj. Eĉ kiam mortis lia patrino, 1910, li diris preskaŭ nenion, sed ni ĉiuj en la oficejo, vidante tiun viran junulon, kiel li trapaŝis la ĉambron, la larmojn

en la okuloj, kiel li laboregis por forgesigi la akran doloron, ni sentis la tutan forton de l' amo lin liganta al la kara patrino. En ŝi li perdis la malmultan lumon de sia juneco. Liajn knabajn jarojn priskribis S-ro Edm. Privat en „Esperanto“ tiel bone, ke mi permesas al mi represi la koncernan parton. „Kiam mi dekdujare eniris gimnazion“, diras S-ro Privat, „mi tuj rimarkis tiun novan kamaradon, altan, malgrasan, malriĉan, kun mirindaj okuloj, kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton. Lia neforgesebla figuro aperis sur pli ol unu pentraĵo de l' patro. Kiam ni kune elkuris el klaso je la kvara posttagmeze, Hector Hodler malgaje rapidis al la patra pentrejo sub tegmento por sidadi aŭ staradi terure senmove dum horoj kiel modelo. Dum tiu turmento li kutimiĝis je pensado. Tiam li lernis tiun silentemon kaj trankvilecon, kiuj kaŝis sub iom nevarma eksteraĵo la plej senteman koron kaj fervoran animon.

Kiam la patro ne bezonis lin, ni faris kune longajn promenadojn, diskutante kiel knabetoj pri la profundaj misteroj de l' socia vivo. Li estis la pli saĝa kaj la pli multscia. Dekdujare li jam legis tutan Zola!

Unu tagon en 1903 mi alportis en klason esperantan gramatikon. „Ankaŭ mi jam eklernis la lingvon“, li respondis kun brilo en la okuloj. Post

tri semajnoj ni jam flue interparolis en la nova lingvo kaj decidis fondi klubon kaj ĵurnaleton: „Juna Esperantisto“. Unu post unu vendiĝis niaj belaj premilibroj aŭ volumoj de Jules Verne por pagi la eldonelspezojn. La redakcio sidis dum kvin jaroj sur la sama benko en la fundo de klaso. Dum kiom da lecionoj pri matematiko ni gluis poŝtmarkojn, skribis adresojn aŭ legadis patrajn leterojn de profesoro Cart aŭ D-ro Zamenhof!

Hodler jam montris ŝaton je ordo kaj serioza organizo. Ankaŭ li vidigis senpartian ekvilibron. Laŭ lia instigo ni lernis kune „Idiom Neutral“ kaj „Bolak“, por certigi, ke Esperanto estas ja vere la plej taŭga lingvo internacia.

La organizo de la Dua Kongreso (Genevo 1906) alportis novajn spertojn. Hodler speciale interesiĝis je la proponoj de S-roj Rousseau kaj Carles pri esperantistaj konsuloj. Li insistis pri tio, ke nia movado devas stariĝi sur fundamento samtempe pli idealista kaj pli praktika, organizante reciprokan sinhelpadon inter bonvolaj homoj. Igi la lingvon tuj utila kaj prepari internacian tut-homaran popolon, jen la temo, kiun pristudis lia pensema inteligento. En 1907 la gazeton „Esperanto“ li reprenis el la manoj de Paul Berthelot kaj redaktis ĝin laŭ tiu tendenco.“

Tiu Geneva Kongreso fiksas la sorton de Hodler. Ne fininte la gimnazion li forlasis la benkojn de

la lernejo por neniam revidi tian institucion, kaj eniris sanktan Esperantujon. Kiel siatempe la patro, tiel la filo forkuris el la instruo kaj alvenis al la promesita lando kun kapo plena je klaraj ideoj, kaj manoj malplenaj. Iom li jam estis konata pro la supre citita „Juna Esperantisto“, artikoloj en „Tra la Mondo“, kaj modela traduko de la novelo de Bernardin de Saint Pierre, „Paŭlo kaj Virginio“, aperinta 1905 ĉe la Presa Societo en Parizo.

Plia sekvo de tiu kongreso estis, ke vigle interesiĝis pri la lingvo S-ro René de Saussure, kiu en la sama jaro malfermis Rue Bovy-Lysberg oficjon, laŭ mia scio unue propagandan, baldaŭ poste sciencan. Certan tempon Hodler laboris tie kiel sekretario, ĝis li fariĝis posedanto de „Esperanto“. La redakto kaj la unua oficejo de UEA troviĝis en ĉambreto treege modesta ludonita de S-ro de Saussure. Estas ankaŭ li, kiu trovis kaj luprenis la loĝejon Rue de la Bourse 10, aŭtuno 1909, kie iom post iom nia asocio okupis la ĉefan spacon kaj li la malgrandan. En 1913 S-ro de Saussure translokiĝis al Bern pro la sano de sia filo. La deveno, eduko kaj karaktero de ambaŭ homoj estis tro diversaj, por ke el la samideanaj rilatoj kreiĝu amikeco. Hodler vidis grande, li volis realigi la ideojn de Zamenhof per la praktiko, dum S-ron de Saussure interesis tiam kiel ĉiam detaloj de la lingvo kaj

gramatiko. Ankaŭ ĉi tiu havis multan metodon en la laboro kaj bonordegon en la oficejo, bon-ecoj, kiujn juna Hodler devis lerni. Estas simpla devo de veremo danke konstati, ke ĉe S-ro de Saussure nia asocio trovis la unuan tegmenton, la unuajn meblojn kaj prunte uzis la multajn ofic-
ejajn ilojn, por kiuj nia ŝparema Direktoro ne volis elspezi monon. Neniam mi forgesos, kian elokventecon mi devis amasigi, ĝis Hodler elpoŝ-
igis tutajn kvin frankojn por aĉeto de kelkaj plumoj, de kaslibro kaj de unu rekta liniilo.

La 12-an de Februaro 1907 Hodler publikigis sian unuan numeron de „Esperanto“. Tiu memor-
inda dokumento, 4 paĝoj je 35×50 cm, surhavas lian nomon kiel Direktoro de la gazeto kaj estas numerigata: Tria jaro, No. 1. En la enkonduka ar-
tikolo li informas la legantaron: „Simila al tiuj estaĵoj, kiuj ĉe l' veno de l' ekmaturiĝo, nescias kien ilin kondukos la jaroj, ĝi iam ŝajnis ŝanceliĝema kaj necerta pri sia vojo. Dufoje ĝin morto minacis, ne tial, ke al ĝi mankis helpantoj kaj amikoj, sed nur tial, ke ĝian regulan aperon haltigadis pure administraciaj aferoj. Nuntempe, malaperis tiaj cirkonstancoj, kaj al la tutmonda esperantistaro, ne plu al ia nacia esperantistaro, sin prezentas *Esperanto*, provita, hardita, kun programo, alfarita al la estantaj bezonoj kaj disvastiĝeco de nia afero.“

Kun malofta klareco la 19-jara junulo, neniam estinte vere juna, nun disvolvas sian programon, al kies ĉefaj ideoj li restos fidela dumvive. Sed kiom li trompis sin pri la malapero de la „administraj aferoj“, t. e. la zorgoj pri la mono. Ili nur komencis, por grandiĝi ĉiujare ĝis la helpo de lia patro lin malŝargigis. Fondinto de la gazeto estis S-ro Berthelot, kaj li aŭ ebla posteulo vendis la gazeton, post ŝajne malbonaj spertoj, al Hodler, kontraŭ kelkaj penplene de li ŝparitaj centfrankoj. Jam en N-ro 9 aperas la fama projekto de akcia societo, nomita: „Anonima Akcia Societo por la ekspluatado de nia gazeto.“ „La kapitalo estos komence 5000 frankoj, dividata en 200 akcioj da 25 Fr., pageblaj ĉu en unu, ĉu en pli ol unu fojoj. Fiksa rentumo da 4 procentoj estos ĉiujare pagata al la akciuloj; plie ĉiu akciulo partoprenos la estontajn profitojn de la entrepreno, ktp.“. Ne demandu pri la sukceso. Sed la skribinto, al kiu ĝis antaŭ unu jaro la afero restis mistera, bone memoras la alvenon de minacaj leteroj ke Hodler ŝuldas el la estinta akcia societo, lian zorgan esploron de la lada kaseto kaj la forsendon de poŝtmandatoj. Ne agis tiel multaj akciuloj, estis ĉefe unu riĉulo, de longe for de nia movado.

Pri tiu infana entrepreno ni ne riproĉu Hodler, kies financa kaj administra sensperteco ankaŭ montriĝis en la unuaj aranĝoj de UEA. Tamen

oni rajtas bedaŭri, kiom malofte samideanoj kun komercaj konoj prenas la penon plibonigi tiajn nematurajn projektojn. Restas ĝusta kion pliposte Hodler ofte diris, ekzamenante iun el la multaj ne vivpovaj esperantistaj kreitaĵoj: „Estas samideanoj, zorgemaj familiaj patroj kaj prudentaj homoj, por kiuj rilate al Esperanto ne valoras la plej simplaj veroj. Kion neniam ili riskus en sia metio, tion ili kredas ebla, proponas aŭ plenkore aprobas se agiĝas pri nia movado.“ Sed ni revenu al la gazeto, kies eldona historio sumiĝas en bataladoj kun la presistoj. Problemo: presigi bele per malmulte da mono, solvo: iri de unu al alia. Komencinte en Genevo, li aŭdis, ke en Châlons sur Marne oni postulos malpli, sekve li iras tien, ankaŭ pli grandigante la formaton. (Februaro 1909.) La presejo ŝanĝas posedanton, por ne diri, ke ĝi bankrotis, kion mi ne povus pruvi. Alvenas la proviĵoj malregule, plenaj je eraroj. Malfeliĉa Hodler rekorektas, plendas, diversfoje faras la vojaĝon, meze inter ĉiuj okupoj pri UEA. Jam en Aŭgusto de la sama jaro „Esperanto“ aperas en Dijon, enirante kion ni nomis inter ni la littukan periodon. Anstataŭ la ses paĝoj ĝisnunaj estas nur kvar, en giganta formato 59×45 cm, la plej granda ĵurnalo svisa, kun sia bela titolo aspektanta pli grava ol la „Times“. De Januaro 1911 la gazeto denove ŝanĝas, sub la influo de la propagando

por la „mondformato“, kaj fine, post multaj penoj Hodler albordiĝas ĉe la presejo Büchler en Bern, kie aperas la unua numero dum Januaro 1913. (La kolektantojn mi atentigas, ke de Junio 1913 „Esperanto“ numerigis pro okaza eraro X-a jaro anstataŭ IX-a, kion oni poste korektis donante al la jarkolekto 1918 la saman numeron kiel al tiu de 1917, nome: XIV.) Kun S-ro Büchler, la specialisto por societaj ĵurnaloj, „Esperanto“ ĉiam restis en plej bonaj rilatoj. Okaze de la morto de Hodler, la presejestro funebris kun ni dirante: „Mi vidis lin nur unu fojon, sed malmultajn homojn mi lernis atestimi kiel lin. Unu post la alia niaj naciaj kaj internaciaj bultenoj malaperis dum la milito, sed ĉiam alvenis la manuskriptoj por „Esperanto“, en ordo malofta, konscience korektitaj per tiu manskribo firma kaj bela, kiu neniel divenigis lian malsanon. Devis esti homo je energio kaj konscienco eksterordinaraj.“

Eksterordinara restas, kiom la multokupita Direktoro de UEA laboris por sia gazeto. Pli ol dektri jarojn (escepte 6 monatojn dum 1914) li aperigis ĝin regule kiel horloĝon; malmultaj estas la numeroj sen unu el liaj rimarkindaj artikoloj, aŭ tradukoj de li modeste signitaj: A. R. Li provis presistojn kaj formatojn, ĝin aperigis kun kaj sen bildoj, aranĝis ponumeran vendadon je kiu li multe perdis, studis plibonigojn pri arango interna

kaj korespondadis kun la kunlaborantoj, kiujn lia kreskanta bonfamo estis alkondukinta. Multe ĉagrenis lin la malregulaĵoj de la poŝta servo, precipe dum la milito. La abonantoj, kiuj plendis pri nericevo de la gazeto estu certigataj, ke neniu sentis tiun perdon pli ol Hodler mem. Kaj la rezultato ekstera? Kiel ĉe UEA, la jaro 1913 rajtigis esperi, ke nun marŝos ambaŭ entreprenoj. La milito ĉion detruis, oni devis rekomenci. Dependanta de sia patro, Hodler estus dezirinta pruvi, ke ankaŭ sia laboro ne estas senfrukta, kaj okaze kalkulis: „Ankoraŭ tiom kaj tiom da pliaj abonantoj, bona puŝo, kaj mi povos viveti.“ Sed lia klara vido ne trompiĝis per iluzioj. Iun tagon, kiam ni kune prenis la kutiman nigran kafon, li pagis por ambaŭ, kun la akra rimarko: „Ni volas fortrinki hodiaŭ la netan profiton de mia ĵurnalo.“

Ekstrakto de liaj artikoloj, indaj je represado, donus volumon. Kaj tamen estis relative malmultaj ĝeneralaj ideoj, kiujn li lerte turnis kaj returnis por konvinki la esperantistojn, kial nia lingvo nur vivas, se ĝi trovas homojn, kiuj ĝin serioze lernas, ĝin uzas kaj scias egalbalanci la mankantan nombron per organizo kaj oferemo.

*

Pli konata eĉ ol kiel redaktoro fariĝis Hodler kiel kunfondinto kaj Direktoro de nia Asocio. Venos la tempo skribi ĝian interesan historion

kiam ĝi troviĝos en situacio pli komforta ol nun, malfortigita per la milito kaj perdo de karaj kunlaborintoj. Sed Hodler kaj lia UEA apartenas tiel unu al la alia, ke ni ŝuldas al lia memoro almenaŭ studi ĝian evoluon internan.

El la aktoj eliras, ke la gepatroj de UEA estas du francoj, S-ro A. Carles en Béziers, nia plej malnova komitatano, kaj S-ro Th. Rousseau el Beaune, falinta por sia patrujo. Ambaŭ renkontiĝas en la unua Hodler-a numero de „Esperanto“ kun siaj proponoj. La plej malnova estas sendube S-ro Carles, kiu interalie skribas: De l' tempo kiam mi, la unuan fojon (1904), skribis al D-ro Zamenhof, proponante la kreon de konsuloj por Esperanto, oni povas vidi kiel grandpaŝe iris tiu ideo. Mi jam ricevis multajn leterojn — ktp. Respondante al mia unua letero, D-ro Zamenhof diris al mi: „Via ideo pri konsuloj povas esti tre utila, se troviĝos sufiĉe da personoj, kiuj bonvolos preni sur sin tiun aferon. Mi konsilas al vi prezenti vian proponon al la kongreso en Boulogne.“ Ĉe la unua kongreso, tiun proponon oni jam tiam ne povis diskuti, sed mi reproponis ĝin en la dua kongreso, kaj la raporton de l'organiza komitato pri tiu temo oni akceptis. Se mi ne prezentis specialan regularon, oni tamen povas konstati, ke mia propono staras laŭ la jenaj principoj:

1. Nenion oni devas fari senpage, por ke la petanto

havu la rajton postuli la petitan sciigon kaj ne peti sciigon, al kiu oni ofte ne respondas. Tial estas necese difini maklerpagon. 2. Estus taŭge, ke centra konsulejo ĉiuŝtata kolektu la nomojn por starigi la konsuladresaron, intersanĝi poŝtmarkojn ktp.“

S-ro Rousseau raportas, ke dum la neaperado de „Esperanto“ li uzis la spacon de „Tra la mondo“. En sia unua artikolo, tie trovita (sur kovrilpaĝo Novembro 1906), kiel en la aludita artikolo en la Hodler-a „Esperanto“, li klarigas sub titolo: „Kelkaj praktikaj aferoj“ kial utilis havi flanke de la Konsulo „Publikan Esperanto-Oficejon“. Ĉar plej ofte oni ne konos la adreson de la Konsulo aŭ ĝenos lin viziti, publika oficejo estos pli alirebla. Ĝi estu samtempe vendejo de esperantaĵoj, surhavu afiŝojn kaj servu ankaŭ al neesperantistoj, por fari tradukojn ktp. Ni aldonu, ke Rousseau publikigis en la februara numero de „Tra la mondo“ (1907) raporton pri „Enketo pri Edukado“, el 15 landoj; jam tiam pritraktante la du ĉefajn temojn: Esperanto-komercado kaj lernado, kiuj, lin okupinte la tutan vivon, fariĝis la objekto de lia lasta raporto antaŭ la glora morto. (6-a raporto de UEA al la Pariza Kongreso.)

Pri tiuj proponoj Carles kaj Rousseau la redaktoro Hodler rimarkis, ke „Esperanto“ laŭforte

celos ilin efektiviĝi, sed ke kelkaj punktoj estas sendube diskutablaj, ĉar la uzado ne ankoraŭ jam montris la bonan vojon. Kiu lin konas, tiun malpli mirigas tiu saĝa prudento ol lia rimarko, „ke konsuloj kaj oficejoj, pagante helpabonon de Fr. 10 al la gazeto, havas la rajton publikigi siajn informojn“. Eble la sukceso mankis, certe forpasis jaroj ĝis Hodler denove kuraĝis peti tian sumegon por siaj entreprenoj.

El la sekvantaj numeroj de „Esperanto“ oni vidas, kiom tiu ideo de praktika agado kaptis la redaktoron. Oni rajtas supozi, ke Hodler rulis samajn pensojn en sia kapo, eble jam publikigis ion en „Esperanto“ de S-ro Berthelot (al mi tute ne konata), eble preferis doni la unuan vorton al samideanoj pli aĝaj. Sekvas de Februaro al Junio artikoloj: „Esperanto kaj komerco“, „Ni uzu Esperanton“, „Kiel uzi Esperanton“ ktp. Helpas lin S-ro Rousseau kaj aliaj, el kiuj la pseŭdonimulo „Ĉiam antaŭen“ proponas Ligon Internacian de Aĉetantoj Esperantistaj. Temas pri komercistoj, hoteloj kaj vendo de esperantaĵoj, tamen Hodler uzas ĉiun okazon ligi tiujn aferojn al la esperantista ideo. Rilate esperantistan statistikon, starigitan en Parizo, li skribas: „Al kelkaj personoj, tiuj nombroj ŝajnas ankoraŭ tre malgravaj; al mi ili ŝajnas tre gravaj, kaj mi ne povas forteni de mi la konkludon, ke, se en ĉiuj de tiuj kvar-

aŭ kvincent grupoj, troviĝus dek personoj, nur dek, kiuj estas serioze deciditaj por uzadi de nun Esperanton, instigi al ĝia uzado, per unu vorto laboradi por ĝi, ĉiu laŭ sia povo, se en ĉiu loko, kaj ne nur en kelkaj, tia fenomeno okazus, la mondo estus baldaŭ nia. — La venko venos tuj kiam oni komprenos, ke nia afero ne estas ia ludo aŭ entrepreno apartigita de la kutima vivo, aŭ ia pure ideala sento, sed ke ĝi devas eniri la kampon faktan kaj praktikan de nia ĉiutaga vivado. Por tio ni bezonas nur kelkajn deciditajn laborulojn, sed neniel milojn da homoj. Ni tial atentu ne nur pri la ciferoj en si mem, sed ankaŭ pri la kvalito kaj vera esperantisteco de la elementoj, kiujn oni enkalkulas kiel esperantistojn.“

Intertempe malfermiĝis en „Esperanto“ kvazaŭ oficiala parto, kun la komunikoj de la „aĉetantoj“ kaj la „Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj.“ La propono Carles pri Konsuloj estis ja akceptita de la Geneva Kongreso, sed — post longa diskuto pri la titolo, nur en la jena formo de ĝenerala konsilo, kiu tre similas honoran enterigon. „La kongreso rekomendas al la Societoj kaj Grupoj, ke ili fondu, en ĉiuj lokoj kie estos eble, Esperantistajn Konsulejojn, kiuj povos, en la landoj, kie tiu nomo ne estus akceptata de la Registraro, ricevi alian nomon, kiel ekzemple „Esperantistaj Agentejoj.“ Pri tio skribis S-ro Carles: „Se la

konsuloj kreigas mem, senkontrole, laŭ la difino de la Kongreso, ni baldaŭ havos disigitan korpon senkapan. — Antaŭvidante tiun okazon, mi petis de l' kongreso en mia propono, la elekton de speciala komitato, kiu zorgos pri tiu organizo — mi bedaŭras, ke tion oni ne faris. Sed tion ja ni mem povos efektiviĝi, laŭ la propra opinio de S-ro Moch. Mi intencas baldaŭ proponi al la jam ekzistantaj konsuloj la elekton de tiu komitato.“ El tiu ideo de konsuloj, kiun la II-a Kongreso ne juĝis inda je elekto de komitato, disvolviĝis UEA!

La proponoj Carles: konsuloj, kaj Rousseau: oficejoj, tre baldaŭ kuniĝis kaj trovis favoran akcepton; ni nur citu S-ron Meyer el La Rochelle kaj S-ron „P. B.“, nian nunan Komitatanon, S-ron Blaise. Okaze de la III-a Kongreso en Cambridge, 1907, jam ekzistis proksimume 200 konsuloj.

Dum Novembro de tiu jaro granda zorgo pezis sur la esperantistaro, konatiĝis la decidoj de la fama „Delegitaro“. La tiaman artikolon „Grava Momento“ Hodler estus povinta skribi antaŭ sia morto. Sin inspirante per la vortoj de Zamenhof mem, li konsideras la fundamenton kiel bazon de la lingva konstruaĵo, kiun ne tuŝu la esperantistoj persone, sed kiu ankaŭ ne estu malhelpo se la esperantistaro konvinkiĝas, ke ŝanĝoj havigos notindan utilon. „Ĉiujn formojn arbitrajn kaj a-priorajn, — pri kiuj la sperto ne montris, ke

ili estas utilaj — la esperantistoj devas nepre malakcepti, ĉar ili rekte kontraŭstaras al la esenco de la fundamento kaj enkondukus tre danĝeran ekzemplon. Sed ĉiujn proponojn utilajn por la pliboniĝo de nia lingvo la esperantistoj devas atente ekzameni kaj prijuĝi sen blinda konservativemeco, ĉar konsideri la fundamenton kiel limigilon de ĉia novaĵo, kiel dogmon ekster kiu nenio estas akceptebla, estas tiel same kontraŭa al la spirito de tiu fundamento kaj de l'elpensinto mem de Esperanto, kiel la opinio de tiuj, kiuj kredas, ke neniu progreso estas farebla dum ni havos fundamenton. Ne, la fundamento, larĝe interpretita, ebligas ĉian pliboniĝon, ĉian saĝan antaŭenpaŝon, ĉar ĝi havas en si ĉiujn vivigajn principojn, per kiuj nia lingvo povos pli rapide kaj pli logike progresadi ol la naturaj lingvoj.“ Al kelkaj mem starigitaj demandoj li kuraĝe respondas: „Jes, inter la nun proponitaj formoj oni povas elekti tiujn, kiuj ne iras rekte kontraŭ la fundamento kaj estas realigeblaj laŭ la maniero, kiun ĝi difinas; jes, estas dezirinde, ke la lingvo internacia, kiu estos ĉefe scienca kaj teknika lingvo, estu kiel eble plej preciza kaj perfekta, ktp.“ Tiu demando, kiel ĉiuj problemoj pli dependantaj de sentoj kaj kredoj aŭ de la pura logiko, restas malfermita. Samideanojn, kiuj kredas lingvon kaj movadon perditaj, se libera homo libere uzas sian intelekton, la vivo

de Hodler povas instrui, kiel bele unuiĝas kritika pensado kun plej sindona esperantemo.

La decido de la Delegitaro, ke la „esperantistaro“ akceptu gravajn ŝanĝojn, ankaŭ devigis al pripenso pri la jurista konstruo de la movado. Kio do estas tiu esperantistaro, kiu rajtas decidi en ĝia nomo? Hodler respondas, ke D-ro Zamenhof fordonis ĉiujn rajtojn, sekve lia aŭtoritateco estas pure morala; la Lingva Komitato ne povas decidi mem pri gravaj demandoj, en kiuj estas egale interesataj ĉiuj esperantistoj; niaj kongresoj reprezentas simple tiujn personojn, kiuj povas viziti la kongresurbon, ili estas grava publika manifestado, kiu nur povas esprimi konsilojn kaj dezirojn. La Centra Oficejo estas pure administra organizaĵo, sekve restas nur la naciaj kaj fakaj societoj, kiuj ne havas efektivan ligilon inter si. „Al la Delegitaro, kiu proponas ion difinitan al la esperantistaro, povas plenrajte kaj oficiale respondi neniun — se registaroj volus enkonduki Esperanton, povus respondi neniun en la nomo de ni ĉiuj.“ — „Kelkaj personoj supozos, ke ni eble deziras restarigi la diversspecajn projektojn de Ligo, kiun la Bulonja Kongreso ne volis. Tiu opinio estas tute ne ĝusta.“ Hodler do proponas, ke grupoj kaj fakaj societoj elektu „Delegitaron Esperantistan“ laŭ difinita proporcio, kiu kunvenas antaŭ aŭ dum kongreso. Ĉiu Delegito rajtu letere voĉ-

doni, kaj por tio oni publikigu antaŭ la kongresoj la ordon de la traktotaj problemoj, por ke la esperantistaro povu ilin mature prijuĝi. — Estas ĝuste tio, kion poste UEA klopodis efektiviĝi. Ĝiaj unuaj Delegitoj estis elektitaj de la grupoj, poste kompreneble elektis ilin la membroj, sed ĉiam UEA atentis pri bonaj rilatoj inter Delegito kaj grupo, inter la estraro de UEA kaj tiuj de la naciaj societoj. De sia unua kongreso, UEA disdonis presitajn raportojn kaj proponojn, kaj ĝis hodiaŭ tiuj kongresoj nete diferenciĝas je la universalaj per tio, ke la universalaj decidas laŭ la impresoj de la kunvenintoj, dum la kongresoj de UEA nur esprimas deziresprimojn, kiujn poste zorge ekzamenas la Komitato kaj submetas al la skriba voĉdono de la Delegitoj.

En Decembro 1907 Hodler sendas do al la esperantistaro sian „unuan cirkuleron“, kies celo, laŭ pliposta artikolo en „Esperanto“, estis jena: „Montri, ke neniu nun havas la rajton enkonduki reformojn per dekreto, ke nur en la okazo, se ia ĝenerala opinio de la esperantistaro inklina al la principo de la reformoj, estus necese konsulti la interesatojn per regule elektitaj Delegitoj, por ke ne okazu tro grava rompo en nia unueco; fine ke estas dezirinde la starigo de internacia organizaĵo, kiu puŝos Esperanton rekte en la vojon de la praktikaj aplikaĵoj, kaj, starigante nian aferon sur

praktika materiala fundamento, fortikigante la ligojn de solidareco inter samideanoj uzantaj tiun lingvon, metante la unuecon de nia movado ne nur sur la fideleco de ĝiaj partianoj, sed ankaŭ sur la utileco al ili de tiu ilo, kiun ili penas diskonigi, ŝirmos por ĉiam nian entreprenon kontraŭ ĉiuj danĝeroj kaj ĉiuj atencoj.“ Al tiu cirkulero ne malpli ol 108 grupoj kun entute 828 personaj subskriboj favore respondis.

Cetere baldaŭ malfortiĝis la ventego da proponoj kaŭzita per la kruda procedo de la Delegitaro; tre multaj grupoj kaj la Lingva Komitato estis malaprobintaj la ŝanĝojn, kaj en sia cirkulero-letero D-ro Zamenhof montris, kial ĉiuj rilatoj kun la Delegitaro, postulinte „tujan akcepton de ĝiaj decidoj“, devis esti interrompitaj. Hodler rimarkis: „La danĝero do feliĉe forpasis; kontraŭ la fortika unueco de la esperantistoj rompiĝos sensukcese ĉiuj personaj atakoj; sed, kiel post ĉiuj danĝeroj, oni nun sin okupas pri la mankoj, kiujn al ni montris la batalo. Tra la esperantistaro iras nun la deziro al pli da efektiva unueco, pli da ordo en nia agado, pli da praktikeco en nia movado.“

Dum la vintro 1907—1908 planoj kaj proponoj rapide evoluas al neta formo. Aperas dum Decembro 1907 la unua broŝuro de la „Kolekto de Esperanto“ pri „Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj.“ Ĝi resumas ĉion kio estas utila por elekti

konsulojn kaj starigi oficejojn, konforme al la decidoj de kunveno kiun aranĝis la iniciatintoj en Cambridge. Subskribas la antaŭparolon: „La raportintoj: Carles, Hodler, Meyer kaj Rousseau“.

En „Dua cirkulero“, forsendita en Februaro, „Iniciatintoj, Rue Bovy Lysberg, Genève“ klarigas la „Internacian Organizaĵon Esperantistan“, kiu celas: „1. Puŝi nian aferon en la vojon de la praktikaj aplikajoj per kreado de diversaj internaciaj servoj per Esperanto. 2. Krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslandaj samideanoj kaj doni al nia afero praktikan fundamenton.“ Jam la 1-an de Marto aperas en „Esperanto“ la unua listo de la aliĝintoj. 11 grupoj, ses francaj, kvar germanaj kaj tiu de Krakovo elektis Delegitojn, inter kiuj troviĝas la nomo de nia ankoraŭ funkcia Komitatano, S-ro Rockmann en Magdeburg. „Tria cirkulero“, fine de Marto, jam submetas al voĉdono de la Delegitoj „Provizoran Regularon de Universala Esperanto-Unio“, nomo, kiu sur nia ekzemplero estas manskribe ŝanĝita de Hodler al „Asocio“. Sed en la teksto daŭrigas la UEA.

Ĝis la 28-a de Aprilo 1908 alvenis 59 respondoj, el kiuj 57 aprobantaj. Tiu estas la oficiala dato de la fondiĝo de UEA. La 1-an de Majo aperis en „Esperanto“ la unua oficiala informilo pri „Universala Esperanto-Asocio“, kun tiu voĉdono, la provizora regularo kaj la Komitato.

Gi konsistis el la sinjoroj: Fako I, Administrado: H. Bolingbroke-Mudie, Komitatano, kaj H. Hodler, Helpkomitatano; Fako II, Esperanto-Konsuloj kaj Oficejoj: Komitatano A. Carles, Helpkomitatanoj Th. Rousseau, S. Meyer, R. Mesny kaj P. Blaise; Fako III, Turismo: Komitatano J. Schmid, Helpkomitatano D-ro Whitaker.

*

Malgraŭ la malmultaj dokumentoj en miaj manoj, — Hodler ne estis kolektanto de io ajn — mi pritraktis tiun interesan periodon iom detale, tiel por ke lia rolo ekvidiĝu el la faktoj, kiel ĉar la tiam prikonsideritaj problemoj konservis ĝis hodiaŭ sian gravecon. Iuj diros, ke estas la sorto de ĉiuj fundamentaj principoj, esti firmaj kaj samtempe ĉiam reekzamenataj de publika opinio, — aliaj pretendos, ke la esperantistaro neniam kuraĝis tiri la sekvojn el veroj sufiĉe precize rekoneblaj, — ni ne ekzamenu. Hodler priskribis sian propran rolon en „Esperanto“, Aprilo 1918, dirante: „Ni spertis, ke la pure predikema propagando ne sufiĉas: post nedaŭra entuziasmo multaj varbitoj forlasos nian aferon, ĉar ili ne scias tiri ian utilon el Esperanto. — Fine, aliĝinte al Esperanto precipe ĉar ni vidis en ĝi efikan ilon por la alproksimigo de la popoloj kaj ilia paca kunlaboro, ni opiniis, ke ankaŭ en tiu rilato internacia organizaĵo

sur neŭtrala fundamento de esperantismo povas ludi utilan rolon.“

Mi ne kredas trograndigi dirante, ke la merito de Hodler konsistis en tio, ke li sciis kunigi sub unu tegmento la diversajn proponojn kaj provojn de praktika agado; ke per siaj belaj artikoloj li vekis la energion de la esperantistoj; kaj ke li donis al tiu nova organizo altan celon: „Krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslingvanoj“. De la unua tago ĝis hodiaŭ beligas tiu frazo la statuton de UEA, esprimante en seka prozo kion skribis nia majstro:

„Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, forto, ne lasu nin fali,
Sed lasu nin venki la baron!“

La plimulto de la esperantistoj ĝojis pri tiu bela nova entrepreno; „sed“, kiel skribas Hodler, „ĉe kelkaj tiamaj gvidantoj de nia movado ĝi vekis nur tre moderan entuziasmon. Iuj timis, ke tiu nova organizaĵo sin okupos pri lingvaj demandoj; aliaj, ke ĝi volas direkti la propagandon kaj anstataŭi la ekzistantajn societojn; iuj, ke ĝi konkurencos la naciajn societojn; aliaj, ke ĝi estas kreaĵo de senaŭtoritataj junuloj (prava riproĉo!) ktp. Mi memoras, ke tiama „eminentulo“ eĉ intencis sendi al mi serion de artikoloj por pruvi, ke

tia organizaĵo estas tute neebla. — Unuvorte, ni renkontis ĉe kelkaj gvidantoj tiun saman rutinon, kiujn ili riproĉas al la kontraŭuloj de nia afero. Anstataŭ polemikadi, ni juĝis pli saĝe iri antaŭen kun tiuj, kiuj komprenis kaj fidis nin. Respondo per faktoj estas ĉiam pli konvinkiga ol respondo per teoriaj artikoloj.“

Senpartia ekzameno devigas rekoni, ke diversaj timoj estis ne senkaŭzaj, ankaŭ ke UEA sukcesinta notinde diferencas en sia organizo de la tiama asocio, ekfondita, kritikita. Mirinde bone Hodler klarigis la celojn, tiel ke ĝis hodiaŭ tiuj paragrafoj plene valoras; same restis pli malpli sensanĝe la sistemo de Delegitoj, kaj honorigis la Komitaton per siaj nomoj diversaj samideanoj, jam tiam favore konataj. El ili ni nur citu S-ron Bolingbroke-Mudie, la organizinton de la kongreso en Cambridge, kiu akceptinte la prezidantecon de UEA garantiis la seriozecon de l'entrepreno. Sed devis mirigi prisocietajn spertulojn la kotizaĵo de 60 centimoj, la komplika divido laŭ fakoj, kiel la multnombraj taskoj, kiujn tiu juna asocio ŝarĝis sur sian dorson. Hodiaŭ oni dirus, ke la fondintoj trompiĝis pri la laboro, tempo kaj mono necesaj. Nebezonante ripeti la enuigan veron, ke troa prudento nenion kreas, oni povas klarigi tiujn erarojn el la tiamaj cirkonstancoj. Hodler, kun siaj iom pli ol dudek jaroj, bone agis disdoninte

gravajn kompetentecojn al personoj pli aĝaj. Ĉi tiuj, ĝis tiam dediĉinte siajn liberajn momentojn al diversaj esperantistaj aferoj, verŝajne supozis, ke la nova prifaka okupo ne prenos pli multan tempon kaj estos pli efika. Ĉiuj, gravedaj je planoj kaj laboremo, vidis kvazaŭ la ĉielon malfermitan kaj promesis multe por malmulte da mono, konforme al la, ni diru tiama, animstato de la esperantistaro.

La „respondo per faktoj“, kiel diris Hodler, ne atendiĝis. Frapo post frapo aperas liaj trafikaj artikoloj pri la agado de la nova Asocio. Rapide estas elektataj Delegitoj, aranĝataj oficejoj ktp. Jam en Julio UEA estas honorigata je oficiala salutletero de la Brita Kongreso en Londono kaj ricevas jenan gravan skribaĵon de nia Majstro:

„Kara sinjoro!

Kun plezuro kaj danko mi ricevis la diversajn specimenojn, kiujn vi sendis al mi. La rapida kaj bonega disvolviĝo de la UEA min tre ĝojigas, kaj mi esperas de via Asocio tre multe da bono por nia tuta afero. Mi kore deziras al UEA la plej bonajn sukcesojn. Vian afablan inviton, ĉeesti en Dresdeno en la solena malferma kunveno kaj en unu el la laboraj kunvenoj de via Asocio, mi akceptas kun plezuro. L. L. Zamenhof.“

Ĉu, tiel afable kuragigante Hodler, nia Majstro eble pensis al letero de li adresita la 2-an de Oktobro 1905 al la tiama prezidanto de la Svisa Esperanta Societo? En ĝi li skribis:

„Kun granda plezuro mi legis en via letero, ke la svisaj esperantistoj decidis inviti la 2-an kongreson en Svisujo. Tre bone, bonege! Svisujo, kiu, ne havante ian nacian lingvon, estas la plej neŭtrala lando en la tuta Eŭropo, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale homa, kaj mi esperas, ke tie ĉiuj esperantistoj sentos sin bonege. Mi eĉ antaŭvidas, ke venos iam la tempo, kiam Svisujo fariĝos la natura konstanta centro de la tuta esperantistaro.“ (Publikigita en „The Esperantist“, London, vol. II, N-ro 11.)

Por la tiama kongreso en Dresdeno, Aŭgusto 1908, la Turisma Fakestro de UEA, S-ro Schmid, aranĝis kvar bone sukcesintajn karavanojn kun 200 partoprenantoj; okazis la unuaj kunvenoj de nia asocio kaj estis disdonita la jarlibro. Tiu unua eldono jam enhavas kvin specojn da konsuloj, tri specojn da Delegitoj, helpantojn por tradukado, Esperanto-oficejojn ktp. La membraro sumiĝas je 1223 „esperantianoj“.

La supron de la gloro de tiu organiza periodo UEA atingis dum somero 1909. Ne malpli ol ok memstaraj fakoj, gvidataj el diversaj lokoj: Administrado: Hodler, Genève; Financoj: Rousseau,

Beaune; Konsuloj: Carles, Béziers; Oficejoj: Blaise, London; Turismo: Schmid, Bern; Komerco kaj Industrio: Kandt, Bromberg; Junuloj: Rockmann, Magdeburg; Aerveturado: Roy, Moresnet-Neutre. Plie troviĝas en la listo: Alta Konsilantaro, je kvin membroj; Jura Konsilantaro, kun trimembra Komitato kaj naŭ Vicprezidantoj; la diversspecaj Delegitoj, Konsuloj ktp. Oni havas insignojn, oficialan leterpaperon, belajn kontojn por ĉiu Delegito laŭ spesmila sistemo, membrokartojn konforme al numerigado de la Bibliografia Instituto en Bruselo, kion vi volas plu?

Por tia entreprenego dekduo da oficistoj estus ĝuste sufiĉintaj. Kion mi trovis alveninte en Genevo por helpi Hodler-on? Ĉambro-keston malgrandan, je ordo kaj pureco en miaj okuloj dubaj, kun kelkaj krudaj abiaj tabloj kaj bretaro laŭlonge de unu muro. Ĉe la fenestro Hodler; unu oficisto rusa, inteligenta kaj malordema; en la malantaŭa fundo du pliaj samideanoj, ne forigeblaj eternaj vizitantoj, kiuj per ĉiama babilado supozeble kredis inspiri la oficejon. La unua tasko al mi donita skribi titolojn sur kovertoj, ne tro rilatis al miaj faritaj universitataj studoj, sed baldaŭ poste, kiam Hodler forvojaĝis al la kongreso en Barcelono, li honorigis min je sia konfido, transdonante la intertempan „estrandon“ de la oficejo kaj — la kason. Estis lada kesteto kun aro da

arĝenteroj kaj koncerna libreto kun notoj pli bonintencaj ol uzeblaj. Kelkajn monatojn poste, en Rue de la Bourse, la oficejo jam aspektis pli oficeje, dank' al skribmaŝino, malnovaj mebloj donacitaj kaj novaj bretaroj ne-pentritaj. La malfermo konsistis en plenkora ridego pri komercvojaĝisto nin honoriganta je sia vizito la unuan tagon: la malfeliĉulo tiom serioze kaj elokvente rekomendis ferajn monŝrankojn en ĉiuj grandoj, garantiitaj per atestoj de bankoj, ke li ne ekkomprenis nian ĝojon.

Alvenis pliaj oficistoj, bonaj kaj malbonaj, honestaj kaj aliaj, ĉiam tre malalte pagitaj, ĉiam nesufiĉaj laŭ nombro. Laboris ili, laboregis Hodler, tamen la tro bela konstruaĵo estus disfalinta sen la radikalaj ŝanĝoj de la organizo kaj labormetodoj, entreprenitaj kiam jam aŭdiĝis la krakado de la surŝarĝitaj traboj. La ĉefaj punktoj estas pritraktitaj en la raportoj al la kongresoj en Augsburg 1910, Antverpeno 1911, kaj Krakovo 1912. Per nova statuto, 1 Oktobro 1910, oni forigis la sistemon de memstaraj fakoj, donis al la Komitato la ĝeneralan gvidadon de la Asocio kaj komisiis la oficejon koncentri la disigitajn klopodojn. Ne ĉar la ĝisnunaj fakestroj estus malfervore laborintaj, kontraŭe; sed la praktiko estis tro klare pruvinta la neeblecon, agadi por la sama asocio, por la samaj membroj, el ok diversaj urboj. La

leteroj, demandoj, proponoj, pagoj tamen alvenis ĉefe al la Geneva oficejo, sekve estis notinde pli simple ilin prizorgi tie aŭ ilin dissendi, post zorga esploro de la kompetentecoj, al unu aŭ pluraj fakestroj. Al tiuj sinjoroj, kiel al Hodler, la administra korespondado forrabis valoran tempon. La nova statuto ilin malŝargis, dum pro ilia ofico de Komitatanoj restis al ili ĉia ebleco kontroli kaj plibonigi la servojn. Rilate simpligojn, la kongresoj 1911 kaj 1912 ĉefe okupiĝis pri nia financa mizero. Dank' al kotizaĵo tro malalta, 60 centimoj dum 1908, 90 centimoj dum 1909 kaj 1910, 1,25 Frankoj dum 1911 kaj 1912, UEA havis en 1912 pli ol 5000 Frankojn da ŝuldoj, sumo por tiama tempo grandega. Feliĉe, kaj estis plej lasta tempo, tiu kongreso en Krakovo akceptis la tiel nomitan „financan reformon“, nome kotizaĵon de 2,50 Frankoj kaj atestojn de Garantiantoj po 125 Frankoj. Sen la milito UEA estus verŝajne restinta ĉe tiuj prezoj — kaj povus ekzisti per ili!

Kompreneble tiuj kongresoj ankaŭ multon kreis, anstataŭante malnovajn aranĝojn aŭ servojn per novaj, pli bonaj, aŭ tiel ŝajnantaj. Sed kun la grandiganta sperto ĉiam pli kreskis ĉe Hodler saĝa atento, ne entrepreni pli multe ol estis efektivebla. Mi rajtas diri, ke malmultaj ideoj kombinablaj kun la esperanta movado ne estis serioze

priparolitaj inter ni ambaŭ. Sekve, se al proponitaj sugestoj pri io „tute nova“ alvenis aŭ alvenas respondoj de UEA, malpli entuziasmaj ol la skribinto esperas, tio havas kaŭzon. Farinte sufiĉan kvanton da bonintencaj malspritaĵoj ni mem, vidinte la malsukceson de tiom da entreprenoj naskigitaj kun reklamo kaj bondeziroj, ni fariĝis prudentaj.

Kiel evoluis UEA, facile vidiĝas el ĝiaj presaĵoj; pli interesas priskribi la cititan ŝanĝon de labormetodoj. La netaŭgeco de diversaj el ili parte devenis de la faka sistemo; parte de la sensperteco de Hodler, kiu, malfermata al ĉiuj novaj ideoj, propravole aŭ cedante al deziroj de aliaj personoj akceptis malpraktikaĵojn. Cetere UEA tiel rapide evoluis, ke la oficejo, kvazaŭ malriĉa infano, preskaŭ daŭre surhavis pantalonojn tro mallongajn por siaj kruroj. Ekzemple la membrokarto laŭ bibliografia sistemo. Iu teoriulo estis dividinta la mondon laŭ podeka cifera sistemo: 4 estas Eŭropo, 0,4 = Francio, tria 4 montras sud-orientan Francion, plia 3 estas departemento Saône et Loire, ktp. La bela cifero: 44.434,2 sekve montras certan sudfrancan urbeton. „Kuraĝe antaŭen“ nia oficejo disdonis al ĉiuj Delegitoj numerojn, nototaj sur la membrokarto, kiujn tiam ili forsendis mem. Bone se ni sciis la provincon aŭ distrikton, pri la resto restis la espero, ke ili mem trovos. Imagu la korespondadon de De-

legitoj kaj membroj petantaj la ĝustan numeron, rigardu Hodler kaj la oficistojn traplugantaj la malbenitan ciferlibron komplikan. Baldaŭ neniu plu eliris, en rapideco ni estis donintaj malsamajn ĉefnumerojn al najbaroj, aŭ fuŝis la Delegitoj, ĝis fine Hodler, malesperante, kriis mem: „donu iun ajn numeraĉon, mi ne havas perdotan tempon!“ Tiel forta estis tiam la modo de „podeka sistemo“, ke necesis kelkan tempon por retrovi la malnovan veron kiel pli simple estas la geografio laŭ nomoj. Pli poste venis la divido de Eŭropo laŭ distriktoj esperantaj, ankaŭ geografia laboro penplene kun mezvalora sukceso. Sur la papero la retaro de la Delegitoj kun la Distriktuloj kiel ĉefnodoj prezentigis perfekte, en realeco restis proksimume kiel antaŭe: areto de sindonaj Delegitoj konsilis kaj gvidis la najbarajn el propra kompetenteco, dum kie mankis laboremo al distrikta Delegito, ne plibonigis lin la titolo. La ideo, bona en si mem, devos esti realigata tiel, ke oni nur elektos Distriktan Delegiton, kie troviĝas speciale taŭga reprezentanto kaj difinos la limojn konforme al lia agadpovo.

La malbonaĵo, plej grava en siaj sekvoj, estis la kontrolo de la membroj. Neniam trovinte ion similan, mi devas supozi, ke ĝi devenas de homo rimarkinde malpraktika aŭ de sugesto pri la jura situacio de societanoj, malbone komprenita de juna

Hodler. Ĉar membro ŝuldas, ĝis formala ekŝigo, la kotizaĵon de la proksima jaro (la artikolo plej malfacile aplikebla en ĉiuj societoj) UEA malfermis specialan konton al ĉiu Delegito, debitigis lin por ĉiu aliĝo dum la kuranta jaro, kaj eĉ — lin debitigis je la jarfino por la sama nombro de estontaj kotizaĵoj. Se dum tiu sekvanta jaro li anoncis entute pli multajn membrojn, oni ree debitigis, se li anoncis malpli, kreditigo! Mallonge, estas kiel ŝtato unue debitigus la loĝantojn por la pagotaj impostoj, kaj poste ordigus en tia librotenedo per debitoj kaj kreditoj la diferencon inter la sumoj atenditaj kaj ricevitaj. Laŭ statistiko de 1910 ekzistis ne malpli ol 840 tiaj kontoj, tiom malgravaj, ke preskaŭ la triono de ili montris dum somero saldon ne pli grandan ol 2,50 Fr. kaj ke la mezo de la enpagoj po konto apenaŭ superis 10 Fr. Oni imagu al si la laboron, la korespondadon regulan kiel tiun pri la multegaj neeviteblaj eraroj, kiel la agrablecon esti responda por tia fuŝaĵo. De 1910 al 1911 la tuta afero estis ŝanĝita; post kelkaj provoj troviĝis sistemo de duobla librotenedo taŭga por niaj bezonoj; dum la vintro 1912 oni enkondukis novan membran kontrolon sur proksimume 13000 kartoĵoj (unu laŭnombra kaj unu alfabeto po persono); kaj en Februaro 1913 ni solene forigis la spesmilan kalkuladon, kun kiu, post longa uzado, ni faris ĉiam

la plej eble malbonajn spertojn. Kiam ni jetis ĝin super la bordon en la meritatan profundaĵon, la tuta oficejo estus ĝojinta, se — samtempe ne estus forkurinta la kasisto. Tragedieto nin multe enuiginta malpli pro la mono ŝtelita ol pro la interrompo de la librotenado, la serĉado de nova oficisto kaj lia instruo. Alveninte el Bern en Genevo, mi tuj iris kun Hodler al la polico. Niaj klaraj diroj kaj libroj ne sufiĉis, oni postulis skriban raporton. Mi redaktis ĝin esperante; Hodler, ne kutimata je oficiala stilo, penplene ĝin tradukis francen, pro troa malpacienco surverŝis la inkujon, ĝin reskribis, kaj fine sendis fiere al la polico. Du semajnojn poste la polico trankvile demandis pliajn skribajn detalojn! „Adiaŭ kara kasisto!“ Li estis longatempe promeninta en Genevo, sed ne plenajn tri semajnojn.

De la jaro 1913 la cirkonstancoj iom post iom pliboniĝis; organizo kaj laborsistemoj kun tiom da peno elprovitaj pruviĝis bonaj, anstataŭ plendleteroj pri malordo alvenis belaj kotizaĵoj, kaj pleniĝis la oficejo je sindonaj oficistoj. Tiam, kiom tro malfrue! Hodler povis pli atenti sian sanon. Somere li iris al la kamparo, tamen ne multe utilis tiaj restadoj mallongaj, ŝarĝitaj per la laboro prepari la kongreson, interrompitaĵoj de la kongreso mem, kiu denove estis penado ĝuste dum la sezono, kiam aliaj mortuloj ĝuas liberecon.

La militeksplodo, surprizinte la asocion en plena agado por la „Deka“, efikis la subitan foriron de la plimultaj oficistoj. Tuj Hodler alkuris. Ne esploru kun kiaj sentoj li denove okupis sin pri administraĵoj, penado lin tiom suferiginta multajn antaŭajn jarojn, ke li malamis ĝin pli kaj pli. Li sukcesis starigi servon por interŝanĝado de leteroj, kiu favore konatigis la oficejon kaj alportis al la kaso belan enspezon de respondkuponoj. Kompare kun aliaj, ni tamen estis modestaj postulante 50 centimojn por perado, kiu sen la laboro kostis al ni minimume 25.

La plia trankvilo en la agado de UEA permesis al Hodler koncentrigi siajn pensojn al la interŝtataj problemoj, kies teruran gravecon konfirmis la ĉiutagaj novaĵoj el la batalkampoj. Komencis, se la esprimo estas permesata, lia „sciencia periodo“. Kiel rakontite, li redaktis kun amiko Privat „Junan Esperantiston“ en la lernejo, kaj tuj reprenis „Esperanton“ elirinte. Ne multe pezis do lia sciencia havaĵo. Dek jarojn poste oni estus tiurilate lin ne plu rekoninta. Havante pruvojn en manoj, mi pretendas, ke je la fino de sia mallonga vivo Hodler estus povinta taŭge plenumi oficon de privat-docento por siaj aferoj. Ne nur li legis, inteligente legis, amason da gazetoj kaj revuoj, sed kiel abonanto al diversaj bibliotekoj li trastudis multajn volumojn pri historio, ŝtataj aferoj, socia

agado, psikologio ktp. Kiel kutime oni penigis lin en la lernejo per germanaj klasikuloj tro malfacilaj; poste, per propra laboro, li lernis bone kompreni abonitan german-svisan ĵurnalon kaj ne tro krudajn prisciencajn publikaĵojn. Kun plia ekzerco, li tro ĝenis sin, li estus sufiĉe bone parolinta tiun malfacilan lingvon. Li ankaŭ legis kaj komprenigis sin en itala lingvo, iomete konis la anglan, kaj pro plezuro ekstudis eĉ la rusan alfabeton.

Dum 1915 mi vidis lin diktantan sciencan tezon. Leviĝis la vualo, kiam en 1916 li sendis al ekzameno maŝinskriban verkaĵon je 378 paĝoj, prespretan, sed sen titolo. Estas forte dokumentita kaj pripensita franclingva traktaĵo pri paca organizo de la popoloj. Ĝiaj kvar partoj nomiĝas: La problemoj; la solvoj de la pacifistoj; la solvoj de la federalistoj; la metodo, kiun lasta parto finas per ĉapitroj: la nova idealo, la nova agado, la packontrakto. En la komenco li deklaras, ke tiu verko ne rilatas al la milito, ĉar kiel ajn ĝi finos, kiaj estis la personaj respondecoj de diversaj ŝtatestroj, „la ĉefa kulpulo estas la internacia anarĥia malordo de kiu la milito estas neapartigebla. Kiel malmoralaj, kiel senigataj je konscienco estis certaj politikistoj, ili ne estus povintaj malutili, se la civilizita mondo estus organizita favore de l' paco anstataŭ por la milito.“

Havinte la malgajan taskon travidi la multajn manuskriptojn de la kara mortinto, mi trovis plurajn eldonojn de tiu verko, kies perfektigo lin multe okupis. Bedaŭrinde ĝi aperis dum malfavora epoko. Francio, meze en la milito, havis taskojn pli urgajn, kaj la francsvisaj eldonistoj tro dependis de la franca legantaro por riski la elspezojn de la presado. Ankaŭ la nomo de Hodler estis tro malmulte konata ĉe la granda publiko. Satis lin multe kelkaj internaciaj societoj, al kiuj li liveris okaze artikolojn, sed sian vivon li estis plene dediĉinta al Esperanto, kie ne amasiĝas laŭroj. Kiam li ankoraŭ traktadis kun libristoj, jam venis la unuaj proponoj de prezidanto Wilson, fortirantaj la atenton en alian direkton.

En tiu bela verko la legantoj de „Esperanto“ rekonu la fonton de multaj rimarkindaj artikoloj. Kelkaj ĉapitroj jam estas surpasitaj de la okazintaĵoj; la ĉefa parto, kiun ni rajtas konsideri kiel la spiritan testamenton de Hodler, meritis esti bele presata en la lingvo paciga, de li amegata.

Pli ol antaŭe Hodler sin okupis dum tiuj jaroj pri lingvaj demandoj — okupo, pro kiu oni preskaŭ faris al li riproĉon. Ne sole li uzis sian bonan esperantistan rajton, ne sole li simple daŭrigis tradicion el la unuaj jaroj de sia gazeto, li ankaŭ estis pli sperta ol multaj kritikantoj. Profunde li konis la lingvon, dek jarojn li staris meze en

la movado, kaj el sia loĝloko li povis pli facile kontroli la konkurencon. Malagrable estis konstatita, kiajn dikajn vortarojn kreas aliaj, dum ĉe ni oni ankoraŭ disputas pri la malbona organizo de la Lingva Komitato, nenion laborinta dum la militepoko. La dumviva celo de Hodler estis kunigi la lingvon kaj ĝian uzadon, unu adaptante al la alia. Siatempe farinte ŝuojn, kiujn la movado pli bezonis ol artaĵojn, li devis sin senti ofendita, ke, laŭ la fablo de Apelles, oni kvazaŭ volis forpuŝi lin de pentraĵo, kiel nuran „ŝuiston“. Tiel obstineco de unu flanko ankaŭ malmoligis lian kapon. Multe tro inteligenta por kredi sin senerara, li certe estus kun la tempo aliformiginta proponojn ne plaĉintajn, kiel li forigis netaŭgajn administrajn metodojn. Kara Hodler, nun dormas; daŭros kaj devas daŭri amikaj disputoj pri la esperantismo, movado vivanta, sekve ŝanĝanta. Kiel li estus pardoninta, ankaŭ liaj kontraŭuloj en tia kaj aliaj demandoj pardonos okazajn liajn ekscitojn, kun ni funebrante pri lia perdo.

*

La ekstera vivo de Hodler rakontiĝas en kelkaj linioj. Loĝante en meblita ĉambro post la morto de sia patrino, li estis atakata la unuan fojon de pulmmalsano, tiel ke ni timis por lia vivo. Li iom resaniĝis, kvankam de tiam agiĝis nur pri

pli aŭ malpli da malforteco, ĉar restis en li la germo de la morto. Longan tempon li okupis ĉambreton en nia oficejo: fera lito, kelkaj tabloj kaj seĝoj krakemaj, areto da libroj, malmultaj personaj memoraĵoj, jen ĉio. Li vivis el modesta rento de sia patro, kiu malŝatis, ke la filo malŝparas siajn talentojn je „fantazia afero“, sen certa estonto kaj ekzistebleco. Por lin kontentigi Hector iomete pentris kun sufiĉa lerteco; sed kiel vera filo de obstina patro, li fosis sian propran sulkon, kien lin kondukis inklino kaj la sento de l' deo, oferante la personan estonton al tiu de l' esperantismo. Liaj malsanoj, kiel la respekto, kiun lia nelacigebla laboro devis influi al la patro, plibonigis la reciprokajn rilatojn, sekve la vivtenadon de la filo. Post longa fianĉiĝo li edziĝis 1918, baldaŭ poste luprenante loĝejon en la monta kuracloko Leysin. Ne malmulte mi ĝojis konstatinte, kiel la antaŭa duoncigano estis transformiĝinta je atentema edzo en tre komforta ĉirkaŭaĵo. Malgraŭ ke li estis preskaŭ perdinta la voĉon kaj pasis siajn tagojn skribante sur kuŝseĝo, mi sentis lin feliĉa. Transdoninte la oficejajn priokupojn al aliaj manoj, esperante, ke la spertoj el la milito malfermos la okulojn al la homoj, li intencis ankoraŭ multe labori por la interpopola alprokisiĝo. Varman dankon al lia edzino, kiu per sindono malofta kaj zorga flegado tiom pli-

beligis la lastajn jarojn de nia amiko. — Escepte lia kvazaŭ profesia vizito de ĉiuj esperantistaj kongresoj kaj malmultaj vojaĝoj al Italio kaj Francio, Hodler ne vidis fremdajn landojn. Kiom bone li konis ilian mentalecon, tion scias liaj legantoj. Fartinte laŭŝajne pli bone dum Februaro de tiu jaro, li preparis ĉion por translokiĝi proksime de Lausanne, kiam li devis foriri por ĉiam.

Sian laboremon kaj ekkolereman temperamenton Hodler havis de la patro, supozeble ankaŭ el la patra gento herediĝis la terura tuberkulozo, tiom disvastigita en nia lando. De la patrino devenis la natura delikateco, kvazaŭ neinstruita bonedukiteco, kiu kontrastis kun lia pli ol simpla, okaze nezorgita eksterajo. Dum sia malfeliĉa juneco li lernis suferi, observi, silentante. En la 11 volumoj de nia korespondado, troviĝas simplaj aludoj je operacioj kaj senkulpigoj, kial li ne povis labori, sed neniu plendo, neniu riproĉo. Nur unufoje, rakontis al mi lia edzino, kiam subite li fariĝis riĉa, li malgaje enkovertigis la hereditajn valorpapirojn, dirante: „Tiu tuta mono ne reaĉetos unu el miaj ruinigitaj pulmoj.“ Oni ne rajtus diri, ke li estis melankolia; li vivis en tiu gaja seriozeco, observebla ĉe forte laborantaj personoj, rilatante kun la mondo pli per siaj ideoj ol per sia persono. Ofte li faris bonegajn spritaĵojn; okaze li kore ridis, neniam mi vidis lin legi kun

plezuro amuzajn ĵurnalojn. Mankis al li la facilanima spirito. Prenu ordinaran komercvojaĝiston, belvestitan, grasan, kiu ridigas tutan societon, aŭ ĉe botelo da vino klarigas, kiel Dio estus devinta krei la mondon, kiu ĉion povas, scias kaj ĉion vidis, — poste returnu tiun personon en sian malon de komenco al fino, kaj vi havos Hodler. Liaj kapabloj estis ĉefe tiuj de eminenta ĵurnalisto: rapida kompreno de gvidantaj ideoj, facileco je klara aranĝo kaj skriba esprimo, enviinda kapablo ĉiam esti ĝustatempa. Ne sklavo aŭ eĉ nur servisto de bonordo, li vivis kun la kalendaro en la kapo. Zorge pripensitaj artikoloj alternis laŭ la cirkonstancoj kun aliaj, rapide ĵetitaj sur la papero, sed je fiksa dato Hodler estis nepre preta.

Kun la respekto, kiun influis lia supera inteligento kaj laboremo, estas lia reguleco, kiu starigis lian altan aŭtoritaton en la oficejo. Tro timema por estri, — la agrablan taskon maldungi oficistojn aŭ forpeli altrudemajn vizitantojn li prefere donis al mi, — sen intereso por la mastrumaj bezonoj de la ĉiutaga vivo, li estis la mastro de ĉio, per la forto de sia karaktero. Pripensema, li turnis kaj returnis la aron de siaj ideoj por trovi la ĝustan solvon. Estas el miaj plej agrablaj memoroj tiuj multhoraj noktaj promenadoj, dekfoje unu straton dekfoje alian, kiam ni priparolis la novajn statutojn, la hotelan

servon, aŭ aliajn planojn esperantistajn, aŭ konstruis pro amuziĝo fantaziaĵojn. Same belaj estis liaj koleroj. Iam li venis malkontentege el esperanta kurso, kies gvidadon li estis bonkore akceptinta, ne konante sin mem. „Stettler, estas nura bando de malsprituloj, daŭrigu ĝin, mi ne plu iros.“ Rapide pensante li ne povis toleri, se iu ne povis sekvi, same lin ekscitis la malhelpetoj de l' vivo, ĉe li despli oftaj ke li ne estis modelo de praktikeco. Miaj proponoj ne ĉiam plaĉis; precipe pri presaĵoj, formuloj aŭ aliaj detaloj, gravaj por la funkciado de UEA, okazis akraj disputoj inter ni, kvankam neniam personaj. Baldaŭ, Esperanto vere ne taŭgas al tio, ĉiu refalas en sian hejman lingvon, unu pli kriante ol la alia, ĝis post unu, du minutoj ni ekridas. Unu cedas, aŭ ŝetita monero decidas. Sed iun tagon, kiam plej malkontente mi ensaltis lian pardonon: „Hodler, kiu malspritulo fabrikis tiun sensencaĵon“, li rigardis min en la okulojn, trankvile respondante: „Oh, mallaŭdu kiom vi volas, hodiaŭ mi ne emas koleri!“

En Hodler ĉio koncentriĝis en lia laboro, utili, for de la homoj, al la homaro. Neniam lerninte la agrablan arton de „konversacio“, li restis eble plej malproksime de ĉio, kio nomiĝas salono, invito aŭ festo. Multaj vizitantoj de l' oficejo tial ne havis de li la veran impreson, kelkaj nur tiun, ke la Direktoro forestas. Intertempe Hodler estis

forkurinta en sian ĉambron aŭ en kafejon, tie el-laborante artikolon, kiun, revenante, li gaje eltiris el unu el la sennombraj poŝoj de sia surtuto, ĉiam ŝargata je papero kiel rondiranta librejo. Aliaj, dum ili parolis pri la bela vetero, sentis, ke liaj ideoj estis tute alilokaj, aŭ rimarkis kun malkontento la foreston de formoj aŭ titoloj, je kiuj ili kredis sin rajtigitaj. Kiu lin konis aŭ sciis trafi en la celon de la pensoj lin okupintaj, tiu forlasis la ĉambron, riĉigita per novaj ideoj. Iom simile estis kun Hodler kiel paroladisto; ne mankis al li facila esprimkapablo, sed pro la multeco de ideoj aŭ la komplikeco de la formo lia parolado similis al artikolo, sekve ne kaptis sufiĉe rapide — aŭ li ekscitiĝis, tiel pli malkontentigante ol konvinkante la kontraŭulojn. Tial li kaj Bolingbroke-Mudie, tiu naskita prezidanto, bonege kompletigis unu la alian.

En urbo tiel asociema kiel Genevo, Hodler aniĝis unu solan lokan societon, tiun por la protekto de la bestoj, kaj iam diris, ke li ŝatus fari el UEA asocion por protekti la homojn. Malfeliĉe oni ne povis lin decidigi, ke li partoprenu iun sporton, ludon, aŭ forlasu siajn okupojn, la longan tempon necesan por serioza kuracado. Kelkajn koncertojn li vizitis, malofte la teatron.

Intence mi montris la monton da malfacilaĵoj, super kiun lin kondukis la sorto, por ke ni esper-

antistoj rekonu la dankegon al li ŝulditan. Malgraŭ ĉio, lia vivo estis feliĉa. El la rilatoj kun malmultaj intimaj amikoj, el la simpatioj de miloj de samideanoj, kiuj aliĝis al UEA, Hodler ĉiam ĉerpis novajn fortojn. Por ke sukcesu la movado, li modeste laboris kvazaŭ oficisto, ne malŝatante okupojn malindajn je liaj kapabloj. Paŝo post paŝo irinte antaŭen li kreis fortan organizaĵon, kaj per sia agado ekzemplon de heroa vivo, kiuj ne malaperos. Staru je la fino de tiu modesta memoraĵo la belaj vortoj, per kiuj li finis sian verkon:

„La ideoj nek estas netuŝeblaj, nek eternaj. Ofte ili estis ŝanĝataj dum la estinto, ili povos ankaŭ ŝanĝi estonte. La sorto, kiu nin enkatenuigas kaj el kiu ŝajnas maleble liberiĝi, povas esti aliformigita per volo potenca. La batalo de la volo kontraŭ blindaj povoj estas la esenco de l' historio. Por fortaj animoj, la sorto ne estas tribunalo sen apelacio. Tial ni vekigu! Ni unuigu! Kaj ĉefe: ni laboru! laboru!“

Ed. Stettler

•
Elekto

**el artikoloj de H. Hodler
aperintaj en „ESPERANTO“**

•

Artikoloj esperantistaj

	paĝo
Pripensoj	59
Novaj perspektivoj	70

Artikoloj ĝeneralaj (dummilitaj)

Super	98
Pri eminentuloj	104
Pensu pri la estonteco	109
Kiu eraris	119
La kritikistoj parolas	127
Milito kaj homa energio	136
La socio post la milito	146
La lasta milito?	157
Nova spirito	161
Internacia ordo kaj internacia lingvo	164

Pripensoj . . .

(Decembro 1913)

En movado kiel nia oni devas sin deteni de ĉiu tro pesimista aŭ tro optimista juĝo. Ne tiel simpla estas la vero. Pesimistoj komparas nian aferon kun ia neatingebla perfekteco. Ni do ne miru, ke juĝante la realecon laŭ siaj revoj ili en nia movado ĉion kritikis. Optimistoj alte taksas niajn progresojn, ĉar ili juĝas nian movadon atentante la malfacilaĵojn, kiujn ĝi senĉese renkontas sur sia vojo.

Aŭskultu ni la pesimiston: „De pli ol dudek jaroj ni batalas. De dek jaroj nia agado ne plu estas limigata je tia aŭ alia lando, sed ampleksas la tutan mondon. Ĉu vi de tiam notis vere gravan progreson? Niajn kongresojn ĉeestas nun ne pli multe da personoj ol antaŭ sep aŭ ok jaroj. Multaj el niaj organizaĵoj vegetas, la kursoj ne estas pli vizitataj ol antaŭe, eĉ ialoke malpli. Granda nombro da novaj gazetoj naskiĝis, sed egale granda nombro mortis. Nia literaturo pliriĉiĝis, sed tre malmultaj legas ĝin. Novaj grupoj kreiĝis,

sed multaj el la malnovaj profunde dormadas. Post kvin jaroj UEA ne havas pli ol ses mil membrojn. Ni ne antaŭeniras; ni rondiras. Ĉiu du- aŭ trijare ni agitas la samajn demandojn, polemikas, repaciĝas. Ĉe la kongresoj ni ĉiujare aŭdas la samajn rekantaĵojn, aplaŭdas la samajn paroladojn, alprenas la samajn decidojn kaj foriras same kontentaj. Dume, la publiko indiferas; la novaj varbitoj apenaŭ anstataŭas la batalantojn, kiujn forprenas la morto.“

Post tiu malvarmiga parolado ni prezentu la orelon al la optimisto: „Antaŭ deko da jaroj, la esperantista movado konsistis nur el kelkaj izoluloj fervorplenaj, sed tute nekonataj. En relative mallonga tempo ni sukcesis, malgraŭ sennombraj malhelpoj, starigi grandan movadon. Ĉiujn atakojn kontraŭ Esperanto ni venke forpuŝis; ĝi nun vivas ne sole en la libroj, sed en niaj koroj. Ni plibonigis niajn organizaĵojn, ebligis praktikan aplikadon de nia lingvo, pliriĉigis nian literaturon, ĉie konigis la nomon Esperanto. Paroli pri la estonta triumfo de Esperanto fariĝis jam senutila; tiu triumfo jam fakte ekzistas, ĉar la lingvo estas uzata de plej diversaj homoj por la plej diversaj celoj, ĉar ĝi vivas, ĉar ĝi alportas al ni novajn sciojn, novajn ĝojojn. Konsiderante la eksterajn malfacilaĵojn ni rajtas proklami, ke nia afero staras sur bona vojo.“

Cu parolas la profeto pesimista, ĉu parolas la profeto optimista, ĉiam tra la ŝajne senpartia juĝo aperas la homo, kiu ĝin eldiras. Tre malfacile estas do objektive juĝi nian movadon; eĉ saman fakton oni plej ofte povas interpreti malsame. Penante forigi de ni ĉiun emon al pesimisteco aŭ optimisteco, ni tamen povos konkludi, ke nia movado estas nek en tiel malbona, nek en tiel bona stato, kiel asertas tiuj absolutaj profetoj.

Por taŭge juĝi nian aferon, ni ne devas ĝin izoligi for de la cetera mondo. Ni ja devas ankaŭ atenti pri la eksteraj kondiĉoj, kiuj povus favori aŭ malhelpi ĝian disvolviĝon; ni devas ĝin kompari kun aliaj movadoj.

Ni unue substreku tiun malnovan veraĵon, ke ĉiu *nova* ideo tre-tre malfacile enradikiĝas en la mondo. Ne sen kaŭzo ni insistas pri la vorto *nova*. Multaj ideoj aŭ celadoj, kiujn ni opinias novaj, estas en la realeco nenio alia ol malnovaj ideoj vestataj per aliaj vortoj. La mondo sin multe agitadas, sed la fortoj, kiuj movas tiun agitadon, estas tiel malnovaj kiel la mondo mem; nur alian nomon ili havas. Sed ĝuste Esperanto ne estas io jam vidita; ĝi estas nova ideo, nova *valoro*, kiu pliriĉigos la mondkulturon. Tial ĝi nur malfacile povas krei al si lokon en mondo multe pli okupata je la interbatalado de malnovaj ideoj ol je la kreado de novaj sociaj valoroj.

Esperanto postulas de ĉiu homo, kiu venas al ĝi, ian laboron, ian personan penadon: nova malfacilaĵo. La homoj ja volonte aliĝas al iu nova opinio aŭ nova kredo, sed ili ne deziras, ke tio trudu al ili laboron.

Sed Esperanto ne restis sole ideo; ĝi fariĝis organizita movado, kaj interne de tiu movado estas homoj malsamaj laŭ rasoj, laŭ klasoj, laŭ opinioj — plej granda heterogeneco, kiu certe enhavas la germon de multaj disputoj, malkonsentoj, malfacilaĵoj, rezultantaj el la diversaj mentalecoj. Nin ĉiujn unuigas nur lingvo, la deziro ĝin uzi kaj ankaŭ pli-malpli precizaj ideoj pri paco. Ni do devas ligi nin al tiu necesega minimumo; pri ĉia alia ideo estu neŭtralaj aŭ, preferinde, toleremaj. Ju pli ni nombre plimultiĝos, des pli kreskos la malfacilaĵoj rezultantaj el la diverseco de nia anaro. Tial al la direktantoj de nia movado granda idelargêco kaj toleremo estas necesaj.

Plie la fatalo volis, ke al ĉiu nova movado, kia ajn estas ĝia celo, aliĝas, flanke de elementoj progresemaĵ kaj idealistaj, homoj kun utopia mentaleco, stranguloj, maniuloj, kaj aliflanke malkontentuloj, ambiciuloj aŭ simple amatoroj; ĉiuj malhelpas pozitivan agadon, ĉu ĉar ili ellaboras tute nerealigeblajn projektojn, ĉu ĉar ili uzas la movadon, al kiu ili aliĝas, por pure personaj celoj. Tion konis nia movado — kiel ĉiuj movadoj; nur

iom post iom ĝi povas sin liberigi je tiuj skorioj.

Ne vane estas insisti pri tiuj diversaj malfacilaĵoj. Ili igas nin indulgemaj kiam ni konsideras nian propran agadon; ni pli juste povas taksi la signifon de nia penado, se ni atentis pri la malhelpoj, kiuj baras la vojon de ĉiu nova kultur-celado.

Ĉu nenio estas, sinjoro pesimisto, ke Esperanto vivis malgraŭ la eksteraj atakoj, malgraŭ la trompallogaj provoj de reformado, ke ĝi, spite ĉio, evoluis normale, kiel antaŭvidis ĝia kreinto, ke ĝi kreis al si interesan literaturon, ke ĝi fariĝis parolata lingvo tiel sukcese kiel ĝi jam estis skriba lingvo? Ĉu nenio estas, ke tiun lingvon uzas kelkmiloj da diversnaciaj homoj, kiuj per ĝi interrilatis pri plej malsamaj fakoj de la socia vivo, konatiĝis, interfratiĝis? Ĉu nenio estas, ke almenaŭ multloke oni ne plu ridas je nia celado, sed serioze konsideras ĝin — ne kiel afero ankoraŭ tute certa, sed jam kiel afero inda je intereso kaj helpo? Ĉu oni rajtas diri, ke ĉio tio estas nenio?

Sed, kun justeco ni diros al la kontraŭulo: „Sinjoro optimisto, vi bedaŭrinde ne ĉiam estas prava. Jes, nia movado sendube progresis kaj gajnis je seriozeco kaj vivforto, sed vere estas, ke ĉe multaj, tro multaj lokoj oni konstatas ĉe niaj

propraj samideanoj ankoraŭ tro grandan indiferent-
econ kaj apation por ĉiu serioza laboro, por tia
metoda agado, kiu estas necesa kondiĉo de pro-
greso. Sendube oni multe agitigas, bruas, festas,
amuzas, sed por seriozaj vere utilaj laboroj pre-
zentiĝas nur ĉiam sama malplimulto da sindon-
emuloj en kies manoj la granda plimulto fordonas
ĉiun respondecon kaj ĉiun laboron. La inerteco
de la ekstera publiko estas iafoje malagraba, sed
multe pli malĝojiga estas la inerteco de *nia* publiko.
Ĉiuj, kiuj volis entrepreni ion en nia movado, tion
ofte spertis en kruela maniero. Mankas nek bonaj
intencoj, nek fervoro, sed pli simple volo kaj
laboremo. Kritiki, ekskomuniki, tion ĉiu volonte
faras, sed labori pozitive, akcepti respondecon, tion
ĉi oni fordonas al kelkaj ĉiam samaj personoj.
Jen, sinjoro optimisto, grava danĝero, kiun kaŝi
estas danĝere. Plej granda baro estas *nia* propra
inerteco. Ĝi malgrandiĝos kiam ni konscios, ke la
triumfo de Esperanto ne estas io estonta kaj ab-
soluta, sed ke ĝia triumfo konsistas jam nun en
tio, ke ĝi ekzistas kaj utilas.

*

Post la pesimisto kaj la optimisto venas la
kuracistoj.

La unua diras al ni: „Esperanto progresis en
la komenco nur dank' al individua propagando.

Ni do revenu al tiu sistemo. Senutila estas organizo. Esperanto estas nur lingvo. Ni penu varbi novajn lernantojn. Tio sufiĉas. Ĉio alia estas nur preteksto por vanaj disputoj pri honoroj aŭ por persona ambicio.“

La dua proklamas: „Ni pli rapide progresus, se nia organizo estus pli bona. Ni devas kunigi la naciajn societojn en centra organizo, starigi komitaton, kiu direktos la propagandon, havi propran parlamenton. Nur per severa organizo ni sukcesos.“ Kaj inter la personoj tiel parolantaj, iuj donas la unuan lokon al la naciaj societoj, aliaj al la lokaj grupoj, aliaj al UEA.

La tria sugestas: „Esperanto sukcesos nur kiam ĝi estos disvastigata en specialaj rondoj, profesiaj aŭ partiaj. Ni do okupu nin antaŭ ĉio je propagando inter specialistoj. Ĉia alia tro ĝenerala agado ne efikas.“

La kvara murmuretas: „Ĉio en nia movado estus bona, se S-ro A. ne estus prezidanto de nia grupo aŭ se S-ro B. ne estus delegito“ — kaj sian tutan laborkapablon li dediĉas al tio, ke S-ro A. ne plu estu prezidanto aŭ S-ro B. delegito.

Ĉiuj tiuj vidpunktoj prezentas *partan* veraĵon, sed bedaŭrinde iliaj reprezentantoj pli okupiĝas ekskomuniki la partianojn de la ceteraj veraĵoj, ol realigi tion, kio en iliaj proponoj estas realig-

ebla. Partan plibonigon ili konsideras kiel absolutan solvon. Do, disputoj, polemikoj, disperdo de energioj. Ĉu estas bezone rimarkigi, ke se individua propagando estas nepre necesa, ĝi per si mem tute ne sufiĉas. Scii Esperanton estas unu afero, ĝin uzi kaj ĝin propagandi estas afero ne malpli necesa. Por tion ebligi, necesa estas organizo, kiu taŭge dividos la laboron kaj harmonie kunordigos la individuajn penadojn. Reciproke, organizo, kiel ajn bona en si mem ĝi estas, ne povas vivi sen la paralela agado de siaj membroj. Individua propagando kaj bona organizo estas do samgradaj necesajoj. Aliparte, certe dezirinde estas, ke Esperanto disvastiĝu ĉe specialaj rondoj, profesiaj aŭ ideaj, sed kondiĉe, ke oni pro tio ne preterlasu la gravecon de la ĝenerala propagando aŭ uzado. Antaŭ ol esti kuracisto, komercisto aŭ socialisto, oni estas *homo*. Fine, ne dube estas, ke en nia movado ne ĉiuj personoj estas same estimataj aŭ estimindaj, sed kial sin okupi nur pri tio? Ĉu ne estas mil manieroj esti utila al nia afero, eĉ se en via urbo la prezidanto de la grupo aŭ la delegito ne plaĉas al vi?

Ĉiuj supre notitaj vidpunktoj, laŭ la cirkonstancoj, povas esti pravaj, sed absolutaj receptoj ili ne estas. Ni gardu nin formi en nia movado sektemajn partiojn kun mallarĝa kredo. Utiligi malsamajn verojn, laŭ la bezonoj de la momento,

ĝuste estas la merito de la bonaj gvidantoj. En la lastaj jaroj utile estis speciale insisti pri la neceseco de bona organizo. Nian organizon ni plibonigis; fariĝis nun denove utile atentigi pri la bezono de energia individua agado. Tion farante ni ne ŝanĝas opinion; ni nur penas restarigi taŭgan ekvilibron. Relativeco de principoj trudas al ni toleremon.

*

. . . Mi estis eltironta konkludojn el la supraj pripensoj, kiam meze de duonkonscia cerbumado, prezentigis al mi subite, mi ne scias kial, la bildo de mia amiko Laborulo. Utilos verŝajne, ke mi lin prezentu, ĉar de multaj el ni li ne estas bone konata. Sinjoro Laborulo ne estas tre eminenta persono. Malofte vi vidos lin sur estrado. Se li tamen kuraĝas ekparoli — cetere ne per tre brilaj frazoj — tio estas pli por esprimi opinion kaj ideon, ne ĉiam malpravon, ol por ĝui aplaŭdojn. Al la gazetoj li tre malofte sendas „literaturajn“ tradukojn (tion li faris nur, kiam li estis lernanto) kaj mi ne timas pretendi, ke li eĉ ne faris versaĵon. Sinjoro Laborulo estas modesta oficisto, kiu fininte sian ĉiutagan laboron, dediĉas la liberajn horojn al nia afero. Pri esperantista politiko li malmulte sin okupas, kaj, verdire, mi suspektas, ke li ne ankoraŭ havas pretan solvon por sukcesigi Esperanton, sed unu aŭ dufoje en

la semajno sinjoro Laborulo faras esperantan kurson. Li penas ne sole instrui la lingvon, sed ankaŭ ĝin utiligi, tiel ke liaj instruoj ne perdisian tempon. Li atentigas ilin, ke Esperanto estas viva lingvo kaj kiel ĉiu tia lingvo devas esti respektata. Li gardas ilin je ŝanĝemo aŭ gramatikomanio, sed same gardas sin insulti tiujn, kiuj ne pensas same. Kompreneble la duono de la lernantoj forkuras, sed tio lin ne senkuragiĝas. Li scias, ke inter la homoj estas amaso de amatoroj kaj malobstinuloj. Li penas eduki la restantan duonon. Tiel lia laboro neniam estas tute vana. Sinjoro Laborulo, se mi ne eraras, estas sekretario aŭ kasisto de la grupo. Oni ŝatas lin, ĉar li havas ordon. Bona administranto li estas. Ne multon li promesas, sed kion li promesas, tion li faras ĝustatempe. Mi tre dubas, ĉu li estus kapabla fari teorian disertacion, ĉu Esperanto estas nur lingvo aŭ ĉu ĝi estas socia movado, sed ĉiuokaze mi scias, ke, kiam li ricevas leteron, li ĝin legas kaj respondas. Kvankam li estas fervora grupano, membro de nacia societo kaj eble ankaŭ de faka grupiĝo, li akceptis esti Delegito de UEA. La cirkulerojn, kiujn li ricevas, li penas plenumi. Li ne tuj skribas: „Senutile estas klopodi, ĉar ni ne sukcesos“ aŭ „niaj samurbanoj estas tre indiferentaj“ — sed li almenaŭ provas: Vere, li ne ĉiam sukcesas, sed almenaŭ el kelkaj tiaj klopodoj,

kelkaj havis pozitivan rezultaton. Mi neniam aŭdis, ke en iu ajn kongreso li kompetente parolis pri la diferenco inter per- kaj poresperantaj organizaĵoj, nek ke li severe admonis UEA resti en la limoj de ĝia agado, sed lia grupo eldonis gvidfolion, kiun UEA disdonis. Ĉu oni kuraĝos kredi, ke tiu strangulo ne ĉiam surportas la verdan stelon, nek al ĉiuj ajn personoj parolas pri Esperanto? Tamen, la elektitaj personoj, kiujn li varbis, estas seriozaj kaj fidelaj al nia movado. En la urbo li ne estas konata kiel fantaziulo, kiu senĉese ripetas la vorton Esperanto. Ne, oni respektas lin. Glumarkojn li ne kolektas (verdire li tion permesas al sia knabeto), sed li regule pagas siajn kotizaĵojn kaj abonojn. Mi devas aldoni, ke li sincere kantas „La Espero“ ĉe la kongresoj kaj same sincere kredas, ke la amo al la homaro — kiun Esperanto ĝermigis — ne forigas la amon al lia patrujo — sed li ne ĉiam havas en la buŝo la vorton „frateco“ kaj „amo“, ĉar li malprecize konscias, ke tre ofta uzado de tiuj noblaj vortoj forprenas iom da ilia sankteco. Fine, mi scias, ke S-ro A., la vicprezidanto de la grupo, ne plaĉas al li. Li tamen ne ankoraŭ insultis lin, filozofie li premas lian manon en la intereso de l' paco, kvankam vere . . . Cetere, mia konatulo, mi tion forgesis diri, estas nek heroo, nek apostolo, nek pioniro. Li estas simple . . . Laborulo.

Delogite, de la bildo de mia amiko Laborulo, mi ne plu povis konkludi. Mi ankaŭ ne plu bezonis . . .

Ĉu sinjoro Laborulo havas multajn samspeculojn en Esperantujo? Mi ne kuraĝus jese respondi, sed ĉiuokaze mi scias, ke de ilia multeco, pli ol de tia aŭ alia teorio, dependas niaj estontaj progresoj. Unue vivi, poste filozofi . . .

Novaj perspektivoj

(Februaro 1919)

I.

La fino de la milito kaj la espereble baldaŭa konkludo de la paco trudas al la esperantistaro novajn devojn. Dum kvar jaroj, nia plej alta ambicio sin limigis al la konservado de la ekzistantaĵoj kaj al la kontraŭbatalado de la pereigaj efikoj de la milito. *Elteni*, tia estis nia devizo, kaj neniu povas kontesti, ke tiun limigitan celon ni atingis en kontentiga maniero. Sed de nun aliaj perspektivoj, aliaj taskoj sin prezentas antaŭ niaj okuloj. Al nia agado ni devas difini pli vastajn celojn. Anstataŭ elteni, ni devas *progresi*, fari nian movadon pli potenca ol ĝi iam estis, konkeri al Esperanto novan publikon — ĉio nebla sen prudenta kaj energia kunstreĉo de ĉiuj fortoj niaj.

En kiaj kondiĉoj sin prezentas por ni la nova batalado? Se oni konsideras la materian staton de la nuntempa mondo, oni devas konfesi, ke tiuj kondiĉoj ne estas tre favoraj. La milito postlasis teruran heredaĵon. Tre malfacila fariĝis la ekonomia vivo en ĉiuj landoj, en kelkaj regas eĉ malsato kaj premanta mizero. Vasta parto de Eŭropo estas agitata per tumultoj, revolucioj, militminacoj. Ĉie la vivbatalo fariĝis pli akra, pli kruda ol iam, kaj por multaj homoj estas tia, ke oni apenaŭ kuraĝas peti, ke parto de ilia malmulta libera tempo estu dediĉata al senprofita idea afero kiel Esperanto.

Kaj tamen! . . . El la historio ni scias, ke gravaj ideaj progresoj ofte naskiĝis dum periodoj de malpacoj kaj de materia neprospereco. Malkontenta pri sia sorto kaj laca de la akra batalo por la pano, la homo direktas sian penson pli alten kaj volonte sin okupas pri io, kio forigas lin almenaŭ momente de liaj ĉiutagaj zorgoj. La spiritaĵoj progresoj ŝajnas postuli certan limigon de la materia komforto, en kiu la penso tro ofte fariĝas maldiligenta. El la malfacileco de la ekonomiaj kondiĉoj ni do ne devas konkludi la malfacilecon de nia agado, kiu antaŭ ĉio estas idea, spirita. La mondo nun eknaskas novan ordon, sed ĝia formo klare aperos nur post multaj skuoj kaj disputoj. Ne sole sur la politika kampo prepar-

iĝas gravaj ŝanĝoj, sed ankaŭ en sociala, idea, eduka rilato novaj tendencoj, novaj komprenoj manifestiĝas kaj traboras sian vojon. Estas ĉie intensa serĉado de pli oportunaj vivformoj. Esperanto apartenas al tiuj novaj tendencoj. Ĝi estas unu el tiuj sin reciproke kompletigantaj ideoj, de kies sukceso dependas la starigo de pli harmonia homaro. Ligo de la nacioj, nacia memdestino, sociala demokratio, reformo de l' edukado, internacia lingvo, jen parencaj movadoj, kiuj pli kaj pli sin trudos al la publika atento, malgraŭ ĉiuj ekonomiaj priokupoj.

Sed la plej favora grundo restas senprodukta, se la semantoj estas mallertaj aŭ nelaboremaj. La nuntempa movado de la ideoj ŝajnas ja faciligi la klopodojn de la batalantoj por internacia lingvo; tamen la fina sukceso dependas ne sole de tio, sed ankaŭ de *ni mem*. Al nenio utilis la preteco de la publiko tiom longe kiom la ekzistanta esperantistaro restus neagema aŭ baraktus en internaj malfacilaĵoj, tiom longe kiom ĝia nedubebla bonvolo kaj fervoro estus senefikigataj de malbonaj labormetodoj aŭ de neĝustaj tradicioj.

Estas do necese, ke ĉe la sojlo de nova epoko ni ekzamenu, ĉu ni staras sur la ĝusta vojo kaj, se jes, kiel ni devas organizi nian agadon por atingi plej rapide la alcelatan sukceson. Riĉan sperton ni havas el la antaŭmilita agado. Ni sciu ĝin util-

igi, evitante ripeti la erarojn, de kiuj ni suferis, kaj penante senĉese plibonigi niajn labormetodojn. Neniu trafe agas, kiu ne klare vidas.

*

La unua demando, kiu sin prezentas al nia esploremo, koncernas la lingvon mem. Ĉu la solvo de la internacilingva problemo, por kiu ni batalas, estas bona, praktika, kaj havas ŝancon esti akceptata de la pli vasta publiko? Aŭ ĉu ekzistas alia solvo, kiu permesus al ni pli rapide atingi la venkon?

Por respondi al tiu demando, oni devas sin liberigi de mallarĝe esperantista pensmaniero. Fideleco al la Fundamento, amo al nia Majstro, nia kara lingvo, jen estas kortuŝaj formuloj, kiuj havas signifon por la esperantistoj, sed lasas indiferenta la eksteran konkerotan publikon. Estas nekontesteble, ke la venko ne povas dependi de kelkaj negravaj lingvaj punktoj, ĉar la problemo de lingvo internacia estas pli socia ol lingva, sed oni ne povas nei, ke sistemo okulvideble supera al Esperanto sukcesus trabori sian vojon, eĉ se momente estas pli granda forto ĉe nia flanko.

Multaj estas la sistemoj de lingvo internacia, sed post Volapük, kiu malsukcesis, nur unu estas praktike elprovita kaj diverse uzita dum longa tempo: Esperanto. Flanke de ĝi kaj parte bazata

sur ĝi, ekzistas nur unu sistemo sufiĉe ellaborita, sed ĝis nun tre malmulte praktikita: Ido. Por kompari ambaŭ formojn oni devas juĝi, ne laŭ teoriaj gramatikoj, sed laŭ tekstoj kaj laŭ la parola uzado. Pri tiu ĉi lasta, estas malfacile fari komparon, pro bona kaŭzo . . . Ni nur scias, el multaj kunvenoj kaj kongresoj, ke Esperanto estas facile parolebla kaj tre belsona lingvo, kun propra karaktero. Komparante tekstojn, ne nur supraĵe, sed analize, oni konvinkiĝas, ke Ido ne superas Esperanton laŭ precizeco, klareco kaj riĉeco. Al latinlingvaj personoj Ido ŝajnas unuavide pli facila ol Esperanto pro la manko de akuzativa formo kaj precipe pro la granda nombro de latinaj radikvortoj. Ĉar multaj juĝas laŭ unua vido, tio klarigas, kial ekzistas personoj, kiuj opinias Idon pli bona ol Esperanto. Sed tiel multflanka demando ne povas esti solvata per supraĵa rigardado de tekstoj. Oni devas analizi ilin kaj konsideri la diversajn eblajn uzojn de la lingvo. La fundamenta diferenco inter Esperanto kaj Ido konsistas en tio, ke la unua posedas akuzativan formon kaj akordigas la adjektivon kun la substantivo. Dank' al tio Esperanto havas pli flekseblan, pli liberan, pli elegantan stilon, kiu adaptiĝas al ĉiuj bezonoj de la penso. En Ido la frazo estas rigida, unutona kaj ofte konfuza, almenaŭ por nelatinidoj. Al tio oni respondas, ke la akuzativo estas malfacila por

multaj popoloj. Sed tiu malfacilaĵo estas negranda, kompare kun la avantaĝoj, kiujn prezentas tiu formo, permesante liberan vortordon. Plie, kiam Esperanto estos instruata en la lernejoj, oni konstatos, ke la ekzisto de l' akuzativo estas utila el pedagogia vidpunkto, ĉar ĝi helpas al la infanoj por la gramatika analizo de ilia propra lingvo.

Oni eble diros, ke la fleksebleco de la stilo ne estas nepre necesa por multaj tekstoj. Se oni limigas la uzon de la internacia lingvo al komercaj, teknikaj aŭ sciencaj rilatoj, stilaj kvalitoj ne estas necesaj. Ni ne opinias, ke oni povas kaj devas trudi al lingvo internacia limojn al ĝia estonta uzebleco. Tiu lingvo, kiu vivos tiom longe kiom ekzistos homara civilizeco, devas servi por ĉio, do ankaŭ por la literaturo kaj la poezio. Neniu povas nei, ke Esperanto, pro sia fleksebleco kaj pro sia adaptebleco al la diverspopolaj pensmanieroj, superas Idon en verkoj literaturaj kaj precipe poeziaj. Tiel belaj kaj fidelaj tradukoj de literaturaj ĉefverkoj, kiel „Eneido“, „Hamleto“, „Ifigenio“, ne povus ekzisti en Ido, kiu, flanke de nesufiĉe preciza gramatiko, posedas rigidan kaj geometrian derivsistemon, komplikan kaj nenaturan, ne pli logikan ol la esperanta kaj kontraŭan al la kutimoj de la naciaj lingvoj, el kio rezultas stilo peza, sen iu avantaĝo rilate la precizecon. Oni sentas, ke la aŭtoroj de Ido ne prilaboris sian lingvon per

tekstoj, kiel Zamenhof, sed agis precipe kun izolaj vortoj kaj frazeroj.

Fine oni devas konstati, ke Ido tro rapide plimultigis la nombron de la radikoj kaj, ilin elektante, sin bazis tro ekskluzive sur la latina pensmaniero. Ĝia vortaro enhavas multe da senutilaj radikoj, kiuj diferencas apenaŭ laŭ nuanceto, kaj ĝi multe malpli ol Esperanto uzas la oportunan kunmetadon de la ekzistantaj elementoj por formi novajn vortojn. Tial oni malpli rapide povas korekte skribi Idon ol Esperanton, precipe, se oni ne konas latinidan lingvon.

Tamen, ni ne opinias, ke ĉiuj novaĵoj enkondukitaj de Ido en la vortaro estas kondamnindaj. Se Ido estas tro riĉa je radikoj, ni laŭsperte konvinkigis, ke Esperanto estas iom tro malriĉa. Kiam oni tradukas modernajn tekstojn, precipe kun teknika karaktero, oni konstatas, ke al Esperanto mankas radikvortoj, ĉar la ekzistantaj kunmetaĵoj ofte ne sufiĉas por precize esprimi ideon. En tiu rilato oni devas progresi kaj por la necesa pliriĉigado de nia vortaro agi kun pli bonaj metodoj ol antaŭe. Ni ekzamenos, kiel oni povas plenumi tiun taskon, ne kaŭzante rompon aŭ malordon.

Koncerne la lingvan problemon oni do povas diri, ke Esperanto superas Idon rilate gravaĵojn, kaj Ido Esperanton rilate malgravaĵojn. Tio estas fundamenta diferenco. La demando pri lingvo

internacia ne estas pure lingva, sed socia. Tamen, eĉ se oni konsideras ĝin el ekskluzive lingva vidpunkto, Esperanto post detala komparo ne aperas malsupera al Ido.

Restas la demando, ke eble la registaroj ne opinios kiel ni, kaj preferos alian formon ol Esperanton. Al tio ni respondas, ke kiam internacia aŭtoritato, havanta la povon trudi siajn decidojn, akceptos alian lingvan formon, ni volonte aliĝos al ĝi, sed ke ĝis tiam estus tre malsaĝe, ŝanĝi la fundamenton de lingvo, kiun la eksperimentado montris taŭga kaj dank' al kiu miloj da homoj jam povis facile kaj plezure interrilati.



(Marto 1919)

II.

Jam de pli ol tridek jaroj ekzistas Esperanto. Dum ĉi tiu periodo, mallonga en la vivo de lingvo, granda laboro estas farita. Esperanto ĉesis esti teoria malgracia signaro, kaj fariĝis vivanta lingvo, kiu ne estas la simpla kopio de nacia idiomo, sed havas propran bone difinitan karakteron kaj memstaran evoluon. Ĝi jam posedas atentindan tradukan literaturon, kaj se ĉiuj ties verkoj ne estas egale bonaj, almenaŭ inter ili troviĝas kelkaj bonegaj. Unuavice citindaj estas la belaj tradukoj faritaj de nia Majstro, kies morton oni ankoraŭ

pli bedaŭras, kiam oni scias, ke li intencis sin tute dediĉi al la tradukado de la diverslingvaj ĉefverkoj. Krom D-ro Zamenhof estas ankaŭ aro da talentaj verkistoj, al kiuj oni ŝuldas, ke nia lingvo pliriĉiĝis, fleksebliĝis, graciĝis. En la mano de tiuj bonaj aŭtoroj, Esperanto aperas kiel lingvo taŭga por literaturaj celoj, belsona, energia, trafa.

Flanke de bonaj tradukoj ekzistas kompreneble tro granda nombro de mezbonaĵoj, ĉu rilate al la enhavo, ĉu rilate al la stilo. Oni tradukis tro multe da malgrandaj seninteresaj anekdotoj aŭ fabeloj, kiuj meritis eterne resti en sia naci-lingva vestaĵo. Tiuj verketoj plenigas la bretojn de niaj eldonistoj kaj utilas al neniu, eĉ ne al la aŭtoro, kiu tiel perdas kelkcentojn da frankoj. Aliparte, — tio estas alia danĝero — ekzistas personoj, kiuj malbone tradukas bonajn verkojn. Ne ĉiu homo, eĉ flue parolanta Esperanton, estas lerta tradukanto. Por tiu ĉi tasko, certaj konoj kaj artaj ecoj estas necesaj. Tamen, en tiu rilato kelkaj progresoj estas faritaj dum la lasta jardeko. La kritiko iĝis malpli indulga, oni pli funde studis nian lingvon, kaj la tradukantoj kutimiĝis legigi siajn laborojn de alilandaj spertuloj antaŭ ol ilin publikigi, — kion devus fari eĉ la plej bona esperantisto. Sed tiu pliboniĝo ne ankoraŭ realiĝis koncerne la esperantajn gazetojn. Oni devas konstati, ke en ili aperas ankoraŭ tro multe da

malbonstilaj artikoloj, kiuj erarigas la legantojn. La teoriaj konsiloj, kiujn donas la libroj pri korekta uzo de la lingvo, utilas neniel, se dume la gazetoj, pli multe legataj, disvastigas malkorektajn ekzemplojn. Ĉar la redaktoroj de esperantaj gazetoj estas personoj, kiuj ne povas sin profesie okupi pri sia laboro, ili ofte ne havas la necesan tempon por poluri la ricevitajn artikolojn, sed ĉiu esperantisto, kiu verkas ion, eĉ negravan, tiel por gazeto kiel por libro, devus havi sufiĉe da respekto al la legontoj por prezenti al ili bonstilajn legaĵojn, petante, se necese, la kunhelpon de pli sperta samideano.

*

Se oni trarigardas nomaron de la esperantaj verkoj, oni konstatos — ne parolante pri la senvaloraĵoj —, ke oni tradukis precipe klasikaĵojn, sed nur tre malmultajn modernajn verkojn, precipe la scienca kaj teknika verkaro estas ankoraŭ tre malriĉa. En niaj gazetoj aperas preskaŭ nur artikoloj pri esperantaj aferoj — do ĉiam la sama limigita vortaro — kaj kelkaj rozkoloraj anekdotoj aŭ fabeloj facile tradukeblaj. Tiamaniere nia lingvo, moviĝante ĉiam en la sama pensrondo, ne povas pliriĉiĝi kaj disvolviĝi. Ni ne opinias, ke la tradukado de klasikaĵoj estas neutila el lingva vidpunkto, sed ni asertas, ke estas urĝe prilabori nian lingvon ankaŭ por aliaj fakoj de la homa

penso. Ni lasu dum kelka tempo Shakespeare, Goethe kaj Molière, kaj okupiĝu pli multe pri nia tempo. Estus dezirinde, ke niaj aŭtoroj dediĉu sian tradukemon al modernaj verkistoj, elektante el ili la plej karakterizajn kaj malfacilajn tekstojn. Ili tiel helpos al la pliriĉiĝo de nia lingvo kaj al ĝia adaptiĝo je la nuntempaj bezonoj de la penso. Se Esperanto estas ankoraŭ iom peza, primitiva, tio devenas ne de la lingvo mem, kiu povus esti tre riĉa kaj nuanca, sed de nesufiĉa prilaboriteco kaj de mankantaj radikvortoj. Nur tradukado ampleksonta ĉiujn fakojn povas doni al nia lingvo la fluecon de la vivo. La plej malfacilaj tekstoj estas la plej tradukindaj. Kiel prave diris nia Majstro, „estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos“.

Lingvo internacia ne devas servi sole por la literaturo, sed ankaŭ kaj precipe por la ĉiutagaj bezonoj de la vivo. Oni do traduku prefere verkojn aŭ artikolojn rilatantajn al nuntempaĵoj kaj praktikaĵoj. Tio estas la plej urĝa tasko el lingva vidpunkto. Al ĝia plenumo ĉiu povas kunlabori. Multaj grupoj de spertaj esperantistoj sin okupas pri tradukado, sed bedaŭrinde preskaŭ nur de literaturaj tekstoj. Ni opinias, ke estus multe pli utila ekzerco traduki, ekzemple, ĉiutagan ĵurnalon — inkluzive la informoj pri borso, sporto, vetero

kaj precipe la anoncoj — ol fabelon. Ni eĉ konsilas tiun laboron al la personoj dezirantaj helpi al la pliriĉiĝo de nia lingvo. Kiam oni povos facile traduki en Esperanton la tutan enhavon de granda ĵurnalo, oni rajtos diri, ke nia lingvo estas vere moderna ilo, tute preta por esprimi la bezonojn de la ĉiutaga vivo.

*

Kiam oni deziras traduki tekston iom subtilan aŭ kun teknika karaktero, oni konstatas, ke Esperanto estas iafoje ne sufiĉe preciza aŭ tro peza, ĉar ankoraŭ mankas al ĝi la bezonaj radikvortoj aŭ komune akceptitaj frazturnoj. Ke teknikaj vortaroj fariĝis necesegaj, estas evidenta veraĵo, kiun neniu kontestas. Estas la devo de la esperantistaro doni seriozan ateston al tiu problemo. Sed ni opinias, ke antaŭ ol sisteme verki detalajn teknikajn vortarojn, estas tute necese meti ordon en la vortaron de la komuna lingvo. Kiu uzas Esperanton por tradukaj laboroj, tiu sperte scias, ke la vortoj de la Universala Vortaro, eĉ kun la oficialaj aldonoj, ne sufiĉas. La aŭtoroj de pli kompletaj naciaj-esperantaj vortaroj estis devigataj mem krei la bezonajn vortojn, sed okazas iafoje, ke tiuj vortoj estas ne bonaj, t. e. ne konformaj al la spirito de Esperanto, aŭ diferencas unu de la alia, laŭ la aŭtoroj. Plie, ĉar la naciaj-

esperantaj vortaroj ofte estas nesufiĉe kompletaj aŭ tro malprecizaj, ĉiu ajn rajtas krei novan radikon laŭ sia plaĉo. Ke fine regas malordo, tio estas neevitebla. Se oni ne volas ĝin pligrandigi kaj fuŝi la estontan verkadon de la teknikaj vortaroj, estas necese adopti pli bonan metodon.

Tio nin kondukas al la demando pri la organizo kaj laboro de la lingvaj institucioj, kies ĉefa tasko ja devus esti la starigo de kompleta vortaro de la komuna lingvo. Pri tiu demando, antaŭ la milito, fluis multe da inko, sed el la diskutoj rezultis, kiel kutime, malmulte da praktika laboro. Ni bedaŭras, ke dum la milita tempo la lingvaj institucioj tute haltigis sian laboron. Guste dum tiu periodo, ne favora por ekstera agado, komisiono estus povinta fari utilan internan laboron rilate al la vortaro. Oni nun almenaŭ ne atendu, ĝis regos perfekta universala paco, por komenci tiun necesan laboron.

La agado de la lingvaj institucioj antaŭ la milito estis preskaŭ senfrukta, ĉar oni ne interkonsentis pri ilia ĝusta rolo. Oni kreis ilin, antaŭ ol precize scii, kion kaj kiel ili laboros. Iuj opiniis, ke ili devas nur registri „oficialigi“ la uzadon; aliaj, ke ĝi devas gvidi la evoluon de la lingvo. La unua vidpunkto ŝajnas al ni kontraŭa al la esenco de nia lingvo. Esperanto estas kreita, ne de la naturo, sed de la homa racio; estas

do memkompreneble, ke la racio daŭrigu ĝin pri-labori kaj ne ĉio estu fordonata al la hazardo. Zamenhof zorge pripensis elektante la radikojn de la Universala Vortaro kaj agis laŭ certa metodo. Kial ni ne same agus rilate la novajn vortojn, anstataŭ atendi ĝis la vivo mem ĉion kreos ĥaose?

Cetere pri tio konsentas preskaŭ ĉiuj personoj praktike uzantaj Esperanton. Ili deziras havi kompletan kaj fidindan vortaron; ili deziras, ke la lingvaj institucioj ekzistu ne sole sur la papero.

Oni iam esprimis la timon, ke, se tiuj organizaĵoj eklaboros, la esperantistaro perdos sian tempon je lingvaj disputoj — kio povus endanĝerigi nian tutan aferon. Ni kredas, ke tiu timo estas pravigata, nur se oni ne difinas, kia estu la tasko de la nomitaj institucioj. La Lingva Komitato kaj la Akademio ne celas krei internacian lingvon, sed nur prizorgi la evoluon de la ekzistanta lingvo Esperanto, kiu jam posedas tute difinitan fundamenton. Ilia tasko do estas limigita. Ili neniel devas sin okupi pri ŝanĝoj en la strukturo de la lingvo, sed nur pri ĝia pliriĉigo kaj adaptigo al la esprimbezonoj de ĝia uzantaro. Fundamento netuŝebla estas necesa, kaj ni devas ĝin konservi. Sed kelkaj esperantistoj interpretas ĝin tro mal-larĝe kaj en maniero tute nekonforma al la vidpunkto de D-ro Zamenhof mem. La ekzisto de Fundamento ne devas esti malhelpo kontraŭ ĉia

lingva novaĵo; ĝi malpermesas nur, ke oni faru arbitrajn ŝanĝojn en la strukturo de la lingvo, kiu estas fiksita de la dek ses reguloj formulitaj de Zamenhof. En la limoj truditaj de la Fundamento, la lingvaj institucioj povas ankoraŭ plenumi gravan utilan laboron, sen ke la diskutoj rilataj al la demandoj pritraktataj de ili prezentu danĝeron.

La teoria organizo de la lingvaj institucioj estas per si mem bona: Akademio, konsistanta el lingvospertuloj, kiu agas kiel labora komisiono, kaj flanke de ĝi pli vasta Lingva Komitato, kiu fine decidas pri la demandoj ekzamenitaj de la Akademio. Sed ĝis nun tiu organizo apenaŭ funkciis. Se oni volas, ke ĝi estu fruktodona, du kondiĉoj estas nepre necesaj: unue, ke oni elektu por tiuj institucioj kapablajn personojn, kiuj estas pretaj serioze labori; due, ke oni interkonsentu pri taŭgaj labormetodoj. La lasta kondiĉo ne estis plenumita kaj la unua nur parte: en la komenco oni tro multe tendencis konsideri la postenon de Lingva-Komitatano kiel honorigan oficon donatan rekompence de propagandaj servoj. Tiel apartenas al ĝi personoj, kiuj ofte ne interesiĝas al la lingvo mem, ne havas sperton pri ĝi, ĉar ili neniam ĝin uzis, kaj eĉ ne korekte skribas Esperanton — kio estas malbona ekzemplo. En ambaŭ rilatoj — personoj kaj metodoj — gravaj ŝanĝoj estas necesaj.

La plej urĝa tasko ŝajnas al ni, kiel jam dirite, la pretigo de radikaro enhavanta ĉiujn esprimojn bezonajn en la ĉiutaga vivo, do ankaŭ plimalpli teknikajn vortojn ĝis kiom ili estas sufiĉe konataj de nespecialistoj. Tiu vortaro enhavus: 1. ĉiujn radikojn de la Universala Vortaro kaj de ĝia aldono; 2. la komune uzatajn radikojn, kiuj jam troviĝas en la ekzistantaj vortaroj kaj verkoj, se ili estas utilaj kaj rekomendindaj; 3. radikojn ne ankoraŭ uzitajn, sed necesajn por traduki la ideojn, kiuj ne estas precize kaj oportune esprimblaj per ekzistantaj radikoj aŭ kunmetitaj vortoj. Plie, laŭ la vojo de arkaismoj kaj neologismoj, oni povus noti per speciala signo la nemultajn ekzistantajn radikojn, kiuj estas malbone formitaj kaj sekve ne estas konsilindaj, kaj proponi anstataŭ ili pli oportunajn formojn. Fine oni devus zorge fiksi la gramatikan specon de la radikoj — substantivaj, verbaj, adjektivaj ktp. — por ke la derivaĵoj estu kiel eble plej regulaj. En la nomita radikaro, kiel la ĝisnuna Universala Vortaro, la vortoj estus tradukataj en la ĉefaj naciaj lingvoj (al kiuj estus aldonindaj la hispana kaj la itala).

Dank' al tiu sufiĉe kompleta radikaro, la tasko de la farantoj de Esperanto-naciaj aŭ de naciaj-esperantaj vortaroj estus grave faciligata, ĉar ili havus pretan materialon. En ĉiuj naciaj vortaroj,

la radikoj de la „Akademia“ vortaro estus montrataj per speciala signo. Cetere, ĉar neniu vortaro povas esti tute definitiva, estus publikigata ĉiujare aldono kun la novaj radikoj, kiujn necesigas la bezono. Estas antaŭvideble, ke post la eldono de la granda radikaro, la vortara laboro fariĝos pli kaj pli teknika kaj koncernos komisionojn de specialistoj, pli ol la lingvajn instituciojn mem. Sed ni insistas pri tio, ke detalaj teknikaj vortaroj estas malfacile ellaboreblaj kaj definitivaj, antaŭ ol ni orde solvis la demandon pri la vortaro de la komuna lingvo. Ni scias, ke la laboro, kiun ni proponas, prezentas diversajn malfacilaĵojn kaj ne estas rapide plenumbla, sed tio ne estas sufiĉa kaŭzo por ĝin neniam komenci, ĉar ju pli oni atentos, des pli kreskos la malfacilaĵoj.



(Aprilo 1919)

III.

Parolinte pri la lingvo ni nun devas ektuŝi la ĉefproblemon pri ĝia estonta propagando kaj utiligo. En la dekjara aktiva periodo, kiu iras de la Bulonja Kongreso al la militkomenco, tre diversaj eksperimentoj estas faritaj. Iaj sukcesis, aliaj malsukcesis. Multaj entreprenoj kaj organizaĵoj estas kreitaj, sed nur kelkaj povis pretervivi la nuntempan mondkrizon. Ni nun havas aŭ almenaŭ

devus havi sufiĉe da praktika sperto por eviti, ke la antaŭaj eraroj kaj mispaŝoj estu ripetataj. Ni suferis precipe de la senmetodeco en la agado, de netaŭga organizeco, samtempe komplika kaj malfirma, de la manko de sufiĉe klaraj kaj praktikaj ideoj pri la esenco de nia afero kaj ĝia kondukado. Ĉu ni povas nin korekti?

Ni scias, ke la eksteraj kondiĉoj, post la grandega militskuado, estas per si mem sufiĉe favoraj al nia agado. La eksterordinara momenta kunamasigo de diversnaciaj homoj, kiu de ĝi rezultis en vastaj regionoj de Eŭropo, konvinkis pri la neceseco de lingvo internacia multajn homojn, kiuj apenaŭ suspektis la ekziston de la problemo, ĉar rilatante nur kun samnacionoj ili neniam estis grave ĝenitaj de la lingva baro. La horizonto de la homoj plivastiĝis. La publiko kutimiĝis atenti pri landoj kaj popoloj, kiujn ĝi antaŭe ignoris. Ŝajnas, ke Eŭropo fariĝis pli malgranda. Eĉ la kontinentoj alproksimiĝis. Sur la teron de malnova Eŭropo nia alveturis milope filoj de la plej foraj regionoj de Ameriko, Afriko, Azio, Oceanio. Nekredebla, neniam vidita svarmado de popoloj. Ĉu el ĝi ne devas fine naskiĝi pli da intereso pri la problemoj de la interpopola kunvivado, inter kiuj je la unua vico staras tiu pri komuna interkomprenilo?

Sed la plej grava fakto rezultanta de la mondmilito estas sendube la progreso, kiun faris la ideo

pri interŝtata organizo, hieraŭ traktita kiel utopio, hodiaŭ serioze konsiderata kaj eble eĉ trotaksata. Embrio de Ligo de la Nacioj jam estas kreita, kaj oni devas esperi, ke tiu kreaĵo sukcesos potenciĝi, malgraŭ la rutinemo de la malnovmodaj ŝtatestoj kaj la egoismo de la superekscititaj naciaj pasioj. La reprosperiĝo de la mondo dependas de tio. Por ni, esperantistoj, la fondo de tiu Ligo, eĉ en la tre neperfekta formo, kiun ĝi nun havas, estas atentinda. Ni ĉiuj bone scias, ke vivpova estos tiu Ligo nur, se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno. Sen internacia neŭtrala lingvo, la popoloj restas plene fremdaj unu al la alia, eĉ se teorie kunigas ilin interŝtataj konvencioj. De la Ligo de la Nacioj la esperantistoj esperas do, ke ĝi frue rekonos la necesecon de komuna interkomprenilo kaj fine akceptos Esperanton kiel oficialan lingvon, el kio logike sekvos ĝia enkonduko en la ĉiulandajn lernejojn.

Al tiu rezultaĵo oni kompreneble devas celi, sed oni ne devas iluzii pri la ebleco de rapida sukceso, kaj precipe oni ne devas forgesi la neprajn kondiĉojn por ĝin atingi.

La Ligo de la Nacioj estos tre verŝajne peza organismo, pure registara, ankoraŭ pli malfacile movebla, pli timema, pli „singardema“ ol la unuopaj naciaj registaroj. Ne sufiĉas sendi petskribon

kaj fari kelkajn klopodojn, por ke la gvidantaro de la Ligo, tuj konvinkita, akceptu Esperanton kiel oficialan lingvon. Bedaŭrinde la afero estas pli komplika.

Unue, oni ne devas forgesi, ke pro la specialaj kondiĉoj, en kiuj naskiĝis la Ligo, la partianoj de la franca lingvo kaj tiuj de la angla multe agitiĝas por ke unu el tiuj lingvoj estu elektata kiel oficiala. La Ligo verŝajne alprenos nek la unuan, nek la alian ekskluzive, sed eble ambaŭ. Ni tre bone scias, ke tio tute ne solvas la problemon pri praktikaj rilatoj inter ĉiuj popoloj, sed ĝi duonsolvas ĝin koncerne la interregistarajn rilatojn, kiuj ĉefe interesas la nunajn gvidantojn de la Ligo.

Ni tamen supozu, ke tiu unua, sufiĉe grava, malhelpo estas venkita kaj la, ankoraŭ kreota, supera aŭtoritato de la Ligo konvinkiĝis, ke nur neŭtrala lingvo povas servi kiel komuna interkomprenilo. Tiam ĝi elektos komisionon de „kompetentuloj“, kiu devos zorge studi la problemon kaj proponi solvon. Estas memkompreneble, ke, se tiu komisiono konsistas el saĝaj personoj, ĝi ne juĝos nur laŭ la pli aŭ malpli granda teoria perfekteco de la prezentataj sistemoj, sed ankaŭ laŭ ilia praktika disvastiĝo kaj uzateco. Pri la teoria perfekteco de lingvo internacia oni povas ja eterne diskutadi, ĉar fine ĉiu juĝo estas afero de persona plaĉo, de spirita inklino. Oni ne povas difini, en kio kon-

sistas la teoria supereco de lingvo. Ĉu la franca lingvo estas supera al la angla? Ĉu la germana al la rusa? Neniu komisiono, eĉ konsistanta el superkompetentaj scienculoj, povus decidi pri tiu demando. Ĉiu lingvo havas ecojn, bonajn kaj malbonajn, sed ili ne estas mezureblaj. Tiel same rilate al artefaritaj lingvoj. Ni ja scias, ke Esperanto neniel cedas al aliaj sistemoj rilate facilecon, bonsonecon kaj uzeblecon, sed ni ankaŭ bone konscias, ke aliaj sistemoj, kreitaj aŭ kreotaj, povus prezenti similajn ecojn. Se la aludita komisiono devus elekti nur inter projektoj, ĝi kredeble diskutus longege kaj, kiel kutime okazas, aŭ decidus nenion aŭ aliĝus al hibrida kompromiso, kiu ne estus vivkapabla. Ni riskus esti ĉiuj mortintaj, antaŭ ol scii, kia estos la definitiva formo de la lingvo.

Sed, feliĉe, ekzistas grava elemento, kiu povas gvidi la komisionon kaj kvazaŭ trudi al ĝi solvon, nome la praktika disvastiĝo kaj uzateco de la lingvo. La ideo pri teoria perfekteco estas pure subjektiva; kontraŭe, la disvastiĝo de lingvo kaj ĝia praktika utileco estas io pozitiva, konkreta, objektiva, rekon- ebla de ĉiuj, preskaŭ mezurebla. Ne la teorie plej „perfekta“ sistemo venkos — tiuj vortoj ne havas sencon — sed la plej vaste uzata, la plej multe spertita en la diversaj fakoj de la homa vivo, la plej komplete prilaborita, unuvorte la plej vivanta.

La disvastiĝo de sistemo estas cetere la konkreta pruvo pri ĝia taŭgeco. Se al la enketa komisiono, ni ekzemple povas diri kaj pruvi: ekzistas tiom da esperante redaktitaj gazetoj, ne sole propagandaj, sed ankaŭ fakaj kaj partiaj, abonitaj de tiom da personoj, tiom da libroj literaturaj, sciencaj kaj teknikaj estas eldonitaj, tiom da servoj komercaj, turismaj kaj aliaj jam estas faritaj per Esperanto, niaj organizaĵoj kalkulas tiom da membroj, nia lingvo jam estas uzita en tiu kaj tiu ĉi kongresoj, kiujn ĉeestis tiom da personoj, tiaj kaj aliaj praktikaj aplikoj jam estas sukcese realigitaj . . . , se ni tiel povas paroli, komisiono konsistanta el saĝe pensantaj homoj ne hezitos elekti Esperanton kaj subteni nian agadon per la potencaj rimedoj, kiujn ĝi disponos, ĉar ĝi komprenos, ke estus tute malsaĝe rekomenci jam faritan tre valoran laboron.

Ni do ne pensu, ke ĉar tia komisiono iam esploros la problemon, ni devas trankvile atendi ĝian verdikton; kontraŭe, ĝuste de nia agado dependas tiu verdikto. Ju pli forta estos la Esperantomovado, ju pli utila estos nia lingvo, des pli verŝajna kaj facila estos ĝia oficialiĝo.

Tio montras al ni la vojon sekvotan: Paralele kun la klopodoj, kiujn laŭ la cirkonstancoj ni povas fari ĉe la oficialaj rondoj por vigligi ilian atenton, ni devas energie labori por propagandian lingvon kaj plimultigi ĝiajn praktikajn

aplikojn. Jen la kerno de la problemo. Klopodoj farataj en la nomo de movado, kiu ne havus jam profundajn radikojn en sufiĉe vasta homgrupo, estus senefikaj.

La milito ne detruis nian movadon, sed malfortigis ĝin. La plej urĝa tasko, kiun neniu oficiala klopodo povas anstataŭi, estas ĝin restarigi kaj rearanĝi laŭ la principo de maksimuma efikeco. Ni devas ĉion fari kvazaŭ la registaroj ne interesigus al ni; tio estas la plej bona rimedo, por ke ili estu iam kun ni.



(Majo 1919)

IV.

La celo de nia propagando estas la formado de veraj esperantistoj, t. e. de personoj bone sciantaj nian lingvon kaj ĝin uzantaj. Por atingi tiun celon, ni skribas artikolojn, faras paroladojn, aranĝas kursojn, sed la faktoj devigas nin konstati, ke el la multaj personoj, kiuj eklernas Esperanton, nur malmultaj fariĝas „veraj esperantistoj“. El esperanta kurso, kiun komence vizitas ekzemple trideko da lernantoj, ofte nur la duono persistas ĝis la fino, kaj el tiu duono tri aŭ kvar daŭrigas poste interesiĝi al nia movado. Lernis nian lingvon verŝajne unu miliono da homoj, sed UEA, celanta kunigi la esperantistojn, kiuj havas internaciajn

interesojn, kalkulas nur kelkajn milojn da membroj. Do, granda diferenco inter la peno kaj la rezulto.

Tiu stato havas kaŭzojn. La unua kompreneble estas, ke la pli multaj homoj estas ne persistemaj. La mondo estas plena de diletantoj, kiuj entuziasme eklernas ian lingvon, sciencon aŭ sporton, sed post kelka tempo malentuziasme forlasas la komencitan laboron. Kontraŭ tiu malbono, de kiu suferas ankaŭ aliaj progresemaĵoj, ni estas ja senpovaj. La esperantistoj havas nek la celon, nek la povon ŝanĝi la homan naturon. Sed tiu ĝenerala kaŭzo ne sufiĉas por klarigi la supre aluditan mankon. Alia grava kaŭzo kuŝas en tio, ke lerninte nian lingvon multaj ne uzas ĝin, ne scias kiel ĝin uzi kaj sekve forgesas ĝin rapide.

Ekzistas esperantistoj, kiuj opinias, ke Esperanto estos venkinta, kiam per registara dekreto ĝi estos devige instruata en la ĉiulandaj lernejoj. Ili konsideras la tutan problemon nur el tiu vidpunkto. Nu, tio tute ne sufiĉas. Se samtempe kun la instruado en la lernejoj, oni ne aranĝas praktikajn servojn, per kiuj la lernintoj povos tuj utiligi la ĵus akiritan scion, oni atingos tre mizeran rezulton. En ĉiuj gimnazioj de la mondo oni nuntempe instruas la latinan lingvon. Praktike ĝi estas senutila, krom al la kleruloj sin okupantaj pri filologio, al la katolikaj pastroj kaj . . . al la profesoroj de latina lingvo. Ĉar la lernintoj ne

havas la okazon ĝin uzi, ili forgesas ĝin kelkan tempon post la eliro el la gimnazio. Certe, la latina lingvo estas multe pli malfacila ol Esperanto, sed oni aliparte dediĉas al ĝia studado multe pli da tempo. En la mezepoko la latina lingvo ne estis pli facila ol nun; tamen preskaŭ ĉiuj intelektuloj uzis ĝin, skribis en ĝi siajn verkojn, parolis ĝin. Nuntempe oni ĝin instruas al pli multaj homoj ol antaŭe, sed ĝi estas multe malpli utila. Tio montras, ke ne sufiĉas instrui lingvon en la lernejoj, por ke ĝi estu vivanta lingvo, praktike uzata.

La klopodoj por instigi al la uzado de la lingvo estas do ne malpli gravaj ol la propagando. Al la vorto „uzado“, oni kompreneble ne devas doni tro mallarĝan, nek tro materian sencon. Spirita utileco ne estas malpli ŝatinda ol materia. Al la turisto, kiu uzas ĝin dum vojaĝo eksterlande, Esperanto estas utila; ĝi estas utila al la komercisto, kiu per ĝi trovas novajn klientojn, sed tio estas nur la plej konkretaj kazoj. Esperanto estas ankaŭ utila al la persono, kiu per ĝi korespondas kun eksterlandanoj kaj tiamaniere plivastigas sian spiritan horizonton, ekkonas fremdajn morojn, kondiĉojn, ideojn; ĝi estas utila ankaŭ al tiu, kiu ŝatante la lingvon mem, tradukas en ĝin kaj tiel pliakrigas sian lingvosenton kaj pliriĉigas siajn kapablojn. Esperanto ja multmaniere povas esti utila, sed tiun utilecon ĝian oni devas sentigi al

la varbitoj kaj pligrandigi. Ni konstante devas serĉi, kiel oni povas igi nian lingvon pli lerninda, ĉar pli utila. Gvidi kurson estas nur parto de la tasko de niaj propagandistoj kaj eĉ la plej facila; ĉefa estas konservi kaj daŭre alligi al Esperanto la varbitajn personojn. Pri tio oni ne sufiĉe atentis. La kursestro kredas, ke lia tasko finiĝis, kiam li atingis la lastan lecionon; fakte, nur tiam ĝi komenciĝas. Peti de la lernintoj kotizaĵon por la grupo kaj aranĝi feston por soleni ilian esperantistigon tute ne sufiĉas; oni devas, jam dum la kurso, doni okupon, celon al ĉiu lerninto, sentigi al li, ke Esperanto estas nur ilo, kiun li uzu por siaj interesoj. Ĝuste tial estas multe pli bone aranĝi kurson por samprofesianoj kaj sampartianoj, al kiuj oni povas de la komenco montri komunan praktikan celon, kiu ilin ĉiujn interesas, ol ĝeneralan kurson, kie partoprenas ĉiuprofesiaj kaj ĉiukondiĉaj personoj sen io ajn komuna inter ili krom la deziro lerni Esperanton. Ankaŭ pro la sama kaŭzo malgrandaj kursoj, kie la instruanto povas okupiĝi pri ĉiu unuopa lernanto, estas pli bonaj ol grandaj kursoj, kie la individueco de la lernantoj malaperas. Ni neniam oferu la kvaliton al la kvanto.

Tiel same ni ankaŭ ne devas kredi, ke ĉiu ajn homo nuntempe povas fariĝi vera esperantisto. Oni ofte vidas en esperantaj kursoj kaj grupoj per-

sonojn, kiuj ne bezonas nian lingvon, ĉar ili ne havas ian internacian intereson. Ili mem ne scias, kial ili ĝin eklernis. Nur al la festoj kaj dancoj organizitaj de la grupo ili interesiĝas. Tiaj dancemaj „esperantistoj“ ofte tedpelas el la grupoj la pli seriozajn individuojn, kiuj vidas en nia afero ion pli altan ol pretekston por amuziĝoj. Inverse, ekzistas multaj personoj, kiuj jam nun havas internaciajn interesojn, sed ne lernas Esperanton, kvankam ĝi al ili povus esti utila. Ekzemple, ĉe la lasta internacia socialista konferenco en Bern, kies ĉiuj partoprenantoj ofte rilatis kun eksterlandaj sampartianoj kaj kies idealo estis internaciema, neniu sciis Esperanton kaj eĉ la pli multaj apenaŭ konsciis pri la graveco de la problemo; tamen la maloportunaĵoj de la lingva diverseco estis evidentaj kaj konfesataj de ĉiuj.

Ĝis nun ni proponis Esperanton al ĉiuj homoj, tute egale, ĉu ili bezonas ĝin aŭ ne. Multegaj ĝin eklernis, sed nur kelkmiloj ĝin ellernis kaj uzas. Ĉu estonte ne estus pli saĝe turni nin unue al tiuj, kiuj jam nun povus tuj utiligi Esperanton por siaj profesiaj aŭ ideaj bezonoj? Unu tia varbito pli valoras ol dek festemuloj, kiuj balbutas Esperanton. Nepre ni devas pli kaj pli klopodi por enkonduki Esperanton en la specialistajn rondojn, al kiuj ĝi tuj povas utili. Sed por esti efikaj, tiuj klopodoj devas esti internaciaj kaj

samtempaj. La plej laŭdindaj iniciatoj restas sen-efikaj, se ili estas pure lokaj. Multe pli bone estas esperantistigi dudek samprofesianojn loĝantajn en dudek diverslandaj urboj kaj ilin tuj interrilatigi por praktika kunlaborado, ol esperantistigi cent en la sama urbo.

Koncerne la praktikan utiligon de nia lingvo, oni devas konstati, ke de post la kreo de UEA kaj grandparte sub ĝia rekta aŭ nereakta influo, atentindaj progresoj estis faritaj. Antaŭ la milito multaj interesaj praktikaj aplikoj jam estis realigitaj kaj pruvis, kiom nia lingvo povas utili, eĉ kun la ĝisnuna nombro de adeptoj. Oni devas daŭrigi energie laŭ tiu direkto, kaj unue restarigi tion, kion detruis la milito. Gravaj progresoj povas kaj devas esti farotaj. Esperanto ne ankoraŭ estas tiel utila kiel ĝi povus esti, se ĉiuj esperantistoj dediĉus sian tutan atenton al tiu ĉefgrava problemo. Ankoraŭ tro multaj en niaj vicoj opinias, ke Esperanto estos utila nur kiam ĝi estos tutmonde disvastigata. Ankoraŭ tro multe da grupoj havas ekskluzive lokan vidpunkton kaj neniel interesigas pri tio, kio okazas trans la horizonto de ilia urbo. Ankoraŭ tro multaj esperantistoj konsideras Esperanton kiel aferon, pri kiu oni okupiĝas (aŭ eĉ ne okupiĝas) dum unu horo semajne ĉe la grupkunveno, sed pri kiu oni seninteresiĝas dum la cetera tempo, kvazaŭ ĝi estus nur ludo. Tio, kion ni emfaze nomas la „triumfo

de nia afero“ ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto „triumfas“ ĉiufoje kiam ĝi servas al iu.

Super

(5 Januaro 1915)

Ne konvenas nun aŭdigi ŝafblekojn por la paco. La potenculoj de la tero volis (ĉu ili vere volis aŭ ĉu ilin voligis la cirkonstancoj?), ke la kanono parolu. Ni lasu ĝin paroli. Se ĝi dume helpus resaĝigi la homaron, ni nur povus ĝin beni.

Sed ĉu ni, esperantistoj, kiuj dum jaroj kantis, ke „la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian“, — kiuj esperis je tempo, kiam „dissaltos la obstinaj baroj“, — kiuj deziris amikan kunlaboradon inter ĉiuj popoloj (ĉar mi ankoraŭ kuraĝas kredi, ke tia estis la deziro de ĉiuj veraj esperantistoj), ĉu ni ne havas, krom la devojn al la propra patrujo, aliajn specialajn devojn ankaŭ ne flanklasindajn?

Ni havas la devon *ne forgesi*.

Ne forgesi tre elementan veron, kiun la pli granda parto de niaj samtempuloj — kleraj aŭ ne — ne plu atentis kaj neniam bone atentis.

Nome, ke eŭropanoj (mi uzas tiun vorton por montri la reprezentantojn de la nun militantaj

landoj) estas kaj restas *homoj*. Tiuj homoj por ni esperantistoj ne loĝas en malproksima planedo aŭ en gazetartikoloj. Ni vidis ilin, ni kontaktiĝis kun ili, ni konstatis, ke ili estas estaĵoj el la sama esenco. Evidentaĵo, sed evidentaĵo ĉiam malatentata. Ni eĉ amikiĝis kun kelkaj, ne zorgante, ĉu ili apartenas al lando amika al nia. Ni konstatis, ke per multaj flankoj ili estas samaj al la homoj de nia hejmolando. Ni ankaŭ sentis — ni estu honestaj! —, ke per kelkaj flankoj ili diferencas de ni, sed anstataŭ nin forigi de ili, tio nin interesis kaj ofte allogis. (Plie, ĉu via najbaro loĝanta en la sama domo ne diferencas de vi? ĉu vi ĉiam lin amas?) Ni spertis, ke tiuj diferencoj ne malhelpis nin kunlabori. Ni multe disputiĝis inter esperantistoj; ni ne ĉiam amis unu la aliajn kiel fratoj sed niaj disputoj okazis inter individuoj, ne laŭ nacioj. Super la landlimoj ni estis, super ili ni pense restu.

Ni vojaĝis fremdlande, kaj ni vidis, ke tiuj „fremduloj“, kiuj kuras sur la stratoj, similas al tiuj, kiujn ni vidis en la patrolando. Se ni eniris iliajn hejmojn, ni konstatis, ke ilin agitas samaj pasioj, ilin vivigas samaj espero, ilin movas samaj apetitoj. Kaj el la konstato de tiuj analogiaĵoj, ni ĉerpis vivigan konkludon pri la ebleco inter ili de paco (ne de „frata“!) kunlaborado, kiun plifaciligos komuna neŭtrala lingvo, ilo de komuna kulturo.

Ĉu ĉiuj tiuj faktoj fariĝas malveraj, ĉar la anarkia kaj arkaika stato de Eŭropo kondukis al sanga solvo — konsekvenco de sistemo pli ol de homoj?

Ĉu, ĉar homoj agas kiel lupoj, konvenas, ke ni ankaŭ kuniĝu al la lupoj kaj kunbleku?

Ĉu, ĉar en tiaj momentoj malaperas individuaj opinioj en gentaj kolektivaj opinioj, ni estas devigataj forlasi prudenton kaj esperon?

Flanke de niaj simpatioj, ni havas devojn, kiujn al ni trudas nia esperantisteco. Plenumante ilin, ni laŭ nia povo utile laboros por la paco — ne tiu paco, kiun diplomatoj enskribas en efemeraj traktatoj, sed tiu paco, kiu engravuriĝas en la koro de la homoj kaj fariĝas bazo de ĉiu posta alproksimiĝo.

Devo kredi, ke neniu popolo havas la monopolon de la civilizeco, de la kulturo aŭ de la humaneco. Nia civilizeco estas ŝuldata al la pensuloj apartenantaj al la plej diversaj gentoj, el kiuj kelkaj jam de longe malaperis el la historio; ĝi disvolviĝis dank' al la sinsekva laboro de ĉiuj popoloj; ĝi estas la verko ne de tiu aŭ alia nacio, sed de la diverslandaj elitoj. Sendube, la popoloj ne same laboris kaj ne samtempe elmontris sian ĉefan agadon. Ni scias, ke tute samaj ili ne estas, sed ĉiu el ili alportis aŭ alportos ion originalan al la komuna posedaĵo de la homaro. Iu pli fervore

sin dediĉas al la teknika kulturo; ĝi akiras la severan ordon, kiu ĝin regas. Al tiu alia pli plaĉos la interbatalado de la ideoj, la studo de la homo, la literatura kulturo. Alian priokupos pli speciale moralaj problemoj, kiuj sieĝas ĝian maltrankvilan animon. Alia dediĉos sian praktikan genion al la vastaj entreprenoj de la komerco. Kiu povus diri: tiu ĉi estas pli utila ol tiu? Ĉu pli utila estas la panisto, kiu nutras nin, la tajloro, kiu vestas nin, aŭ la pensulo, kiu nin instruas?

Ni ne kontraŭmetu naciajn kulturojn kaj ne provu starigi inter ili ian hierarkion. Ĉiuj estas nur partoj de tiu komuna monda civilizeco, frukto de ĉiuj homoj, kiuj pensis kaj agis. Se ni ne egale komprenas tiujn naciajn kulturojn, anstataŭ ol ekskomuniki, ni almenaŭ toleru ilin pro la amo, kiun al ili havas milionoj da homoj.

Devo kredi, ke neniu popolo entute havas la monopolon de la barbareco, perfideco aŭ stulteco. Nur individuoj kaj la milito estas respondaj. En la ĉiutaga vivo, ĉe nia propra lando, ni renkontiĝas kun tiaj homoj, kiujn ni juĝas barbaraj, perfidaj aŭ stultaj. Eĉ la sama homo, ĉe iaj momentoj de sia vivo, montriĝas barbara, perfida aŭ stulta, same kiel ĉe aliaj momentoj li estas bona, humana kaj prudenta. Aldonu al tio, ke la milito malkovras kaj ekstremigas ĉiujn primitivajn instinktojn, kiujn laŭeble bridigas la socia vivo. Vi scias, kiel mal-

facile estas senpartie juĝi unu homon en unu el liaj agoj, vi scias, ke la milito transformas la animstato de la homoj, kaj vi volas juĝi tutan popolon pro la agoj de individuoj regataj de instinktoj ne plu reteneblaj! Ĉu vi povas ĵuri, ke vi ĉiam agos humane en similaj cirkonstancoj, ĉu vi povas ĵuri, ke neniam la kolero — pravigita aŭ ne — kondukis vin al agoj, kiujn vi poste bedaŭris kaŝe aŭ malkaŝe?

Kulpaj estas nur la milito kaj la sistemo, kiuj igis ĝin ebla, ne la homoj, kiuj estas nur ludiloj de la hazardoj, tuj kiam la sociaj reguloj kaj akiritaj kutimoj ne plu regas iliajn instinktojn.

Devo konservi prudenton eĉ meze de la premigaj influoj de la popolamasoj. La popolamasoj estas kapablaj je grandaj heroaĵoj, sed ankaŭ je grandaj krimoj. Ili agas ĉiam ekstreme kaj juĝas laŭ siaj pasioj, eĉ se ili kredas paroli en la nomo de la racio. Diskuti, ekzameni, dubi ili ne ŝatas. Ili bezonas solvojn absolutajn. Kelkaj belŝajnaj vortoj trafe esprimitaj sufiĉas por ke ili verŝu sian sangon — kaj verŝigu la sangon de la aliaj.

Sed utile estas, ke kelkaj individuoj konservu prudenton kaj sin gardu kontraŭ la ekstremaĵoj de la popolamasoj. Tian rolon ni esperantistoj povus havi. Pli bonan estontecon ni povos prepari, nur se dum la krizo ni estis sufiĉe fortaj por ne perdi niajn konvinkojn.

La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado. Kiam centmiloj da homoj kuŝos en la bataltomboj kaj la ruinoj ĉe la venkintoj kaj venkitoj atestos pri la teknikaj pli ol pri la moralaj progresoj de nia civilizeco, tiam oni alvenos al iu solvo, kaj tiam, malgraŭ ĉio, la internaciaj rilatoj denove ligiĝos, ĉar super la nacioj estas tamen io . . . Se sur la nunaj ruinoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonos tiajn laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj de la rekonstruado. Tiaj laboristoj estos la diversnaciaj elitoj, kiuj sen antaŭjuĝoj kaj en spirito de reciproka toleremo, altigos siajn rigardojn super la horizonto de la landolimoj naciaj, kaj konscios pri harmonia civilizeco, sufiĉe larĝa por enteni ĉiujn naciajn kulturojn, sufiĉe tolerema por konsideri ilian diversecon kiel bonfara necesajo. Tiuj laboristoj ne malŝatos la militon; ili ĝin deklaras al la sistemo, kiu permesas kaj kaŭzas tiajn buĉadojn; ili ĝin deklaras al la antaŭjuĝoj, al la krudaj instinktoj, al ĉiuj hontoj, kiuj senhonorigas la homaron kaj kiuj restos ĉiam sufiĉe multaj por ke la estontaj generacioj ne timu malfortigan ripozon.

Ni, esperantistoj, estu la embrio de tiuj estontaj elitoj. Por inde plenumi nian taskon, ni konservu nian idealon kaj ne lasu nin subpremi de la malespero aŭ de bedaŭro.

La veran progreson ne kreis la homoj, kiuj genufleksis antaŭ ĉiuj akceptitaj ideoj kaj blinde sekvis la popolamasojn. Ĝin kreis la homoj kun forta konvinko, kiuj sciis renversi la antaŭjuĝojn kaj transformi la opiniojn.

Pri eminentuloj

(5 Februaro 1915)

La nuna tempo plifortigis multajn antaŭjuĝojn. Ĝi ankaŭ diskrevigis kelkajn iluziojn. Inter tiuj lastaj mi esperas, ke grave minacata estas la kredo pri la spirita supereco de la „eminentuloj“.

Eminentuloj ili efektive estis la oficialaj sciencistoj, verkistoj, pensuloj — laŭreatoj, akademianoj, ordenuloj, premiuloj — kiuj, en la penso de la profanoj, ne sole reprezentis la homan sciencon en ĝia plej alta grado, sed ankaŭ vole-nevole aperis kiel la spiritaj kondukantoj de nia moderna civilizacio, kiel elito ili ŝajnis esti.

Respektataj, glorataj, potencaj, ili estis la pastroj de la Scienco, de la Scio, de la Prudento — de ĉio, kio altigas la homaron super la bestaro. Multajn diaĵojn kaj idolojn renversis la homoj en la daŭro de la historio, sed eĉ la plej renversemaj kliniĝis antaŭ la diaĵo Scienco, kaj kiam ĝiaj pastroj, forlasante siajn laborejojn, bonvolis ĵeti rigardon super la mondscenejo kaj prijuĝi la

problemojn de la nuna horo, ĉiuj homoj atente aŭskultadis kaj respektplene komentariis la orakolojn, kiuj falis el la eminentulaj lipoj. Oni aŭdis adorantojn, kiuj bedaŭris, ke tiuj altaj spiritoj ne pli aktive interesigas pri la nunaj realaĵoj kaj tro restas en la kampo de la teorioj. Filozofoj eĉ ekzistis, kiuj revis pri homaro gvidata kaj regata de korporacioj el sciencistoj, pensuloj, filozofoj...

Kaj, jen, tiuj kondukantoj de la nekleraj popolamasoj fariĝis kondukatoj. Tiuj elituloj transformiĝis en servantojn. Meze de la nunaj katastrofoj, ĉirkaŭ la eksplodoj de malamoj kaj fanatikecoj, ili ne aŭdigis la moderigan voĉon de la eterna homa saĝo. Vana eble restus ilia protesto kontraŭ la milita frenezo, ĉar ne multe valoras nun vortoj. Sed restus la honoro, ke ili ĝin faris; restus la espero, ke ili, eminentaj sciencistoj, gloraj verkistoj, respektataj pensuloj, penas stari super la naciaj limoj kaj rifuzas senrezerve partopreni en la manifestacioj de ekskomunikado kaj netolerado, kiujn postulas la plej blinda kaj la plej kruda el la fanatikecoj: la genta fanatikeco. Silenti estus alia, malpli brava, sed deca protestmaniero, kiu akordiĝus kun la sereneco, kiun ni aljuĝas al la scienco. Sed protesti postulis tro da karaktero, kaj silenti signifis tro da modesteco. Ĉiulande ili do parolis. Ne por iel malakrigi la malamojn, ne por aŭdigi voĉon de prudento kaj

kompato, ne por antaŭgardi la popolamasojn kontraŭ la trograndigoj de la naciaj pasioj, ne por admoni la homojn, ke homoj ili restu! Ne, sian klerecon ili servigis por pravigi ĉiujn plenumitajn faktojn; ĉian inklinon al justeco kaj reciproka komprenemo ili forĵetis; al ĉiuj impulsoj de la pasioj ili cedis, kaj anstataŭ limigi la fajron ili ĉion faris por ĝin intensigi.

Kelkaj el tiuj eminentuloj jam de longe forĝis kaj predikis doktrinojn de malamo kaj mortigo, ĉar ilia unuflanka spirito vidis en la historio nur la regadon de la krudaj fortoj. Aprobi aŭ pravigi la nunan katastrofon ili ne bezonis; ĝi ja konfirmis iliajn teoriojn (aŭ ĉu iliaj teorioj ne igis la militon pli akceptebla, kaj sekve pli ebla?). Sed aliaj ŝatis pacemajn idealojn; ili volonte predikis la regadon de la justeco intergenta kaj anoncis, ke la scienco, la kulturo reunuigos la homojn. Tuj, ili forĵetis sian idealon aŭ kripligis ĝin, kaj, por pardonigi siajn „erarojn“, ili pli laŭte kriis, kaj el iliaj buŝoj eliras strangaĵoj, kiuj nuligas ĉion de ili antaŭe diritan.

Generaligi konstaton kaj kondamni tutan korporacion pro la eraroj aŭ devojigoj de kelkaj, eĉ multaj, el ĝiaj anoj, oni neniam devas. Mi estas certa, ke iuj kleruloj interne malaprobas kaj hontigas. La publiko ne atentis pri ili; ĝi nur aŭdas la kriojn de la eminentuloj, kiuj per sciencovest-

itaj artikoloj penas nutri la antaŭjuĝojn kaj rebarbarigi la homaron.

La sintenado de la „elituloj“ mirigis kaj iafoje konsternis. Tamen, la klarigo de tiu fenomeno ne estas malfacila. Kompreninte ĝin, ni fariĝos pli indulgemaj al la aŭtoroj de tiuj ekscitoj kaj estonte malpli atentemaj pri iliaj opinioj. Antaŭ ĉio sciencisto, pensulo, verkisto, estas homo. Liaj agoj, kiel ĉe ĉiuj homoj, estas regataj ne nur de la racio, sed ankaŭ — precipe — de la sentoj. Kiam li agas en sia fako, scienculo laboras en la kampo de la racio. Al sia studaĵo li aplikas aŭ penas apliki severe sciencan metodon: nenion aserti, kio ne estis zorge observita, kontrolita, eksperimentita; priatenti senpartie kaj objekte ĉiujn faktojn, nenion bazi sur dubaj analogiaĵoj aŭ senfundamentaj hipotezoj. Sed, plej ofte, elirante el sia specialaĵo kaj enpenetrante la vivon, la scienculo tiam, rilate al la opinioj kaj juĝoj, refariĝas simila al ĉiuj homoj, ĉe kiuj sentoj kaj instinktoj estas ĉefa motoro de agado. Li kredas ankoraŭ paroli en la nomo de la racio, sed li nur uzas la lingvon kaj eksterajn formojn de la racio por esprimi opiniojn aŭ ideojn sin apogantajn sur la sentoj, la instinktoj, la pasioj. Tiel, povas klariĝi faktoj unuavide strangaj: Tia scienculo, tre prudenta kaj racia en sia fako — fiziko, ĥemio, juro, filozofio — agas tute malracie en sia privata vivo. Ekstreme

skeptika kaj singardema pri ĉio, kio koncernas lian specialaĵon, li ekster ĝi fariĝas ofte tre naiva kaj mirige kredema. Alia, tre severa en sia metodo aplikata al difinita studaĵo, ripetanta multfoje eksperimenton aŭ elpensanta ĉiuspecajn kontrolojn de siaj observoj, antaŭ ol publike elmeti sian opinion, tre akra kontraŭ kolegoj nesufiĉe metodemaj kaj raciaj, ne timas — ekster sia fako — juĝi tutan popolon laŭ kelkaj individuoj aŭ kelkaj malmulte konataj libroj, ekskomuniki naciojn, kiujn li ne konas, solvi komplikajn demandojn sen ia ajn ekzameno kaj ofte sen la plej supra informigo, unuvorte agi laŭ sia fantazio, submetante al ĝi la faktojn.

Trans la kampo de ili ordinare plugita, la kritiksento kaj observemo ĉe scienculoj aŭ literaturistoj estas surprizige nuligataj. Kiam, pli malfrue, oni relegos la skribaĵojn de niaj eminentaj samtempuloj — se oni ilin relegos — rilate al la nunaj okazantaĵoj, oni miros, kiel unuflankaj, malĝustaj, banalaj ili estis. Maloftaj estas ĉe ili noblaj aŭ grandaj pensoj; kontraŭe, oni trovos multajn diskutacojn, atakojn, miopajn konsiderojn. En tiu rilato ofte tre superaj estas la leteroj, kiujn skribas militistoj el la bataalkampo. Pli sinceraj ili estas, pli noblaj, ĉar travivitaj kaj skribitaj per sango, pli justaj al la malamiko ankaŭ. La viroj, kiuj sin reciproke pafas ĉe la batalo, pli rapide repac-

igos ol la eminentuloj ĉiuspecaj kaj ĉiulandaj, kiuj en la gazetoj havas la facilan taskon eksciti la malamojn.

En la lasta artikolo mi aludis pri la necesaj „elitoj“, kiuj altigos sian rigardon super la naciaj limoj. Oni povas antaŭvidi, ke en tiuj elitoj ne partoprenos multaj eminentuloj. Tiuj ĉi montris per siaj agoj, ke same kiel ĉiuj homoj kaj eĉ en malpli facile kuracebla grado, ili estas submetataj al la premado de la gentaj pasioj. Por puŝi la homaron al novaj vojoj, la karaktero estos pli necesa ol la scienco.

La popolo suferas kaj ĝemas. Senkulpa ĝi estas la viktimo de fatalaĵoj, kiujn ĝiaj kondukantoj neniam sincere penis dispeli. Ni esperu, ke el ĝia mizero mem naskiĝos la savontoj, kiuj disrompos la barojn kaj reunuigos la homaron.

Pensu pri la estonteco!

(5 Marto 1915)

La estimo al la malamiko estas la unua paŝo al reala alproksimiĝo. Ĝi lasas esperigi solvojn, kiujn la sola racio, konsiderante nur la krudajn faktojn, ne kuraĝus antaŭrigardi.

La batalo por la vivo ofte prezentas al ni la okazon konsideri kiel kontraŭuloj individuojn, kies interesoj — pro cirkonstancoj de ni neregeblaj —

kontraŭstaras niajn interesojn. Je ĉiu vojturniĝo ni renkontas ilin, kaj je la kontakto de niaj kontraŭaj deziroj, ni interbatalas. Malgranda milito, kiu, same kiel la granda, postulas la streĉiĝon de ĉiuj niaj fortoj, kaj disvolviĝas en la kadro de komune akceptitaj konvencioj. Sed se la kontraŭulo, kiu ĝis tiam restis kontraŭulo nur rilate al niaj interesoj, uzas malkorektajn procedojn, se ni konstatas ĉe li karakteran malsuperecon kaj inklinton al mallojaleco, tiam nia kontraŭeco ŝanĝiĝas en personan malestimon, kiun ne finos eĉ posta reakordiĝo pri interesoj. Al la kontraŭstaro de la materiaj vidpunktoj, aldoniĝas sento pri plena spirita aparteco kaj malestimo. Ne sole la agoj de la „malamiko“ vekas nian antipation, sed lia personeco mem.

Kontraŭe, se li agas korekte, aŭ, pli ĝuste, en la limoj, kiujn permesas la ideo pri lojala batalo por la vivo, povas naskiĝi estimo al lia personeco. Tio ne tuj ĉesigas la batalon, sed lasas la esperon, ke ĝi iam finiĝos, kiam malpli akra estos la kontraŭeco de la interesoj. Super la batalekampo de la vivo, la antaŭaj „malamikoj“ iam povos fratiĝi kaj konscii pri vivo, ĉe kiu ili batalos unu kun la alia kontraŭ io alia.

La kolektiva animo de la nacioj submetiĝas al samaj influoj. La hazardoj de ŝanĝiĝema politiko, helpataj de la primitiva anarkio, en kiu vivas la

nacioj unu rilate al la alia, ofte devigas la popolojn sin reciproke kontraŭbatali. Sed multfoje ne la malamo ilin puŝas unu kontraŭ la alia; kontraŭe, de la milito rezultas jen malamo, jen estimo. Ialfoje oni parolas pri la „hereda“ malamiko, je kiu de la junaĝo ĉiu homo devas pensi. Se oni tralegas lernolibrojn de historio, oni konstatos, ke eĉ en unu jarcento la „heredaj“ malamikoj ŝanĝas ofte; de malamikoj ili transformiĝas en amikojn, same kiel la antaŭaj eternaj amikoj refariĝas „heredaj“ malamikoj, barbaraj kaj ekstermindaj. Kiam pesimistoj deklaras, ke „difinitaj popoloj neniam repaciĝos, ĉar tro da verŝita sango ilin apartigas“, oni povas retranskviliĝi rigardante al la historio. Oni vidas, ke popoloj, kiuj verŝis torrentojn de sango batalante unu kontraŭ la alia, malgraŭ tio repaciĝis, ne sole sur la papero de la traktatoj, sed — kio estas pli grava — en siaj animoj. Fakte, la verŝita sango ne tiel malproksimigas la popolojn kaj malhelpas ilian amikiĝon, kiel la malestimo, kiun ili havas unu por la alia. La malestimo naskas la malamon, ĝi ankaŭ plifortigas la memestimon, kaŭzo de tiuj blindigaj ambicioj, kiuj kondukis la popolojn al abismo. La nuna milito verŝigas riverojn de sango kaj larmoj. Ĝi estas abomena, kaj tamen la homoj rezignacias, ĉar ĝi aperas al ili kiel kruda naturforto, kontraŭ kiu ili nun ne estas pli potencaj ol kontraŭ ter-

tremo. Post kelkaj jaroj oni forgesos la sangon, la larmojn, la mizerojn, sed se el la nuna milito popolo sentas malestimon al alia, tiam la katastrofo suferigos ne sole nin mem, sed ankaŭ la estontajn generaciojn, ĉar ĉie ĝi estos lasinta ĝermojn de estontaj malpacoj: malestimon, malamon, venĝemon. Guste tio estas timinda. La estanta krizo kreas milojn de malfeliĉuloj. Tion oni ne plu povas eviti, sed estas ankoraŭ tempo eviti, ke ĝi starigu tro da kaŭzoj por estontaj buĉadoj.

En tiu rilato gravan influon havas la demando pri estimo de la nunaj malamikoj unu por la alia. Oni povas ĝin konsideri el du vidpunktoj: estimo pri la ecoj de la malamiko ĉe la batalo mem, nome kuraĝo, braveco, oferemo, — estimo pri la maniero laŭ kiu la malamiko kondukas la militon, nome humaneco kontraŭ la nemilitantoj, alkonformiĝo je la militleĝoj, ktp.

Rilate al la unua ni rimarku, ke komence ĉiu popolo opiniis siajn batalantojn la plej bravaj, la plej sentimaj, la plej heroaj. Post kelkaj semajnoj la militantoj mem konigis al siaj sampatrujanoj, ke, ĉe la malamiko ankaŭ, braveco, sentimo, heroeco ne estas maloftaj. Pri tio oni konvinkiĝos, legante leterojn senditajn el la batalkampoj, aŭ demandante soldatojn revenintajn de ĝi. Ke el ili ne eliras vortoj de amo, oni ne miros, sed plej ofte rilate al la ecoj de la malamiko, ili

esprimiĝas modere kaj juste. La malamiko kuraĝe faras sian devon. Ne tute same la diverslandaj militantoj reagis ĉe la emocioj de la bataalkampo; ne tute samajn ecojn ili havas, sed eĉ pri tio la faktoj renversis multe da akceptitaj ideoj. Militantoj, kiujn oni diris atakemaj kaj neobstinaj, montriĝis, laŭ la cirkonstancoj, necedemaj en la rezisto kaj obstinaj, kaj reciproke. Bravaj ili ĉiuj estis, kaj obstinaj, kaj paciencaj, kaj fervoraj, laŭ la necesajoj. La realeco ankaŭ montris, ke la tiel nomataj „militistaj ecoj“ (braveco, pacienco, sinoferemo, malŝato de l' morto) tute ne estas la monopolo de iu ajn armeo. Tiuj ecoj estas komunaj al homoj de ĉiuj landoj, se nur ili estis taŭge edukitaj laŭ samaj principoj. Al la militkampo ĉiuj iris decideme kaj kuraĝe, ĉar ĉiuj kredis, ke la patrujo estas atakata, kaj sian devon ĉiuj plenumis kun sama fervoro. Tial, iafoje el la komuneco de iliaj sentoj, super la tranĉeoj, ellaboriĝas fadeneto de solidareco, tremanta signo de la iama posta reakordo, dum vi, nemilitantoj, vi, eminentuloj, sangon, venĝojn, ruinigon, vi postulas! Eraraj ideoj disflugis. Sur la bataalkampo la viroj montriĝis egalaj, kaj se la sorto volas, ke iam tiuj samaj viroj retroviĝu flanko ĉe flanko dum super ni ĉiuj denove regos la paco, ili povos sen ia kaŝita penso rigardi unu la alian. La malamiko forkuras hontinde nur ĉe la ilustritaj ga-

zetoj. La partoprenintoj je la veraj okazintaĵoj rakontos al vi, ke ne tiel ĝi estas. La maniero mem, laŭ kiu estas farata tiu milito, ĝia restada stato, ĝia longa daŭro, konkludigas je la egaleco de la militistaj ecoj ĉe la batalantoj. Jen estas instruo por ĉiuj, kiuj vidis en la milito decidigan ilon por selektado inter la popoloj. En la real-eco, ĝi detruas la pli fortajn homojn, kaj fine ĝi pruvas nenion pri la grado de ilia braveco. Ĝi ja montras ilian organizemon kaj iniciatkapablon, sed tiuj ecoj estas same konstateblaj ĉe paca tempo.

El la bataalkampo, je la konstato de tiu egala animo antaŭ la danĝero, la homoj akiros estimon je la kontraŭulo, kaj tiel ellaboriĝos sentoj kapablaj naski alproksimiĝon, kiam la militpasioj estos perdintaj sian akrecon. Kiom ajn da sango fluis inter du popoloj, nenio estas neriparebla, se el la militkontakto kreiĝis estimsentoj, se rigardante unu la alian, neniu popolo sentas sin humiligata en sia animo. En tiu ĉi rilato la nuna milito ĝis nun ne prezentigas sub malfavora aspekto.

Sed tre gravan rolon havas ankaŭ la demando pri la maniero laŭ kiu estas kondukata la milito, kaj en tiu rilato, ho ve! la ĝisnunaj konstatoj ne estas esperigaj. La tiel nomataj militleĝoj, krom tiuj, kiuj estas jam enradikigitaj en la kutimon kaj sekve ne plu bezonas esti formulataj, estis

ofte tute malrespektataj. Tiu fenomeno ne estas speciala ĉe tiu milito. Ĉe la lasta Balkana milito, pri kiu enketoj povis esti farataj en kondiĉoj de evidenta senpartieco, similaj observoj estis faritaj; la koloniaj militoj aŭ aliaj „civilizigaj ekspedicioj“ liveris ankaŭ abundan materialon. Tio ne estu komprenata kiel senkulpigo por la nunaj atencoj, sed ĝi almenaŭ montras, ke tio ĉi estas tro ĝenerala fenomeno por ke popolo povu aljuĝi la monopolon de la kruelaĵoj al iu alia. Cetere pri tiu demando, kiel pri ĉiuj aliaj, kiuj koncernas la interpopolajn rilatojn, singardemo kaj objektiveco estas necesaj. Ofte, tiaj faktoj, ĉar ili kaŭzas teruran impreson, estas trograndigataj. Sama kruelaĵo per disfamigo kaj pasado de buŝo al alia multobligas kaj pligraviĝas. Eĉ okazas, ke atestintoj, pro psikologiaj kaŭzoj (sugesto, timo) ne ekzakte tradukas la veron. Plie, pro la diversnaciaj mentalecoj, diferencoj de edukado kaj de fundamentaj vivprincipoj, plena unueco de juĝo ne estas atingebla. Sed, eĉ se oni priatentas tion, oni devas konfesi, ke restos ĉiam granda nombro da abomenaĵoj ne punitaj kaj neniel pravigeblaj, t. e. de agoj, kiujn la milito tute ne necesigis. Kaj ĝuste en tio kuŝas demando tre serioza pri la posta kunvivado de la nacioj en paca stato. Ĝi rilatas al sentoj pri ol al politiko, sed fine la sentoj movas la homon kaj kondiĉigas lian politikon.

Inter tiuj atencoj oni povas apartigi inter la individuaj ekscesoj kaj la kolektivaj ekscesoj. La unuaj estas klarigeblaj. Brutuloj, krimuloj, seksmaniuloj, sangebriuloj, ekzistas ĉiulande. Ni ne miru, ke dum la milito, kiu redonas la homon al la krudaj instinktoj, okazas agoj, kiuj en normala tempo kondukus siajn aŭtorojn rekte al la malliberejo. Ofte la kulpuloj ne estas troveblaj aŭ eĉ ne estas serĉataj, ĉu ĉar tiuj, kiuj devus puni, ankaŭ ne estas senmankaj, ĉu ĉar la militpremado ne lasas tempon por esploroj kaj juĝoj, kiuj ankaŭ en paca epoko ne estas tiel rapidaj. Oni ne kredas, ke nur malkleruloj estas kapablaj je tiaj agoj. La mondo de la sentoj kaj instinktoj estas mal multe influata de la racio. Kleruloj, ricevintaj ĉiuspecajn diplomojn, iafoje havas animon de barbaroj, kiu elmontriĝas libere tuj kiam la sociaj sankcioj malstreĉiĝas. Sed tiuj individuaj krimoj, kiel ajn naŭzigaj ili estas, estas fine solveblaj, ĉar ĉiu saĝa homo komprenas, ke je tiuj izolaj deflankiĝoj, li ne povas respondi tutan popolon. Tamen, estas evidente, ke ju malpli de tiaj atencoj okazos, ju pli punataj estos iliaj aŭtoroj, des pli facile malaperos la sentoj de abomeno, kiun ili kaŭzis. Granda nombro da nepunitaj individuaj krimoj fine aspektus same kiel kolektiva krimo permesata.

Pli gravajn konsekvencojn havas, je nia vidpunkto, la kolektivaj atencoj, je kiuj estas re-

sponda armeo aŭ parto de armeo, kiel bruligadoj, rabadoj, perforto kontraŭ nemilitantoj, ktp. Tiuj kruelaĵoj postelasas terurajn malamojn kaj venĝ-sentojn ĉe la suferantoj, kiuj tiam nerezisteble kulpigas la tutan kontraŭan popolon. Certe, la akuzito tiam penas sin pravigi certigante ke tiel agi ĝi devis pro neceseco militista aŭ pro justa respondo al antaŭaj atencoj. Ofte, estas malfacile difini kiu unue estas riproĉinda, sed ofte ankaŭ oni povas klare juĝi, ke pro tre duba atenco aŭ maljustaĵo, oni punas amason de senkulpuloj. Por venĝi unu krimon — kiun humana esploro montras ofte neekzistanta — oni plenumas cent krimojn tre realajn. Por pravigi tiujn opajn atencojn, oni ne sole pretekstis, ke ili estas militnecesaĵo, bedaŭrinda sed neevitebla; oni ankaŭ pretendis sin apogi sur teorio (kio ajn malnobla okazos, oni ĉiam trovos klerulojn pretajn elpensi teoriojn por ĉion pravigi) nome: „ju pli kruela estas milito, des pli mallonga ĝi estas kaj sekve pli humana. La nemilitanta loĝantaro devas esti tiel tuŝata de la milito, ke ĝi estu devigata alvoki la pacon kaj agitadi por ĝi.“ La faktoj jam refutis tiun aserton. La nuna milito estas kruela ankaŭ por la nemilitanta loĝantaro; ĝi tamen estas tre longa. La kruelaĵoj kaj la atencoj al la nemilitantoj tute ne instigas la suferantojn al la paco, sed al la venĝemo kaj al profunda malamo direktata ne sole

kontraŭ la aŭtoroj de tiuj atencoj, sed kontraŭ la tuta gento. La viktimoj diskonigas siajn suferojn, kaj eĉ se la popolo, al kiu ili apartenas, estus inklina al la paco, sufiĉus, ke ili aperu kaj rememorigu pri la maljustaĵoj, kiujn ili suferis, por ke la pacaj sentoj cedu al la venĝemo. La ideo pri venĝemo estas profunde enradikigata en la homa naturo; ĝi estas la unua ŝtupo al la ideo pri justeco, kaj kiel ĉiuj pasioj ĝi estas ĉiupova motoro de agado. La milito kruele farita nutras tiun pasion kaj ĝin ekstremigas. Ĝi tute ne akcelas la pacon, kaj ĝi ĵetas ĝermojn de malamo kaj venĝemo, kiuj venenigos la vivon de la popoloj dum multaj jaroj. Certe, per si mem la milito estas abomena kaj kaŭzas pli da viktimoj ol ĉiuj kolektivaj atencoj, sed la homoj akceptas ĝiajn necesajojn, kaj, eĉ ne estante juristoj, sentas, kio estas evitebla kaj kio estas neevitebla. La individuajn krimojn ili eĉ fine absolvas, sed la kolektivajn atencojn, plenumitajn ĉu en la nomo de teorioj, ĉu por venĝi izolajn deliktojn, ili ne pardonas. Longan tempon vivos la rememoro pri ili en la animo de la nacio, kiu suferis ilin.

Je la vidpunkto de la estonta paco, kiun eĉ la plej militemaj, deziras longa, tiu demando estas ĉefgrava. El ĝi grandparte dependas la psikologia stato de la popoloj unu rilate al la alia post la milito. Se oni volas, ke la nuna katastrofo estu

finpunkto de longa serio de mizeroj, ne la komenco de nova serio, necese estas, ke en la animo de la popoloj ne enradikiĝu sentoj de profunda malamo. Tio havas ne sole sentimentalan, sed ankaŭ praktikan signifon, konsiderindan eĉ de tiuj, kiuj afektas malŝati ĉian idealismon kaj atenti nur la materiajn realaĵojn.

La sanga elprovado de la bataloj montris, ke rilate al la kuraĝo antaŭ la morto ĉiuj popoloj estas egalaj. La kondukado de la milito ankaŭ montru, ke ili havas manojn purajn je ĉiu senutila krimaĵo. Nur tiel ili povos realproksimiĝi sen suspekto kaj sen konscienciproĉo.

. . . Aŭ ĉu vi preferas, ke eterne ili estu apartigataj per muregoj de malamo, malkompreno kaj malfido?

Kiu eraris?

(5 Aprilo 1915)

Ekzistas malsanuloj, kiuj sin okupas pri propra flegado, nur kiam ili estas jam en tia stato, ke duba estas ilia resanigebleco.

Gis la ekstrema limo de siaj fortoj ili fanfaronas pri sia bonfarto, malŝate alridas ĉian averton, kaj sin fordonas al ĉiuj ekscesoj, konfidante, ke kiam la malsano estos en akra stato, la kuracisto ja scios ĉion rebonigi. Sed se la

kuracisto ne sukcesas restarigi la pacienton, tiu ĉi lin mokas, insultas lian sciencan, kaj ĝemas, ne kontraŭ si mem, sed kontraŭ la medicino. Tiam alvenas la kirurgiisto, kiu tranĉas en la suferanta korpo, ĝin iaforte resanigas, ĝin aliforte mortigas, ĝin plej ofte kondukas al dua kirurgiisto.

Al tia malsanulo iom similas nia homaro.

De longe higienistoj ĝin antaŭgardis kontraŭ la armadfrenezo, klare avertante, ke tiu vetkurado havos danĝeran finon; ili montris, ke sen ia organizo super la nacioj, la ĝisnuna haoso fatale kondukos al sanga solvo: *ili antaŭvidis*. La antaŭvidemo neniam estis populara. La homaro indiferece aŭskultis ilin. Iliajn admonojn ĝi respondis per novaj armadkreditoj, ĉar, ĉu ne vere, la „elspezoj por plifortigi la armeojn, ĉiam nepre defendajn, estas la plej bona asekuro kontraŭ la milito“?

La malsano pligraviĝis, ekregis jam febro — simptomo de baldaŭa katastrofo —, sed la malsanulo — aŭ la homaro — nenion volis aŭskulti. Kaj, jen, neatendite, sed ne plu forpuŝeble, frapis la krizo.

La malsanulon ĝi ĵetis sur la dolorliton; la mondon ĝi ĵetis en la sangon.

Furioza la homaro indigniĝas kaj interne blasfemas — ĉar, ĉu ne, neniu en sia animo opinias nun, ke la milito estas bela kaj nobla? —, sed,

strange, ĝi indigniĝas kaj blasfemas ne kontraŭ siaj kondukantoj, ne kontraŭ la malsano mem, sed kontraŭ la kuracistoj, kiuj ĝin avertis. Malbenataj, vi estu, naivaj utopiistoj! Malgraŭ ĉiuj viaj pacaj manifestacioj, viaj homfratigaj teorioj, ni nun suferas tian krizon, kian ni apenaŭ povis imagi. Nenion vi sciis eviti. For, revuloj, dormigistoj, bonintencaj idealistoj! Pli efikan kuracilon ni nun havas. La milito ĉion solvos. Lasta ĝi estos. Neniu el viaj drogoj aŭ higienkonsiloj estis utila. Oni tranĉu la nun maturan absceson!

La absceson oni nun tranĉas. Sed ĉu la paciento daŭre resaniĝos, aŭ ĉu novajn abscesojn oni baldaŭ devos denove tranĉi?

*

Ĉu vere la institucioj, kiuj celis la alproksimigon de la popoloj kaj la starigon de daŭra paco inter ili, meritas tiun kondamnon? Ĉu, kiel oni preskaŭ ĉie legas, bankrotis la ideoj, kiujn ili reprezentis? Ĉu la homoj, kiuj penis ilin disvastigi, estis nur iluziuloj, bonintencaj idealistoj kaj naivaj revuloj, kies teorioj estus nerealigeblaj, ĉar ili kontraŭstarus la homan naturon?

Ni rimarku, ke la aŭtoroj de tiuj ekskomunikoj estas plej ofte personoj, kiuj tute ne konas tion, kion ili atakas, kaj neniam faris ian penadon por helpi al la plibonigo de la interpopolaj rilatoj.

Ilin kontentigas la ripetado de stereotipaj kritikoj legitaj en influaj gazetoj. Ili vivas en rondo de tute pretaj ideoj kaj sentoj, trans kiu ili neniam kuraĝis rigardi. Maksimume, ili pensas: „Bela, sed malproksima idealo, kiun nur niaj pranepoj eble povos atingi.“ Dume, ili restas indiferentaj kaj fidaj, ke la gvidantoj de la popoloj scios eviti katastrofojn. Fakte, malgraŭ kelkaj progresoj en la lastaj jaroj, la porpaca movado kalkulis nur tre malgrandan nombron de konvinkitaj kaj agantaj anoj; kompare, kun la amaso de la pasivuloj kaj la agemeco de la militdefendantoj ĝi estis kvazaŭ nenio. Certe, multaj homoj volonte konfesis, ke laŭdindaj estas la pacceladoj, sed ni scias, ke aprobo fariĝas reala, nur kiam ĝi estas esprimata per laŭcelaj agoj. Centmiloj de homoj ja akceptas la ideon pri lingvo internacia kaj teorie aprobas Esperanton. Kiom da ili eltiras la konkludon de tiu pure teoria aprobo kaj decide eniras niajn vicojn?

Certe, ne sole la popoloj, sed eminentuloj ĉiuspecaj, eĉ regnestroj, okaze aprobis la tendencojn de la pacmovado, sed eldirinte kelkajn aprobvortojn, ili konsideris, ke plenumita estis ilia devo, kaj ili daŭrigis sin agitadi konforme al idealo tute alia. Nur la lipoj moviĝis. Ol tiaj aproboj, pri kiuj ho ve! oni senlime fanfaronis, pli helpus kruda persekutado! Ĉe multaj el niaj samtemp-

uloj, precipe ĉe tiuj, kiujn favoris la sorto, aprobo de iu ideo fariĝis nur formo de ĝentileco. Ĝi ne pli respondas al la internaj sentoj, ol ordinara saluto — simpla gesto, preskaŭ senkonscia. Ĉu el tio, ke iuj famuloj patronadis packongresojn kaj ĉe ili diris kelkajn afablajn vortojn, oni devas konkludi, ke tiuj famuloj estis fervoraj pacamikoj, pretaj ĉiuokaze agi laŭ la idealo, kiun ili pretendis akcepti? La faktoj klare respondis: Aprobo havas valoron, nur se ĝin akompanas konformaj agoj. Estas do tute malĝuste diri, ke la pacmovado serioze penetris ĉe la altaj rondoj; ĝi ricevis nur florojn kaj laŭdojn, sed nenian konkretan rezultaton.

Aliparte, ridinde malgranda estis la materiala potenco de la internaciaj institucioj, kompare kun la premanta supereco de la militfortoj. La buĝetoj de la diversaj internaciaj asocioj, el kiuj multaj estas pure teknikaj, atingis nur kelkcentmilojn da frankoj. Fianke de tio konsideru la centmilionojn dediĉatajn al la militpreparado. Komparu la malmultajn revuojn de la pacamikoj, disvastigitajn nur ĉe mallargaj rondoj de jam konvinkitaj personoj, kun la grandega forto de la gazetaro, kies fadenojn tenas plej ofte homoj, kiuj tre malmulte atentis pri la pacidealo kaj apenaŭ konscias pri sia respondeco. Miloj da homoj profesie laboras por la preparado de la milito; miloj, per

la gazetoj, en la literaturo, ĉe la lernejo, konstante substrekas tion, kio dividas la homojn kaj pli-fortigas la naciajn antagonismojn, kaj nur kelkaj, malmulte konataj, neserioze apogataj, sin dediĉas al la pacigaj entreprenoj kaj al la malakrigo de la gentaj pasioj. Vi miras, ke tiuj lastaj ne estis sufiĉe fortaj por forpuŝi la minacon!

Dum jarcentoj, la homaro estis nur haoso de sin reciproke malamantaj kaj kontraŭbatalantaj ŝtatoj, kaj pri la ebleco de paca konstanta stato ĝi eĉ ne konsciis. Grandegaj penadoj estis necesaj por formi la nunajn naciojn, el kiuj kelkaj unuigis sole en la lasta jarcento. Nur de nemultaj jaroj oni ekkonsciis pri homaro, kies diversaj partoj, anstataŭ kontraŭstari unu al la alia, kunlaborus en organizita harmonia tuto. Sed kiom da homoj longe pensis pri tiu idealo? Kiom da ili sentis sin tiel premataj de ĝi, ke ili dediĉu al ĝi sian energion kaj estu pretaj sin oferi por ĝi? Ĉu la internaci-ema spirito, necesa bazo de la tuta konstruaĵo, estis sufiĉe disvastigita, ke ĝi povu kontraŭbatali la instinktojn, la pasiojn, ĉiujn nekonsciajn fortojn, hereditajn el la ĉeno de la generacioj, kaj el kiuj ni povas nin liberigi nur iom post iom, dank' al granda penado?

La netuja sukceso de ideo tute ne pruvas ĝian erarecon. Ĝi estas pruvo nur por tiuj, kiuj ŝanĝas ideon laŭ la modo, same kiel la virinoj ĉapel-

sistemon. La esperantistoj scias, ke ili laboras por ideo ĝusta kaj fruktodona, kaj, tamen, la pli granda parto de la homaro staras rilate al ni indiferente aŭ eĉ skeptike. Ĉu el tio ni konkludas, ke Esperanto estas erara kaj ke prava estas la indiferenta publiko? Tiu indiferenteco, kontraŭe, estas nur instigilo por plua agado. Ni scias, ke pravaj ni estas, kaj el tio ni akiras forton, kiu fine venkos la inercion.

Ni allasu, ke la paca idealo ĝis nun ne sukcesis. Ĉu tio signifas, ke ĝi neniam sukcesos? Ĉu, precipe, tio signifas, ke la homoj estis pravaj, restante indiferentaj je la klopodoj de ĝiaj pioniroj?

Nomu ilin utopiuloj aŭ idealistoj. La vero restis, ke iliaj admonoj estis pravaj, ke la preparado al la milito ne gardis la pacon, sed fine, fatale kondukis al la milito. Ke ilia celo estas tuj atingita, ili neniam profetis, sed, montrinte la rimedojn por eviti la timindan finon, ili almenaŭ faris sian devon kaj ĝuste vidis. La fervoraj defendantoj de la armita paco, kontraŭe, vidis tute malĝuste. Ili admiru nun la rezultatojn de sia agado, kies viktimoj ili mem estas. El ambaŭ, kiu estis la plej naiva?

Ideo ne sukcesas sole per sia propra forto. Ĝi devas enkorpiĝi en homojn. La estonteco dependas, ne de niaj pranepoj, al kiuj ĉiuj malkuraĝuloj volontе fordonas la plej malfacilajn taskojn, sed de nia generacio.

La nuna katastrofo estas klara demonstracio kaj laŭtega averto. Se ĝi forŝiras la vualojn de la homa kredemeco, se ĝi malfermas la okulojn al ĉiuj bonvolaj homoj ĝis nun flanke restintaj, ĝi per tio reaĉetos la dissemitajn suferojn. Vi volas, ke la ĝisnuna ĥaoso cedu al pli bona ordo, ke sur la ruinoj oni starigu ne novajn facile rompeblajn ekvilibrojn, sed veran juran organizon inter la ŝtatoj, vi, unuvorte, malgraŭ ĉiuj gloroj de la milito, deziras, ke tiuj gloroj ne revenu tro ofte? Tiam, malgraŭ ĉia malŝato, vi devos rerigardi la verkon de tiuj „utopiuloj“, kiujn la modaj gazetistoj volonte traktas, ĉu kiel perfidulojn, ĉu kiel frenezulojn. Vi devos priatenti la ideojn kiujn vi antaŭe ignoris, kaj vi devos helpi al la plifortigo de tiuj institucioj, kiuj ĝis hodiaŭ vivetis meze de la ĝenerala indiferenteco. Nenion solvos, nenion starigos reciproka sinriproĉado kaj sinkulpigado. Pri la kaŭzoj de la milito restos verŝajne dum longa tempo tia nombro de teorioj, ke objektivan kaj ĉiulandan certecon nia generacio ne akiros.

Kontraŭe, la sistemon mem, kiu ebligas la militon, oni povos ataki, sen vanaj kaj nesolveblaj diskutoj pri la pasintaĵoj. Guste en tio kuŝas la merito de la „revuloj“, ke kontraŭ sistemo, t. e. la veraj profundaj kaŭzoj, ili penis batali; ili eliris el la fatala rondo, en kiu la mondo moviĝis de milito al alia.

Ĉu oni ĝin volas aŭ ne, la internacia pacmovado ne mortos. La teruraj spertoj maturigos ĝin. Ĝi de nun ĉerpos sian forton ne sole el la pura racio, sed el la tragedio de la vivo. Ĝiaj radikoj plivastiĝos kaj plifirmiĝos en la tero de la instruaj realaĵoj. Ĝi fariĝos malpli scienca kaj pli populara, sekve malpli diskutema kaj pli agema. Ne la aprobon de la eminentuloj ĝi bezonas — ili sekvadas —, sed fortajn karakterojn kaj firmajn volojn. Lumigos ĝin la rebrilo de miloj de doloroj, kaj, vekite el sia dormado, la popoloj sekvos novajn standardojn.

Utopiistoj, daŭrigu!

La kritikistoj parolas . . .

(5 Majo 1915)

Al la mondo ne sufiĉas la batalo inter la vivantoj.

La klerularo, kiu plenumas la facilan laboron, eksciti la pasiojn kaj intensigi la interpopolajn malamojn, kvazaŭ ili ne estus sufiĉe akraj, ankaŭ mobilizis la mortintojn. La lasta epoko de relativa paco — malheroa, nenobla, senideala, ĉu ne, sinjoroj literaturistoj! — kutimigis nin al la ideo, ke la grandaj geniuloj, kiuj alportis al la homaro — sole al sia gento! — novajn valorojn sciencajn, filozofiajn, literaturajn, staras super la landolimoj.

Ni lasis al la bibliotekaj pedantuloj la taskon diskutadi, ĉu tiu aŭ alia jam de longe mortinta famulo apartenis al tiu aŭ alia gento, ĉu per siaj praavoj li ne pli alproksimiĝas al la popolo A. ol al la popolo B. Pri tiuj demandoj aperis senombraj volumoj kaj artikoloj. Iliaj aŭtoroj interdisputadis, elfaris teorion kaj ricevis oficialajn honorigojn. Ĉio tio prezentis intereson nur por tiu malgranda rondo de kritikistoj, kiuj imagas, ke la estonteco de l' mondo estas ligata je iliaj produktaĵoj.

Malgraŭ ili ni daŭrigis admiri la verkojn de tiuj geniuloj, ne tro atentante, ĉu ili apartenas aŭ ne apartenas al popolo, kiun la postuloj de la politiko amikigis al la nia. Ni ja konsciis, ke tiuj spiritgigantoj estas la propraĵo de nenia gento, aŭ, pli ĝuste, ke ĉar ĉie ekzistis tiaj homoj, nenia lando povas eltiri specialan glorigon pri fenomeno, kiu ne estas limigata je ĝia teritorio. Tiel la nordaj kiel la sudaj, tiel la okcidentaj kiel la orientaj landoj, povas prezenti liston de geniaj homoj, kiuj, egalgrade, kvankam malsame, servis la mondan civilizecon kaj meritas nian dankadon. Oni povas preferi iun pli ol alian, sed tiu prefero devas dependi de la esenco de l' verko mem, ne de nacieco de la verkinto, kiu estas elemento flankaj kaj ĉiĉe tre necerta.

En normala tempo tio ŝajnas memkomprenebla, sed nun, oni preskaŭ bezonas kuragon por re-

memorigi pri elementaj veroj. La savo de via patrujo postulas, ke vi kredu la malon — tion almenaŭ penas instrui diverslandaj eminentuloj. Nun, okazas, ke nur la gento, al kiu vi apartenas, kaj, pro afableco, la gentoj politike alligataj, naskis geniulojn. La malamikaj landoj kontraŭe estis intelekte senfruktaj. Ĉar malgraŭ tiuj dekretoj, la verkoj de la famaj mortintoj ne povas esti detruataj, oni penas diversmaniere aliigi ilian signifon. Por tio ekzistas diversaj metodoj. Ekzemple, iu kritikisto elmontras, ke fakte la esencon de sia verko la famulo A. ŝuldas al la laboroj de la geniulo B. apartenanta al „nia“ nacio, kaj estas nur pli-malpli lerta kompilisto aldoninta nur flankaĵojn al la verko de nia senmorta samlandano. Tiu demonstracio estas kutime temo de kelkaj artikoloj en serioza revuo, kun la necesa scienca saŭco. Leginte ilin, vi havas la klaran senton, ke la famulo A., B. aŭ C., kiun oni antaŭe prezentis kiel superhomo, estas fakte nur ordinara talentulo, kies verko neniel estas originala.

Alia metodo estas la alinaciigo de la ĝenanta glorulo. Klerulo eltrovas, ke kvankam li naskiĝis kaj vivis en la lando B., la aludata geniulo apartenas al la gento A., se ne mem, almenaŭ per iu el siaj praavoj. Tiu demonstracio ne prezentas tro da malfacilaĵoj, ĉar en la prapatraro de iu ajn homo, oni ĉiam trovas unu aŭ kelkajn fremd-

ulojn. Tiu eltrovo kondukas al la konkludo, ke ĝuste al tiu fremda prapatro plej similas la studata geniulo, kiu do estas plia gloro de via lando. Sekve, oni povas senrestrikcie admiri lian verkon.

Ni ne trograndigas. Foliumu kelkajn gravajn revuojn, kaj preskaŭ ĉiam vi povos legi ian similan demonstracion. Certe, ekzistas feliĉaj esceptoj: intelektuloj rifuzis ekskomuniki aŭ maladmiri la plej noblajn reprezentantojn de la kulturo de momente malamika lando, sed la sola fakto, ke tiu sintenado estas konsiderata kiel kuraĝa escepto, karakterizas nian malfeliĉan epokon.

La rezultato de tiuj pseŭdosciencaj esploroj kondukas plej ofte al la ekskomuniko de certaj verkoj. La ĉiopotenca reĝo de nia socia vivo, la Modo, favoras la rapidan disvastiĝon de tiuj ekskomunikoj. Antaŭ la milito vi kun senfina ĝojo aŭdis la muzikon de tiu senmorta famulo, kvankam vi sciis, ke li apartenas al gento politike neamika; vi diris, ke en lia verko vi trovas ĉielajn ĝuojn, ke eĉ tutan filozofion ĝi al vi prezentis. Venis la milito. La glora muzikisto, kvankam mortinta de pluraj jardekoj, fariĝas responda je la politikaj fatalaĵoj. Lia muziko estas nun enuiga, senmezure trolaŭdita, neoriginala; nia popolo havas amason de pli lertaj muzikistoj. Ni forigu la fremdulon! Kaj miloj, kiuj antaŭe laŭte kaj konvinke es-

primis sian admiron, nun ne malpli laŭte kaj ne malpli konvinke esprimas sian malŝaton.

Ni rimarku, ke tiuj ekskomunikoj estas limigataj de la personaj necesajoj. Ĉiu homo, laŭ la premo de la modo, volonte nun malŝatas la tutan kulturon de la malamiko, sed la sama homo, se li malsaniĝas, ne plu atentis pri la gentaj diferencoj. Li ofereme akceptos esti kuracata laŭ metodo kaj per kuraciloj devenantaj el la malamika lando, se nur ili estas efikaj. En la unua okazo parolas la pasioj, en la dua sin trudas la racio. En ĉiuj tiuj disputoj pri nacia kulturo, pri naciaj elitoj, pri naciaj ecoj, parolas la sentoj kaj pasioj. En normala tempo objektiva juĝo pri tiuj demandoj estas jam tre malfacila; nun, ĝi estas preskaŭ nebla. Sed la kritikistoj, prefere ol tion konstati kaj sekve resti trankvilaj, obstinas prezenti kiel sciencaj konkludojn, kiuj post kelkaj jaroj ŝajnos sensencaj.

Nenio estas pli kontraŭa al la realeco ol la starigo de iu gento kiel sola reprezentanto de la homa inteligento. La fakto, ke nun ĉiuj popoloj esprimas la saman pretendon, jam montras la vanecon de tiu esploro. Nia scienco estas la verko ne de iu speciala popolo, sed de diverslandaj *individuoj*, kiuj pensis, serĉis kaj laboris, gvidate ne de la amo al patrujo, sed de la amo al la scienco kaj al la vero. Ilia patrujo rajtas nun tiom mal-

pli fanfaroni pri ili, ke ofte la plej gloraj el iliaj infanoj renkontis hejmlande nur malhelpojn kaj sendankadon dum sia vivo. Ilian verkon oni ŝuldas, ne al ilia deveno, sed al la racio — universala. Same pri literaturo kaj arto. Ĉiuj popoloj povas prezenti ĉefverkojn en literaturo kaj arto, kaj nenio estas pli facile komprenebla, ĉar universalaj estas la sentoj kaj la pasioj, kiuj instigas al arta kreado.

*

Ekzistas ankoraŭ aliaj manieroj partoprenigi la mortintajn eminentulojn en niaj nunaj bataloj. En ĉiu lando regas ordinare la plej diversaj tendencoj kaj idealoj. Anstataŭ tion lojale rimarkigi, kritikistoj penas prezenti la kontraŭan landon kiel tuton unuopinian. Sekve de tio ĉiuj ajn doktrinoj, kiuj iam naskiĝis en tiu lando, estas konsiderataj kiel akceptitaj de la tuta lando. Por vekti aŭ pliigi la antipation al ĝi, oni ĝuste elektas la doktrinverkojn, pri kiuj oni scias, ke ili elvokos ĉe la granda plimulto de nia popolo indignigon kaj abomenon. La filozofo A. aŭ B., kiu pravigis la perforton kaj sanktigis la malamon, havis en sia propra lando multajn kontraŭulojn de sia doktrino. Nu, ĝuste tiun fakton oni preterlasas kaj kredigas, ke la tuta kontraŭa popolo alprenis la idealon de la filozofo A. aŭ B. Kun pli da honesteco oni facile povus konstati, ke similaj

doktrinoj, kiuj cetere ne estas novaj, havis fervorajn partianojn ankaŭ en nia propra lando, kaj do tute ne estas specialaĵo de la malamika nacio. Certe, ne estas dubeble, ke iu libro povas havi atentindan signifon je la vivo de iu popolo, sed estas ekstreme malofte, ke ĝi renkontas unuaniman konsenton ĉe tiu popolo kaj unuaniman malaprobon ĉe alia. Se oni volas juste juĝi la kulturon de popolo laŭ ĝiaj plej altaj reprezentantoj, oni ne rajtas priatenti nur unu solan tendencon, sed devas prikonsideri la diversajn idealojn, kiuj floras ĉe tiu lando, kaj taksu ilian respektivan forton.

Aliparte, ofte okazas, ke la citoj el la studataj famuloj estas tiel elektitaj kaj aranĝitaj, ke ili malguste esprimas la sencon de ilia verko. Ĉiun aŭtoron oni facile povas perfidi per lerta kunmetado de la citoj kun la originalo. Ne atentante la cirkonstancojn, en kiuj aperis tiuj verkoj, ne zorgante pri kontrolado de la citoj, la publiko donas al kelkaj linioj lerte eltiritaj ian absolutan karakteron, kiu malaperus, se ĝi legus ĉion, anstataŭ nur partojn. Laŭ tiuj kripligoj ĝi juĝas ne sole aŭtoron, sed — konforme al la aludita sistemo — la kulturon de la kontraŭa lando. Dank' al tio eterniĝas la gentaj malkompreniĝoj kaj antaŭjuĝoj, kiujn la intelektuloj plifirmigas.

Aliaj kleruloj penis starigi teoriojn pri la rilato inter la politika potenco de ŝtato kaj ĝia intelekta

produktado. Iuj el ili asertis, ke la grandaj ŝtatoj estas speciale favoraj por pli intensa, pli larĝa, pli nobla pensado. Pli altan kulturon havus la grandaj ŝtatoj, pli altajn kaj pli vastajn pensojn ili ebligus. Malgrandaj landoj estus kvazaŭ parazitoj, suĉantaj sian intelektan vivon el la arbo de la grandaj landoj. Por kontroli tiun aserton, sufiĉas konstati, ke tiel en la modernaj kiel en la antikvaj tempoj, multaj pensuloj kaj geniuloj naskiĝis en malgrandaj ŝtatoj, ke ĉe grandaj ŝtatoj amaso da homoj havas tute burĝajn nenoblajn pensojn, same kiel en malgrandaj landoj. Kompreneble ekzistas la kontraŭa tezo, nome ke malgrandaj ŝtatoj estas pli favoraj al la homa kulturo ol la grandaj. Tiu aserto ne estas pli vera ol la antaŭa. En grandaj landoj ankaŭ naskiĝis kaj vivis multaj geniuloj kaj utilaj servintoj de la homara progreso. Ekzistas malgrandaj landoj kun disvastigita kulturo kaj aliaj malgrandaj landoj en tute malsamaj kondiĉoj. Ekzistas landoj kun kulturita loĝantaro, kiuj naskis malmulte da gravaj epokfarantaj pensuloj, kaj ekzistas landoj kun malklera loĝantaro, kiuj kontraŭe donacis al la homaro kelkajn el ĝiaj plej indaj gloroj. La malo ankaŭ estas vera.

Same trompemaj estas aliaj teorioj nur aludeblaj ĉi tie pri rilato inter kulturo kaj militista potenco. Geniuloj kaj alta kulturo ekzistis ĉe popoloj venkitaj sur la bataalkampo, same kiel ĉe

popoloj venkintaj. Militistaj katastrofoj ofte tute ne malhelpis la floradon de fruktodona civilizeco. Eĉ gentoj subpremataj, dividataj, politike ne ekzistantaj, havas intensan intelektan vivon. La militista forto de popolo dependas ne sole de si mem, sed de siaj malamikoj pli aŭ malpli multaj kaj de la fluoj de la politiko. Kial oni obstinus starigi rilaton inter aferoj nekompareblaj?

Kompreneble ĉiuj tiuj tezoj povas esti apogataj de kelkaj favoraj ekzemploj. Iliaj aŭtoroj citas nur ilin kaj lerte prezentas ĉiujn apogomotivojn, sed la kontraŭajn ekzemplojn, tiel multnombrajn, ili tute silentas. Ĉar ĉe tre multaj legantoj, eĉ instruitaj, la kritik sento malaperas tuj kiam ili legas ion subskribitan de konata nomo kaj favoran al iliaj deziroj, tiuj teorioj facile disvastiĝas kaj ĉiam trovas aron de admirantoj, kiuj konvinke ripetas ilin kaj tra tiuj tre malcertaj hipotezoj rigardas la mondokazantaĵojn.

Kontraŭ ĉiuj tiuj teorioj farataj laŭ la postuloj de la momento, ni armu nin per kiraso de skeptikeco. Nuntempe ili utilas al nenio, kaj morgaŭ ili malutilos al la starigo de pli bona ordo.

La famajn mortintojn ni lasu trankvilaj kaj ne miksu en niaj hodiaŭaj bataloj. Ili ĉesis aparteni al gentaj grupoj, sin reciproke kontraŭbatalantaj kaj ekskomunikantaj. Iliaj verkoj fariĝis la posedaĵo de la homara civilizeco; ili postvivos niajn efe-

merajn politikajn grupigojn. Lasu al ni almenaŭ ion, kiu ŝvebos super la nuna nokto.

Milito kaj homa energio

(5 Junio 1915)

Kio karakterizas ĉiun militon estas la grandega elspezo de energio, kiun ĝi kaŭzas: mirinda streĉado de ĉiuj homaj fortoj direktataj al unu celo, kunplektiĝo de ĉiuj individuaj deziroj celantaj al unu fino. Sendube, en normala tempo, la homaro elspezas grandegan kvanton de energio, sed ni ne konscias pri ĝi tiel klare, ĉar la celoj de la homa agado aperas ekstreme diversaj. Plie, pro la al kutimiĝo, homo ŝajne bezonas malpli da energio por plenumi sian ĉiutagan laboron, ol por elteni la eksterordinaran streĉadon, kiun alportas la milito. La ĉefgeneralulo, kiu havas sub sia respondeco la kondukadon de la militoperacioj, la subuloj, kiuj respondas pri la efektivigo de tiuj operacioj, ĝis la simplaj soldatoj, kiuj tagojn kaj noktojn mizere staras en la tranĉeoj, estas submetataj je altgrada streĉado; la unuaj por kunteni ĉiujn fadenojn de la giganta maŝino kaj precize decidi je la taŭga momento, la lastaj por rezisti al la senkuragiĝo superregi la timon kaj la abomenon, ak-

cepti la malkomforton, kaj fariĝi malgrandega, pli ol humila, parteto de vastega organismo ilin ĉiujn enkorpiganta.

Sed ne sole ĉe la batalantoj mem aperas tiu nin miriganta energio. Por kontraŭbatali la premantan angoron, por reteni larmojn ĉe la foriro de la amato, por superi la ĉagrenon, kiam ilin trafas la malfeliĉo, la virinoj ankaŭ elmontras admirindan energion. Oni eble bezonas pli da vera animforto por senespere atendadi novaĵojn de la malaperinta amato kaj dume daŭrigi la ĉiutagan vivon, ol por stari meze de la bataldangeroj: la militisto staras sub la potenca influo de la medio, li jam enpense fordonis sian vivon al la sorto, kaj plie estas en tia medio, ke lia racio ne plu povas funkcii kiel antaŭe, sed la virino, senigata je la edzo aŭ je la filo, vivas ĉiam en tiu sama rondo, kiu vidis lin; en la soleco de la hejmo ŝia racio povas libere trapenetri kaj analizi la malfeliĉon. Tial, tre ĝuste militistoj ofte skribas al siaj amatoj por ilin instigi al trankvileco kaj pacienco, kaj, pro profundaj sentoj, ili priskribas sian situacion en pli brilaj koloroj ol ĝi reale estas.

Fine, la milito mem streĉas la energion de multaj homoj, kiuj, kvankam ili ne rekte partoprenas en la batalado, estas necesgaj al ĝia disvolvo: la teknikistoj, kiuj devas multege pliigi sian penadon, la kuracistoj kaj flegistoj, la viroj kaj

virinoj okupataj en tiuj multnombraj helpentrepre-
preno, kiujn naskis la milito.

Ke tiu spektaklo prezentas en si mem ian bel-
econ — kiel ĉia manifestiĝo de homa energio —
neniu neas. Ĝi aperas tia, precipe kiam oni forigas
la alian flankon de la medalo, t. e. la vizioj de buĉ-
ado, mortigo kaj rabadoj, kiuj estas la nepraj
akompanantoj de ĉiu milito. Ĝuste tiun kunstreĉ-
igon de energio tre admiras la militdefendantoj,
kaj sur tio ili sin apogas por deklari, ke la milito
estas nobla kaj utila. „La nobleco de la milito“,
skribas unu el la plej famaj el tiuj militdefend-
antoj, „kuŝas en tiu fakto, ke la homo en sia mal-
grandeco tute malaperas antaŭ la granda ideo de
l' ŝtato . . . ; la popoloj kaj la ŝtatoj ne povas
plenumi ion pli grandan kaj pli superbelan ol meti
ĉiujn siajn energiojn je la servo de la libereco,
sendependeco kaj honoro. Nur tie, kie la milito
estas ebla, la risortoj de la karaktero povas esti
obstine streĉataj, necesa kondiĉo por realigi la
plej noblajn taskojn de la civilizacio, en la plena
disvolvo de la moralaj kaj intelektaj fakultoj.“
La aŭtoro de tiu penso, esprimita de multegaj
aliaj, do opinias, ke sen la milito aŭ almenaŭ la
militrisko malaperus la fortostreĉado, necesa fak-
toro de nia civilizacio.

Ni aldonas, ke eĉ multaj malamikoj de la mi-
lito ne povas sin deteni de admiro ĝuste pro la

spektaklo de superenergio, kiun prezentas la milito. Antaŭ kelka tempo, ano de unu el la militantaj landoj diris al mi: „Se vi vidus, kiel ĉio nun estas superbela en nia lando! Kia laborado, kia ordo, kia oferemo! Malgraŭ ke mi ne estas militdefendanto, mi ne povas min deteni de admiro.“ El tiu konstato mia alparolanto kompreneble konkludis, ke pro ĉiuj tiuj virtoj lia lando meritas la venkon. Nu, tute similajn rimarkojn mi kelkan tempon antaŭe aŭdis pri lando malamika al la unua. Ambaŭ alparolintoj estis pravaj, sed ambaŭ *ne volis* pensi, ke ĉe la malamiko regas la sama spirito, kaj kiam mi insistis pri tio, ili videble suferis. Ili tre admiris la efikojn de la militenergio, sed kredi, ke sama kaŭzo povas en la najbara lando produkti la samajn efikojn, estis al ili netolereble.

Tian spiritstaton plej ofte kaŭzas manko de kritikemo kaj objektiveco. Certe la streĉado de la energio estas io dezirinda kaj bonfara, necesega je la progreso de la civilizacio. Sed ne ĉia streĉado estas utila al la homa socio. Necese estas vidi, al kio estas uzata la elspezata energio. Nu, ĉe la milito, la rekta rezultato de tiu streĉado estas antaŭ ĉio la *detruado* de aliaj energioj.

Certe, la militidealistoj asertas, ke milito celas la defendon de supera idealo — kiun ili plej ofte tute ne difinas — kaj ke la *detruado* estas nur rimedo por atingi tiun celon. La energio estas

elspezata por la defendo de ideoj (libereco, sendependeco, honoro, kulturo, vivrajto ktp.). Niaj idealistoj forgesas nur unu punkton, nome, ke la malamiko ankaŭ *kredas* batali por samaj ideoj. Legante la skribaĵojn en la diversaj militantaj landoj, la observanto estas surprizata renkonti en ili la samajn idealceladojn kaj la samajn pravigajn esprimojn. Se oni flankelasas la frazeologion, per kiu la militemuloj penas kovri la militteruraĵojn, oni konstatas, ke la celo — aŭ, se oni preferas, la rezultato — de tiu grandioza manifestiĝo de energio estas la detruado. Kaj kion oni detruas? Homojn, kiuj elmontras saman energion kaj saman idealismon. Jen estas konstato sufiĉa por moderigi nian admiron, ĉar ni sentas, ke la rezultato de tiu energio estas absurda. Sed tiun senton pri la vaneco de la militagoj ankoraŭ kovras dikega tavolo de mistikaj konceptoj, fortaj antaŭjuĝoj kaj belsonaj frazoj mistere efikantaj je niaj animoj.

Elspezi energion ne ĉiam signifas progresi. Niaj prapatroj faris amason de militoj, kies kaŭzoj ŝajnas al ni ofte sensignifaj — same kiel aperos al niaj prafiloj la kaŭzoj de niaj nunaj militoj —; ili ankaŭ elspezis energion kaj streĉis sian penadon. Ni nun scias, ke tiuj militoj tute ne progresigis la civilizacion. Se militoj havus tian efikon, plej altan civilizŝtupon havus la mezepoko, kaj la sovaĝuloj, kiuj konstante militis, estus la plej noblaj

reprezentantoj de la homa gento. Ni tamen scias, ke ĝuste la manko de sekureco, kiun kaŭzas la milito kaj la militdangero, nebligas la starigon de la civilizacio. Tiu ĉi disvolvigis nur kiam la militoj fariĝis malpli oftaj kaj la ŝtatoj estis pli firme starigitaj, tiel ke ordo povu ekzisti.

Fakte, la militidealitoj plej fervoraj eĉ allasas, ke la paco estas la normala stato, sed ke de tempo al tempo militoj estas necesaj por eksciti la homan energion kaj malhelpi, ke nia civilizacio moliĝu.

Ĉu la faktoj konfirmas tiun pesimismon?

En la lasta tempo la militoj estis pli maloftaj; oni nun facile povas konkludi, ĉu malgraŭ tio la kuraĝo de la homoj moliĝis. Oni eble asertos, ke la deviga militservo kaj la risko de la milito sufiĉas, por ke la militistaj ecoj konserviĝu. Sed kiel klarigi, ke saman kuraĝon montras laŭbezzone viroj apartenantaj al landoj, kiuj ne havas la devigan militservon, aŭ kiuj de longe estis forgesintaj ĝiajn instruojn, kiam oni alvokis ilin? En la realeco, oni konfuzas du malsamajn vidpunktojn: la fizika kaj la morala.

La milito certe plifortikigas la homan korpon, sed ĝi ankaŭ povas tute ĝin detrui. La bonajn efikojn de la milito je la vidpunkto de la homa sano oni povas atingi en multe pli malkara maniero per racia edukado de la junularo kaj per modera praktikado de la sporto. Rilate al la morala vid-

punkto (pacienco, rezistemo, sinoferemo), la milito *trudas* al la viro certajn virtojn, sed oni preskaŭ ĉiam forgesas, ke je la socia vidpunkto la rezultato estas malgranda: Tiuj moralaj ecoj montriĝas en tute speciala medio kaj en cirkonstancoj eksterordinare esceptaj; ili ne estas naturaj, sed artefaritaj. Tial, ili ne estas daŭraj. Reveninte al sia antaŭa medio kaj repreninte la ĉiutagan vivadon, eĉ la plej granda heroo daŭrigos vivi kiel antaŭe. Oni kun miro citas elegantulojn, kiuj dum la paco pasigis unu aŭ du horojn antaŭ la spegulo por sin zorgege vesti kaj admiri, kaj nuntempe vivas kontente en la malpuraĵoj de la tranĉeoj kaj tute forgesis sian luksemon. Tio pruvas, ke la homo facile adaptiĝas al la cirkonstancoj. Sed tre verŝajne okazos, ke post la milito, kiam li reiros en la civilizacian staton kaj vivos en la sama rondo kiel antaŭ la milito, la antaŭa heroo refariĝos elegantulo kaj daŭrigos dediĉi grandan parton de la tempo al la zorgoj pri sia ekstera persono.

Por ke la milito ŝanĝu la ecojn de la homoj, estus necese, aŭ ke ĝi daŭru ĉiam (kion neniu proponas) aŭ ke ĝi egale influu al ĉiuj. Sed la maksimumo de la militistoj rilate al unu lando estas la dekono de la enloĝantaro. La restantaj naŭ dekonoj ne multe ŝanĝas sian vivadon (ĝuste pri tio fieriĝas la militantaj landoj). Kiam la restintoj el la foririnta dekono revenos, ne ili

trudos al la ceteraj sian vivmanieron, sed ili al-fariĝos al la vivmaniero de la ilin ĉirkaŭanta medio, eĉ kun granda plezuro. Regos do la samaj mankoj, pri kiuj ni antaŭe plendis, la samaj apetitoj kaj la samaj vivceladoj. Se oni tiam komparos la moralan staton de la militintaj landoj kun tiu de la nemilitintaj, oni verŝajne ne konstatos gravan diferencon rilate al la grado de energiemo kaj moraleco de iliaj enloĝantoj.

Cetere, la homoj, kiuj senĉese ĝemas pri la dekadenco de nia socio kaj la utileco konservi la militon kiel revirtigilon, estas aŭ nekuraceblaj pesimistoj aŭ personoj tre supraĵaj. Ili juĝas landon aŭ socion laŭ kelkaj ekstremaĵoj kaj strangaĵoj, kiuj floras precipe en la urbegoj kaj ĉiam ekzistis, malgraŭ sennombraj militoj. Ili atentis nur tion kaj tute forgesas la grandegan plimulton de la homoj, kiuj multe penas laborgajni sian vivon, sane kaj honeste vivas. Eĉ pri ŝajnaj dekadenculoj oni povas erari. Unu el tiuj pesimistoj iam diris al mi rigardante junulon, kiu en „plezurloko“ ŝajnis sin fordoni al la moleco. „Vidu tiun tipon de dekadenculo.“ Nu, tiu sama junulo estis tre kuraĝa aviadisto el la unua epoko, kiu riskis sian vivon tie, kie mia alparolanto certe ne riskis sian.

Kio moligas la homon kaj kondukas al dekadenco ne estas la paco, sed la *manko de idealo*.

Por ke la homa energio, fundamenta elemento de kreado kaj progreso, ne malfortiĝu, necese estas, ke la homo havu ian idealon lin superantan, ke lia vivo aperu al li, ne kiel celo, sed kiel rimedo por atingi ian celon fiksitajn de lia spirito. Tiu, kiu obstine celas al *io pli bona*, neniam estos dekadenculo, tute egale ĉu li estas klerulo aŭ simpla laboristo. Nur kiam la homaro ĉesos rigardi antaŭen, la profetoj de la pesimismo povos ektimi. Sed la milito ne plu povas esti la idealo de sana homaro. Eĉ la plej viglaj militdefendantoj allasas, ke la milito estas evitinda; ĝi do estas malbonaĵo.

Estas supozo sur nenio sin apoganta, ke paca stato malpliigus la homan streĉadon. Kontraŭe, la homa laboremo, agemo kaj iniciatkapablo povas tiom pli libere ekzerciĝi kiom pli granda estas la sekureco. De kiam niaj ŝtatoj fariĝis sufiĉe bone organizitaj por regigi ordon sur sia teritorio, ne sole la energio antaŭe dediĉita al reciproka ekstermado, ne estis neniigita, sed ĝi estis pliigita kaj almetita je civilizigaj entreprenoj havantaj pozitivan karakteron. Ameriko ne estus akirinta la gradon de civilizeco, kiun ĝi nun havas, se anstataŭ ol labori, ĝiaj loĝantoj estus pasigintaj unu aŭ du jarcentojn per senĉesaj internaj militoj. Neniu kuraĝus pretendi, ke en tiu lasta okazo la loĝantoj estus pli energiaj kaj pli moralaj ol nun kaj ke la homaro estus gajninta je tio.

Kiam inter la nunaj civilizitaj ŝtatoj estos kreita jura ligilo reprezentata per organizo kaj certiganta la pacon, la sekureco etendiĝos sur preskaŭ la tuta terglobo, kaj tiam la homa entreprenemo havos vastan kampon de agado. Jam en normala tempo, la homa energio disvolviĝas tute sen konscia rilato kun la „granda ideo de l' ŝtato“. Miloj kaj miloj da homoj dediĉas sian energion, ne por pliigi la potencon de la ŝtato, pri kiu ili eĉ ne pensas, sed por agi konforme al certa idealo ellaborita aŭ alprenita de ilia spirito. La ŝtato estas rimedo por ebligi la homan kunlaboradon, certigante la sekurecon kaj la justecon. Konsideri ĝin kiel *celon* en si mem, malatentante la fakton, ke la mondo ne konsistas nur el unu ŝtato, nepre kondukas al la sistemo, kies fruktojn ni nun ĝuas. Ni ne sukcesas kompreni, kial okazus, ke la risortoj de la homa energio rompiĝus, se anstataŭ sin reciproke disŝiri, la ŝtatoj interkonsentus kaj ĉesus la internacia anarkio. La ordo ne detruas la streĉadon, sed ĝi donas al ĝi pli altajn celojn. La anarkio — ni nun vivas en interŝtata anarkio — streĉas la energiojn laŭ alta grado, sed por dissemi la detruon kaj la suferon.

Ekster la milito kaj ekster la mistika idealo de la grandeco de la ŝtato, ekzistas aliaj idealoj pli konformaj al la noblaj aspiroj de la homo. Disvastigi la civilizecon super la tuta terglobo,

valorigi la grandegajn riĉaĵojn de nia planedo, kontraŭbatali la mizeron, ataki la krudajn naturfortojn kaj regi ilin, estas idealoj senteble pli altaj ol ekstermadi najbarojn pro kaŭzoj ofte tre malprecizaj aŭ pro malĝusta kompreno de la interesoj de l' ŝtato. Tiuj idealoj povas esti potencaj motoroj de agado kaj energio, se nur la publika opinio favoras ilin.

Vi admiras la militenergion? Jes, ni ankaŭ, sed nian admirsenton treege superas la vera sufero, kiu nin premas, kiam ni konstatas, ke tiaj trezoroj de energio estas malŝparegataj kontraŭ la interesoj de la homaro, kontraŭ la homo mem.

La socio post la milito

(Julio-Aŭgusto 1917)

Kiam oni penas prezenti al si la staton de Eŭropo post la milito, oni kutime pensas ĉefe pri la teritoriaj ŝanĝoj, kiuj okazos sekve de la nuna batalego. Tiaj ŝanĝoj tamen ne havas la gravan signifon, kiun multaj homoj aljuĝas al ili. Unue, la ekzameno de la ĝenerala situacio je la militista vidpunkto permesas la hipotezon, ke neniu el la batalantaj grupoj venkos ĝis tia grado, ke ĝi povos disponi je la lando de la kontraŭulo; tiuokaze la teritoriaj ŝanĝoj estos malmultaj, eĉ ridinde malgravaj, se oni kompare konsideras la grandegan

elspezon de energio, la terurajn hom- kaj monperdojn, kiujn ili estos kaŭzintaj. Sed eĉ se ni allasas la alian hipotezon, nome ke unu el la militantoj fine elvenkos la alian, ni, laŭ la jam plimalpli publike konataj militceloj de la batalantaj nacioj, povas antaŭvidi, ke la teritoriaj ŝanĝoj, kiel ajn gravaj ili estos je la politika vidpunkto, ne estos tiaj, ke ili per si mem profunde ŝanĝos la vivkondiĉojn de la eŭropaj popoloj kaj la iradon de la civilizacio.

Kontraŭe, multe pli gravaj, pli profundaj, pli esencaj estos la transformoj, kiujn la milito realigos en la strukturo de la socio kaj en la tutmonda ekonomio. Sed la diplomatiaj kaj militistaj faktoj nin tiel multe priokupas, ke ni apenaŭ atentis je la gravaj sociaj ŝanĝoj, kiuj sub la influo de la milito plenumiĝas en la interna vivo de la nacioj. Cetere, la amplekso de la nunaj okazantaĵoj aliĝis la proporciojn de la faktoj: tia leĝo aŭ dekreto, kiu en normala tempo estus kaŭzo de pasiaj kaj senfinaj diskutoj, hodiaŭ efektiviĝas preskaŭ nerimarkite. Tamen, ĉu tio al ni plaĉas aŭ ne, ni ne povas malhelpi, ke la morgaŭa socio estos grandparte la rezulto de la hodiaŭaj faroj, eĉ se ni apenaŭ konscias pri ilia graveco. Ĉiuj decidoj, ĉiuj improvizoj, ĉiuj novaĵoj, alprenitaj de la popolgvidantoj por kontraŭbatali la nunajn malfacilaĵojn, havos rektajn kaj neevit-

eblajn reagojn je la stato de la socio post la milito. Vane ni parolas pri ili kiel pri decidoj provizoraj. Tio estas rilate al la pli multaj el ili iluzio. La provizoraĵoj, kiujn ni nun lasas starigi, verŝajne restos definitivaj, se ne laŭ sia formo, almenaŭ laŭ sia principo. Ni ne havas tian saman liberecon de agado kiel antaŭe; pli ol iam regas la leĝo de neceseco. La registaroj elkatenis fortojn, kiujn ili ne plu kapablas estris; ili estos devigataj sin submeti al ili, kaj iri pluen per vojoj de ili nedeziritaj. Longan tempon post la konkludo de la paco, ni ankoraŭ baraktos kontraŭ la politikaj kaj sociaj malfacilaĵoj devenintaj el la nuntempaj skuoj. Morgaŭ la homaro estos ankoraŭ malpli libera ol hieraŭ, ĉar ĝi estos devigata surporti la ŝarĝegon de sia neantaŭzorgemo kaj repagi la kulpojn de la nuna facilanima generacio. Kiel ĝi kondutos rilate al la multaj malfacilaĵoj, kiujn ĝi herede ricevos de niaj samtempuloj, estas multaspekta problemo, sed ĝuste tial ekstreme interesa por tiu, kiu rigardas trans la nuna realaĵo.

*

Estas ankoraŭ malfacile hodiaŭ prove antaŭvidi la estontecon de la socio post la packonkludo, unue jam pro tio, ke la graveco de la morgaŭaj transformoj dependas de la pli aŭ malpli longa daŭro de la milito, due ĉar ni ankoraŭ malbone

perceptas la veran signifon de la multaj divers-specaj ŝanĝoj, kiuj nun plenumiĝas sub la premo de la militnecesaĵoj.

Ŝajnas tamen, ke, rezervante la neantaŭvideblajn okazontaĵojn, oni povas el la nunaj faktoj eltiri kelkajn montrojn, per kiuj la estonteco lasas sin diveni en siaj ĉefdirektoj.

La unua grava socia fenomeno, kiu atentigas la observanton, estas la eksterordinara kresko de la ŝtata povo en la militantaj nacioj, eĉ la plej individuemaj, kaj ankaŭ en la neŭtralaj landoj profunde influataj de la milito. Kvankam ili estas gvidataj de reprezentantoj el la tiel nomataj „burgaj“ partioj, estas rimarkinde, ke la ŝtatoj, ne pro teoriaj, sed pro praktikaj kaŭzoj, faris gravajn paŝojn al la realigo de la kolektivistaj celoj. Ĉie la ŝtato leĝofaris por reguligi ne sole la produktadon, sed ankaŭ la konsumadon kaj la dispartigon; ĝi fiksas la prezojn de la vivnecesaj nutraĵoj, malhelpas la konkurencon, kiun ĝi opinias danĝera, kontraŭbatalas la akaparadon, farigas industriisto kaj komercisto, agas ĉie en plena kontraŭeco je la doktrinoj de la tradicia ekonomia liberalismo. Krom tio, ke ĝi de longe rajtas sendi al la morto ĉiujn militkapablajn virojn, ĝi ekarogas al si la rajton laŭbezzone mobilizi la tutan loĝantaron por organizi la nacian laboron en maniero konforma al la dummilitaj ŝtatbezonoj.

Baldaŭ ĝi sin enmiksos en la privatan vivon, ordonante al ĉiu, kion li devas fari por la publika savo, persekutante la senokupulojn kaj neutilulojn (neutila estas ĉiu, kiu ne laboras iel je la detrudo), forigante ĉion, kio ne havas militvaloron, permesante al la regnantoj esprimi nur tiujn opiniojn, kiuj allasas la regna intereso. Malofte en la historio troviĝis epoko, je kiu la individua libereco estis pli malmulte respektata. Sed la mal-liberigo estas organizata en sistema maniero kaj estas trudata kun la helpo de belsonaj formuloj, tiel ke oni pri ĝi apenaŭ konscias. Tio plifaciligos la adapton je la estonta ordo, kiun karakterizos la superregemo de la ŝtato.

Sendube pluraj el la registaraj decidoj falos tuj kiam la milito estos finita, sed multaj ankaŭ restos, kaj intertempe multaj aliaj similaj laŭ la spirito estos alprenitaj. Precipe rezultos, ke ni estos alkutimiĝintaj je la enmiksiĝo de la ŝtato en aferojn, kiuj ĝin antaŭe ne koncernis. Plie, la reiro al la „normala“ vivo kaj la reorganizo de la pacepoka produktado ne povos plenumiĝi sen la ŝtato, kiu ankaŭ tie, por malpligrandigi la haoson, vidos sin devigata implikiĝi en aferojn antaŭe dependintajn de privata iniciato.

La ŝtata socialismo havas, cetere, ankaŭ alian favoran ŝancon. La grandegaj ŝuldoj, kiujn okazigis la milito, devigos la ŝtatojn alpreni plenefikajn

decidojn, anstataŭ sin kontentigi per duonrimedoj kaj duonsolvoj, kiuj pro la alteco de la sumoj neniam estus sufiĉaj. Estos necese trovi novajn procedojn kaj novan sistemon. Ĉu oni konsideras tion kiel bona aŭ ne, la ŝtatoj estos devigataj iri sur la vojoj de la kolektivismo, ne sen kontraŭstaro, sed ĉiuokaze pli rapide ol oni povis supozilaŭ la antaŭmilita evolucio. Pro la premo de la laboristaj klasoj, cetera nekapablaj pagi, la financaj militŝarĝoj pezos sur la riĉuloj, kiuj tro malfrue bedaŭros sian indiferentecon je la paca celado. Ĉar siaflanke la riĉaj klasoj por elporti la pliajn ŝarĝojn, ne rezignante je la ĝisnuna vivkomforto, ŝanĝos la laborkondiĉojn en maniero malfavora al la interesoj de la laboristoj, estas antaŭvideble, ke tiuj lastaj postulos la protektadon de la ŝtato kaj ĉiam pli inklinos al sociaj plibonigoj laŭ kolektivisma direkto. Aliflanke, pro kaŭzoj pli ekonomiaj kaj praktikaj ol teoriaj, la plivastigo de la ŝtataj monopoloj kaj la naciigo de la ĉefaj produktofakoj estas en logika rilato kun la pligrandiĝintaj bezonoj de la ŝtato. Estos bela epoko por la burokratoj kaj burokratemuloj, tiom pli, ke en ĉiuj militantaj landoj miloj da invalidoj kaj duoninvalidoj persekutos la ŝtaton per siaj postuloj je oficoj, dum la politikistoj, por akiri iliajn balotvoĉojn, penos alligi al si tiun klientaron je la domaĝo de la ŝtata kaso.

La estonteco do verŝajne favoros la triumfon de la ŝtatema socialismo per vojoj neantaŭviditaj de la socialistoj mem. Sed tiu evolucio ne okazos senbatale. Jam nuntempe, almenaŭ en la civila loĝantaro, tio, kion oni nomis la „sankta unuiĝo“ aŭ la „civila paco“ fariĝis nur vorto. Post la milito eĉ la vorto malaperos. La politikaj bataloj kaj la ekonomiaj kontraŭstaroj estos ankoraŭ pli akraj ol antaŭe. Unuparte, estos kontraŭstaro ĉe la flanko de la novaj riĉuloj, kies havon pligrandigis la milito en forta proporcio; fieraj je sia ĵus akirita riĉaĵo, plenaj de luksapetitoj, senskrupulaj kaj nedecemaj kiel kutime estas la novriĉiĝintoj, ili penos ĉiumaniere konservi tion, kion ili akiris, kaj kun energio kontraŭstaros je la plipotenciĝo de la ŝtato kaj je ĝia enmiksiĝo en la ekonomian kampon. Tiu plutokrataro verŝajne penos deturni la atenton pri la ekonomiaj postuloj de la laborista klaso, agitante pure politikajn demandojn aŭ eĉ ekscitante la naciemajn pasiojn per maldelikataj, sed ofte sukcesaj, rimedoj. Antaŭ la milito la intereso de la pli multaj kapitalistoj estis favora je la konservado de la paco. Post la milito, la situacio eble iom ŝanĝiĝos en tiu rilato; la novaj kapitalistoj, pro sia deveno kaj pro sia intereso rompi kiel eble plej la unuecon de la laboristaro, inklinos al la konservado de la interŝtata anarkio. La naciaj antagonismoj

ĉiam helpis, almenaŭ momente, al la malakrigo de la klasaj antagonismoj.

Aliparte, la formiĝo de opozicio kun revoluciona tendenco estas verŝajna; jam pluraj simptomoj ĝin ekanoncas. La revoluciemaj partioj trudpostulos de la registaroj la plenan efektivigon de la kolektivista programo. Dum la plimulto de la ĝisnunaj kondukantoj de l' socialismo kun naciona tendenco sidos ĉe la registara flanko, la pli radikalaj elementoj de la socialismo, al kiuj aldoniĝos ĉiuspecaj malkontentuloj, sekvos aliajn ĉefojn kaj alprenos pli tranĉajn metodojn. La milito ja kutimigis la homojn je la senbrida uzado de la perforto, je la regado de la instinktaj fortoj super la racio, je la malŝato de la legaj procedoj; ĝi plie malpliigis la kompatemon kaj la sentimentalecon. Tio favoros la ribelemon en la politikaj kaj socialaj bataloj. Strikoj, tumultoj, ribeloj estas antaŭvideblaj, kaj fakte la milito trudis tiom da nemerititaj suferoj al la popoloj, ke oni apenaŭ povas miri, se ilia kolero iam eksplodiĝos en akra formo.

Multaj homoj opinias, ke la milito alkondukos la ĝeneralan triumfon de la demokratia regado. Tia tendenco ni jam nun konstatas. Dum la milito, kiu postulas la forigon de la plej necesa demokratia rajto, nome la libera esprimado de la opinioj, vera demokratia regado fakte ne povas

ekzisti. Sed, je la paco, malaperos la limigoj truditaj de la militaj cirkonstancoj. La ĝeneraligo de la universala voĉdonrajto en ĉiuj landoj de Eŭropo signos la venkon de la demokratia principo, almenaŭ teorie. Malfacile estos rifuzi la voĉdonrajton al tiuj, kiuj por la ŝtato riskis sian vivon. Logika konsekvenco de la universala balotrajto estas la starigo de registaro responda antaŭ la popol-representantoj, kio estas la esenca karaktero de la demokratia regado. Sed kiam la demokratiaj reformoj estos ĉiulande plenumitaj, la internaj bataloj celos, ne plu politikajn, sed ekonomiajn kaj sociajn plibonigojn. Ili estos tiom pli akraj, ke la agadkampo de la ŝtato estos plivastiginta, kaj sekve ĉiu partio havos plej grandan memintereson je la al milito de la superregado.

Oni jam ofte konstatis dum ĉi tiu milito la progresojn de la feminismo. Precipe el la ekonomia kaj socia vidpunkto, ili estas atentindaj. En la militantaj nacioj, grava nombro da virinoj okupas postenojn, kutime rezervitajn por viroj. Estos neeble reiri al la antaŭa stato. Multaj virinoj fariĝis jam memstaraj, trovinte gajnigajn oficojn. Ili en la estonteco estos devigataj plue labori por gajni siajn vivkostojn, ĉu ĉar la edzo estis viktimo de la milito, ĉu ĉar ili ne sukcesas edziniĝi pro la malmultiĝo de la viraro sekve de la nuna buĉado. La plivastigo de la virina laboro

certe kaŭzos notindajn ŝanĝojn en la moroj. La malapero de centmiloj da patroj kaj la kreskanta uzo de la virinoj en la industrio kreos multajn malhelpojn je la edukado de la infanoj, kio denove necesigos la enmiksiĝon de la ŝtato en aferojn ĝin antaŭe nekoncernantajn. La familio, kiel socia institucio, riskos do perdi sian antaŭan signifon, tiom pli, ke la kreskanta tendenco de la ŝtato je la transpreno de la heredmono ŝancelos la ĝisnunan ekonomian fundamenton de la familio.

En rilato kun la malplimultiĝo de la viroj, estas la malplimultiĝo de la naskiĝoj, sekve, por pli malfrua epoko, malpliigo de la tutmonda produktado kompare kun la antaŭa militŝtato, kaj rilate al la loĝantaro proporcia leviĝo de la popoloj ne aktive partoprenintaj en la milito.

Estis jam observite, ke la milito favoris la krimkvanton de la junularo. Pro la influo de la triumfanta perforto, la sugesto de la militmedio, la malfortiĝo de la familia edukado, la elhejmiĝo de la virino, pli kaj pli okupata en industria aŭ komerca laboro, tia socia danĝero verŝajne kreskos. Plie, almenaŭ en kelkaj landoj, la juna generacio fizike malfortiĝas pro la malfavoraj nutrokondiĉoj. El tiuj militrezultoj, moralaj kaj fizikaj, sekvas ke pligrandiĝos la nombro de la senekvilibruloj, malkontentuloj, perfortuloj, kiuj kutime enkapt-

iĝas facile en la retoj de la revoluciemaj tendencoj aŭ de la mistikaj movadoj.

Gravan influon je la postmilita socio kompreneble havos la stato de la internaciaj rilatoj. Se la packontrakto pekus tro grave kontraŭ la rajto de la popoloj je memekzisto, se akra ekonomia batalo sekvus la nunan militon, kiel iuj deziras, tiam la situacio estus ankoraŭ pli malbona ol antaŭ la katastrofo, ĉar al la ŝarĝoj rezultantaj el la milito mem, aldoniĝus novaj ŝarĝoj por la estontaj armadoj, necesaj por singardo kontraŭ eventualaj venĝmilitoj. Sed tia stato estas neverŝajna. Oni ĉiuflanke ekkomprenas, ke daŭra paco estas neebla tiel longe, kiel popoloj estas subpremataj de aliaj gentoj. Tiu observo estas eble la sola, sed signifa, progreso rilate al antaŭaj militoj. Estas do kredeble, ke el la multaj promesoj faritaj al la popolopinio pri la kondiĉoj de daŭra paco, io tamen restos favore de la principo de memregado. Aliparte, krom politikaj, ankaŭ ekonomiaj kaŭzoj instigos la registarojn pli akcepteme konsideri la proponojn pri interŝtata unuiĝo kaj limigo de la armeoj. Tiam, post la grandega ekscitado, kiu atingas sian paroksismon, okazos reciproka paciĝo sur la kampo de la interŝtataj politikaj rilatoj. Sed dum la interŝtataj bataloj fariĝos malpli akraj, ĉio antaŭsignas, ke la internaj bataloj en ĉiu ŝtato estos pli akraj ol iam.

Ĉiuokaze, certe estas, ke en ĉiuj rilatoj la tutmonda militego havos grandegajn konsekvencojn, ne sole per siaj politikaj internaciaj efikoj, sed ankaŭ precipe per siaj ekonomiaj, financaj, sociaj, moralaj reagoj. Ĝi sendube ne estos malpli epokfaranta fenomeno ol la franca revolucio, kaj rilate al tiu ĉi ĝi havas la superecon, ke ĝia karaktero estas universala. Ĝi skuas la mondon en ĝiaj fundamentoj, renversas la tradiciojn, rompas la ĝisnunajn kadrojn, ĉion transturnas. Kion ĝi elforĝas, tion ni provis diveni, gvidate laŭ la nun observeblaj faktoj, sed tro proksime de ili ni estas, por ke ni povu fari ion alian ol erarvagi sur la kampo de la hipotezoj, simile al la infano, kiu rigardante kun scivolo la linion de l'horizonto penas prezenti al si la transan mondon laŭ la pejzaĝoj de li konataj.

La lasta milito?

(Septembro-Oktobro 1917)

La nuna milito diferencas de la antaŭaj ne sole per siaj grandegaj proporcioj, per la mirinda perfektigo de la detruilaro, per la graveco de la homperdoj, per la profundaj transformoj en la ekonomia vivado de la popoloj, per la sendecida karaktero de la armeaj operacioj, sed ankaŭ — tio estas la plej grava el ĉiuj konsekvencoj

— per la influo, kiun ĝi havas je nia pensmaniero.

Dum la hombuĉadoj de la pasinto ne vekis ĉe niaj prapatroj daŭran reagon kontraŭ la principo mem de la milito, kiu al ili ĉiam aperis kiel natura malfeliĉo apenaŭ evitebla, ni nun kun indigno ĝin malakceptas, ni ĝin konsideras kiel senutilan barbarajon, kiel krimegon kontraŭ la homaro. Nian indignon kreskigas la fakto, ke ni komencas kompreni, ke la milito ne estas natura fatalaĵo simila al tertremo aŭ vulkansputo, sed ke, kontraŭe, ĝi povus esti evitata per ĝustatempa antaŭzorgo de la homoj. Ĝuste tial ni vidas, ke la registaroj tiel energie penas pruvi sian senkulpecon. La bataladon per la dokumentoj kaj artikoloj ili juĝas ne malpli atentinda ol la bataladon per la kanonoj.

Neniu jam povas dubi, ke la nuna milito senkreditigis la principon mem de la milito, kiu de nun aperas kiel absurdaĵo nedigna je la progresoj de la civilizo.

El tiu konstato naskiĝis la espero, ke instruitaj de la plej terura sperto, kiun oni povus imagi, la popoloj morgaŭ demetos la armilojn kaj aliĝos al la idealo de unuigita kaj pacigita homaro. Estis dirite, ke tiu ĉi milito mortigos la militon.

Tamen, esperi, ke la nuna milito estos la lasta, ne sufiĉas, por ke tio fariĝu fakto. La malamo

al la milito estas valora helpilo en la batalado por la starigo de nova ordo, sed ĝi povas konduki al pozitiva rezultato nur se nia spirito havas sufiĉe precizan ideon pri la praktikaj rimedoj por solvi novajn konfliktojn. Por vivi en bona sano, ne sufiĉas maldeziri la malsanon, sed oni pli devas havi higienon, vivmanieron, kiuj antaŭforigas la eblajn kaŭzojn de malsano.

Malfeliĉe, kvankam la pli multaj homoj malaprobas la principon de la milito, nur malmultaj ekzistas, kiujn interesas la demando, kiel eviti la reokazon de la nuntempa barbaraĵo. Estas timinde, ke je la paco la homaro, okupota de aliaj taskoj ŝajne pli urgaj, refalos en la antaŭan erarsistemon kaj tiel perdos la profiton de siaj tragediaj spertoj. Kontraŭ tiu ebla danĝero — la forgeso post la suferado — ni gardu la publikan opinion, starigante antaŭ ĝi jam nuntempe la problemon pri internacia ordo en ĝia tuta amplekso. Kiu sub diversaj pretekstoj pretendas prokrasti la studadon kaj diskutadon de tiu problemo, tiu estas, ĉu li ĝin volas aŭ ne, preparanto de la estonta malordo kaj sekve de novaj militoj. Same danĝera li estas kiel la militemulo.

La serĉado de la rimedoj necesigas la konon de la kaŭzoj. Nu, en tiu rilato nia juĝokapablo estas ankoraŭ tre nesufiĉa. Ni ja kun energio denuncas la prirespondajn individuojn, kvankam

ni tro ofte faras tion pli laŭ niaj impulsoj aŭ laŭ la sugestoj de la kreantoj de l'opinio ol laŭ la senpartia ekzameno de la faktoj; ni ja akuzas kaj riproĉas la „kulpajn“ registarojn; ni postulas, ke ili estu severege punataj. Sed estas rimarkinde, ke en niaj esploroj pri la militkaŭzoj ni preskaŭ ĉiam malatentas la esencan, nepersonan, konstantan elementon de la problemo, la ĉefkaŭzon de ĉiuj militoj, nome la *sistemon* de la interŝtataj rilatoj, kies propra logiko superregas la volon de la registaroj kaj de la popoloj.

Ĉar ni ignoras la veran kaŭzon de la publikaj malfeliĉoj, ni povas proponi nur duonrimedojn, ĉiam samajn kaj ĉiam nesufiĉajn: puni la „kulpulojn“, ŝanĝi la landolimojn ĉe kelkaj punktoj, starigi novan ekvilibron tiel nefirman kiel estis la antaŭaj. Ni ne sukcesas eliri el la fatala rondo, interne de kiu la homaro dum jarcentoj kaj jarcentoj erarvagadas, foririnta de milito kaj rekondukita al la milito, ĉar ĝi ne ankoraŭ kapablas sin regi. Tio daŭros tiel longe kiel ni obstinos imputi al homoj tion, kio en la realeco estas lo logika efiko de certa sistemo, pri kies konservado ĉiuj popoloj estas kulpaj. Ni ne kredu la potencon de la registaroj pli granda ol ĝi estas. Kiel ajn senskrupulaj estas certaj popolgvidantoj, ili estus malhelpataj endanĝerigi la internacian sekurecon, se la mondo estus organizita por la paco anstataŭ

esti organizita por la milito. La logiko de la sistemo estas pli forta ol la logiko de la homoj.

Internacia anarkio estas la taŭga nomo de la sistemo, kiu nin regas, kaj de kiu la milito estas neforigebla. Ĝin karakterizas la kunestado de suverenaj nacioj, kiuj en siaj reciprokaj rilatoj konas nenian alian leĝon ol sian intereson.

Feliĉe la homoj havas la povon ŝanĝi la sistemon, kiu subpremas ilin. La solvo estas konata. Ĝi konsistas en tio, ke oni anstataŭu la anarkion per la ordo, la tumultan haoson de la sendependaj nacioj per la libera asocio de la popoloj. Nenies venko sufiĉos per si mem por mortigi la militon. Sole povas atingi tiun grandiozan rezultaton fundamenta transformo de la interŝtataj rilatoj realigota de la popoloj pli bone edukitaj kaj pli racie instruitaj pri iliaj veraj interesoj.

La plej granda venko, la plej fruktodona, la plej daŭra, la plej dezirinda estos tiu, kiun la homaro gajnos super si mem, sin liberigante el la katenoj de la pasinto, forĵetante la kadukiĝintajn antaŭjuĝojn, kiuj ĝin pereigas, kaj celadante per ĉiuj siaj fortoj al la luma idealo de unuigita naciaro.

Nova spirito

(Novembro 1917)

El tio, ke en la daŭro de tri militjaroj neniu armeo ankoraŭ sukcesis plene venki, laŭ la mal-

nova senco de tiu esprimo, oni tamen ne konkludu, ke, senfrukta el la tradicia militista vidpunkto, la milito ankaŭ estis tia rilate al la movado de la ideoj.

Dum rapide atingita venko estus ebriiginta unu partion kaj korpreminta la alian, nenion ŝanĝante rilate al la potenco de la ekzistantaj ideoj — tiuj ideoj, kiuj, nutrinte generaciojn, nun kadukiĝinte kondukas la mondon al la abismo — la sendecid-eco de la militistaj operacioj iom deturnigis la atenton de la homoj for de la materia milito, kaj inklinas ilin pripensi pli multe pri la senco de la batalado kaj propra valoro de la milita ideo. Perd-inte siajn iluziojn ĉe la vido de la moderna milito, kiu ignoras iliajn venkaspirojn, ili ekserĉas, ĉu ekzistas aliaj rimedoj ol la perforto por ĉesigi la nunajn teruraĵojn kaj eviti estontajn.

Sub la influo de la sangoplena sperto, komencas disvastiĝi inter la popoloj kaj eĉ inter la kutime tradiciemaj regantoj tiaj veroj, kiuj hieraŭ estis de la granda plimulto de la homaro konsider-ataj kiel utopiaĵoj. Ili nun malsupreniris el la regiono de la nubaj revoj kaj ekfariĝas gvidantaj principoj de nova mondpolitiko. Ilia triumfo signifos la starigon de nova ordo internacia, la komencon de nova epoko en la vivado de la popoloj.

Nacia libereco, demokratia regado, internacia ŝtatligo, tiaj estas la postuloj de la moderna penso antaŭ la multaj problemoj starigitaj de la milito.

Nacia libereco, tio estas justa dispartigo de la teritorioj konforme al la volo de iliaj enloĝantoj, solvado de la naciaj demandoj per senpera konsultado al la veraj interesuloj, forigo de la anarkia rajto je militakiro, de la danĝera pretendo pri la strategiaj landolimoj, de la atakema kaj neniam sata imperialismo, respekto al la memstareco de ĉiuj popoloj, kiuj estu traktataj kiel aroj de penso-kapablaj homoj, ne kiel negoceblaj brutaroj. El tio sekvu ankaŭ, kiel logikaj konsekvencoj, la respekto al la naciaj malplimulto, la kreskanta liberigo de la neeŭropaj popoloj, la forigo de la ĝisnunaj barbaraj kaj spekulacaj procedoj en la koloniaj aferoj.

Demokratia regado, tio estas rajto de la nacioj efike kontroli la agojn de la naciestroj kaj mem decidi pri la regnaj aferoj, malapero de la aŭtokratiaj, absolutismaj aŭ pseŭdodemokratiaj reĝimoj, forigo de la kaduka sekretdiplomatio, kiu post ĉiu milito diligente teksas la fadenojn de novaj militoj. Sed ni ne lasu nin trompi per la brilo de la vortoj. Demokratio vere ekzistos nur kiam la homoj vivos sub ekonomia reĝimo, kiu pli juste, pli racie dispartigos la riĉaĵojn inter ili kaj malaltigos la potencon de la mono.

Internacia ŝtatligo, fine, tio estas kreo de jura ligilo inter ĉiuj nacioj konsiderotaj, ne kiel apartaj kaj konkurantaj organismoj, sed kiel elementoj de

pli vasta unuo ampleksonta la tutan civilizitan mondon, fino de la barbara aĝo de l' militarismo, forigo de la absurdaj interpopolaj malamoj, kaj, sur la vasta kampo de l' homa penso, triumfo de la internaciismo, kiu ĝuste komprenata prezentas al la homaro novajn perspektivojn, la esperon de luma estonto.

Tra la densa plektaĵo de la homaj antaŭjuĝoj, malgraŭ ĉiuj malhelpoj, kiujn starigas la malklero, la rutino, la pasiveco de la malprogresemaĵoj, tiuj ideoj antaŭeniras kaj pli kaj pli sin trudas al la priatento de ĉiuj popoloj. Forpelataj estos la gvidantoj, kiuj ne ankoraŭ komprenis, ke la milit-skuego estas naskanta novan spiriton, novan idearon, novajn metodojn.

Ni fidu: venko venos. Ne tiu venko, kiu sur amasoj de kadavroj kaj tra riveroj de sango altigos nacion super aliaj nacioj, kaj post kelkaj jardekoj ĝin refaligos al la abismo, sed tiu frukto-dona, kreanta venko, kiu direktante la spiriton de la homoj al la samaj raciaj solvoj, morgaŭ liberigos ĉiujn popolojn kaj postmorgaŭ ilin nerompeble unuigos.

Internacia ordo kaj internacia lingvo

(Decembro 1917)

Ĉiu deziranta, ke al la estonta homaro estu evitata la vidaĵo de nova mondbuĉado, konsentas,

ke stato de daŭra paco estas atingebla nur per starigo de harmonia ordo internacia, ĉe kiu la nacioj, anstataŭ anarkie vivi unuj rilate al la aliaj, sin fine asocios por la komuna bono de ĉiuj. Post kiom da skuoj, suferoj, detruoj, revolucioj la nova mondo elstarigos el la nuna sanga haoso, neniu kuraĝas antaŭtaksi. Sed la fakto, ke la realigo de tia profunda transformo renkontas grandegajn praktikajn malhelpojn, ne nuligas tiun alian fakton, ke nur per la unuigo de la nun inter si batalantaj partoj la homaro povos trovi ekvilibron.

Malgraŭ la terura bruado de la armiloj kaj la tumulto de la militpasioj katenantaj la animojn, ekzistas nuntempe homoj, kiuj kun serena spirito studas, kiel, profitante la ĝisnunajn spertojn, oni povos plej bone organizi la estontan interŝtatan asocion. Ili precipe atentigas la politikan kaj ekonomian aspekton de la internacia problemo. La interŝtatajn rilatojn ili celas reguli per taŭga jura organizo, kiu respektante la necesan memstarecon de la naciaj organismoj submetos ilin al komunaj leĝoj pri ĉio koncernanta la intereson de la tuta homaro.

Neniu, kiu serioze aspiras al tia nova ordo, rajtas aserti, ke tiuj studlaboroj, nun pure teoriaj, estas senutilaj. Internacia ŝtatligo ne spontane kreigos. Oni devas ĝin prepari. Pri tio sin dili-

gente okupas diversaj organizaĵoj, inter kiuj estu speciale citinda la Centra Organizo por daŭra paco en Hago, kiu jam publikigis interesajn verkojn.

Sed la internacia problemo ne havas sole politikan kaj ekonomian aspekton. Kiel ajn vasta estas ilia scienco, la juristoj kaj politikistoj ne povos ĝin kontentige solvi per siaj laboroj. Naiva estas, kiu kredas, ke por efektivigi tiel fundamentan transformon de la internaciaj rilatoj, sufiĉos starigi novajn jurajn regulojn. Sendube tiaj formalaj reguloj estas necesaj el praktika vidpunkto, sed ili trafas la celon, nur kondiĉe, ke samtempe transformiĝu la spirito de la homoj. Senvalora paperajo restos la plej belaj teoriaj aranĝoj pri internacia ŝtatligo tiel longe kiel mankos ĉe la aktiva parto de la homaro internaciema spirito.

Kio estas internacia spirito? Ĝi estas simple la apliko, sur la kampo de la interpopolaj rilatoj, de la principo pri reciproka komprenemo kaj toleremo. Kiel iu nacio ne estas prosperkapabla se inter ĝiaj membroj regas malfido kaj malamo, tiel same neniu internacia ligo povos daŭre ekzisti, se inter la popoloj alte staras muroj de reciproka nekompreneo kaj netolero. La plej raciaj proponoj pri evito de estontaj militoj restus senefikaj pro la malfavoraj psikologiaj kondiĉoj, kaj malgraŭ sia deziro al paco, la homaro, pro la persisto de la intergentaj malamoj, estus fatale puŝata al novaj katastrofoj.

Paralele kun la politika kaj jura laborado, sin do trudos al ĉiuj pioniroj de l' nova ordo alia agado, kiu per ĉiuj rimedoj celos la plibonigon de la moralaj rilatoj inter la popoloj. Kaj ĉu inter tiuj rimedoj la plej grava, la plej efika, ne estas la disvastigo de komuna helpa lingvo, dank' al kiu la popoloj ĉesos esti fremdaj unuj rilate al la aliaj kaj iom post iom akiros la konscion pri sia aparteno al la homara familio? Certe neniu asertas, ke nur per la enkonduko de tia lingvo oni atingos staton de daŭra paco, sed ke ĝi estas grava elemento de la internacia problemo, neniu saĝa povas nei. Ĉiu partiano de nova ordo internacia, kiu indiferente aŭ skeptike rilatas al tiu demando, fakte, kvankam nekonscie, agas kontraŭ sia celado kaj malharmonie kun siaj ideoj. Ni scias, ke bedaŭrinde multaj estas ankoraŭ la indiferentuloj pri internacia lingvo en tiuj rondoĵoj. Al ni esperantistoj apartenas la tasko veki ilian atenton, admoni ilin al kunlaboro kaj substreki la neceson de nia lingvo en la rekonstrua postmilita periodo.

Sed por tio estas ankaŭ necese, ke la esperantistoj mem komprenu, ke la sorto de ilia lingvo estas intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia. Esperantisto, kiu deziras la konservon de l' interŝtata anarkio, estas nekonscie malamiko de Esperanto, ĉar per

sia sintenado li helpas al la preterdaŭro de stato, ĉe kiu nia lingvo neniam povos triumfi. Okazaj sukcesetoj atingitaj dum la milito per aliaj metodoj ne devas malatentigi tiun evidentajon, ke por nia movado ne ekzistas pli granda danĝero ol la milito. Nu, kiu diras militon, diras ankaŭ logike ĝian profundan kaŭzon, nome la internacian anarkion.

Al la personoj, kiuj kutimas sekvi la modon, la esprimado de tiuj ideoj, ŝajnos ne ĝustatempa, ne dezirinda, ne deca, en la momento, kiam ĉie oni genufleksas antaŭ aliaj idoloj. Sed la vero restos la vero, eĉ se milionoj da homoj ĝin freneze malatentas. Ju pli oni inklinas ĝin timi, des pli kreskas nia devo ĝin rememorigi. Plie, el kelkaj simptomoj ekaperas, ke la nun laŭmodaj ideoj kliniĝas al la krepusko. Horo venos, kiam, post tragediaj spertoj, meze de la ruinoj kaŭzitaj de tiuj ideoj, la homoj malbenos tion, kion ili hodiaŭ senprudente akceptas kaj kun espero alproksimiĝos al la hodiaŭ malŝatataj kaj kondamnataj veroj. Ni do pie gardu la sanktan fajron. Ni malgraŭ ĉio restu persiste fidelaj al la idealo de interpopola kompreno kaj tolero, kiun Zamenhof, kun prava instinkto, ĉiam opiniis nepre ligata kun nia lingvo. Ĝi estos la idealo, kiun la nova tempo fiere enskribos sur sian flagon.

